

37 Su

786
1984

Prezo 5000 a. K.

Kongresa Bulteno

Oficiala Organo de la XVI^a Universala Kongreso de Esperanto Wien-Vieno 1924

Redakcio: Koncert-Palaco, Wien, III., Lothringerstr. 20.

Redaktoro: D^{ro} Emil Pfeffer.

Nur rekte, kuraĝe kaj ne flankigante!

Legeble skribitaj manuskriptoj por la redakcio estu transdonataj en la kongresejo al la ĉefsekretario.

Numero 1.

Wien-Vieno, merkredo, 6. Aŭgusto 1924.

Aperas ĉiutage.

„Nun nia afero staras forte. La glacia tavolo da antaŭjuĝoj de la mondo estas rompita kaj nia afero kreskas regule kaj senhalte. Ĉiu jaro potence pligrandigas niajn fortojn kaj ni iras al nia celo jam kun plena trankvileco. Centoj da miloj da radikoj kaj radiketoj subtenas nian arbon, kiu jam ne timas la venton. La naturo, kiu longan tempon batalis kontraŭ ni, batalas nun por ni, ĉar tiu sama forto de inercio, kiu longan tempon terure malhelpis ĉiun nian paŝon, ĝi mem ŝovas nin antaŭen. Eĉ se ni volus halti, ni jam ne povus!“

D-ro L. L. Zamenhof.

Bonvenon!

La unuaj vortoj en tiu ĉi gazeto, la Kongres-Bulteno de la XVI^a, estu kora kaj sincera bonvenado al la ĝojige multaj sinjorinoj, fraŭlinoj kaj sinjoroj, samideanoj, kiuj tiom volonte sekvis la inviton al la granda ĉiujara festa kunveno de la „Esperantuja popolo“ en la ĉefurbo de la respubliko Aŭstrujo, en la multe preparolata kaj multe prikantata Wien.

La unuan fojon, de kiam okazas Universalaj Kongresoj de Esperanto, la samideanaro kolektiĝas ĉirkaŭ la verda standardo en grandurbo, ĉar, malfeliĉe, la tiom belege preparitan X^{an} en Paris dum la 1914^a neniiĝis le komenco de tiu terura katastrofo de la homaro, kies konsekvencoj nun suferigas ĉiujn Eŭropajn ŝtatojn. Feliĉe, la Esperanto-ideo postvivis tiun tempon de malfeliĉego kaj ĝiaj fidelaj partianoj vigle laboras en ĉiuj landoj por la venko, kiu videble, paŝo post paŝo, proksimiĝas. Kaj kun ĝojiga antaŭsento de tiu venko en paca batalado la pli ol tri mil reprezentantoj de la Esperantuja armeo, kiuj sin anoncis por la XVI^a, povas renkonti unuj la aliajn en urbo, kiu daŭre konservas la memoron de la kara Majstro, de nia neniam forgesbla D^{ro} Zamenhof. Posedante jam en si la multvaloran frukton de sia genio, li vivis en ĉi tiu urbo dum kelke da tempo de siaj unuaj virjaroj. Do, tiu ĉi urbo ja meritas, esti unu fojon la centro de Esperantujo.

Kaj la Esperantujanaro en tiu ĉi urbo plenforte klopodis, inde kaj gajige gastigi

la „sampopolanojn“ ĉiulandajn. La ĉi tieaj samideanoj vidas honoron por si en la amasa partopreno el ĉiuj ŝtatoj, Eŭropaj kaj ekster-Eŭropaj kaj en la alveno de multaj personoj gravaj en la movado por Esperanto.

Tiu ĉi fakto esperigas, ke dum la nun komenciĝanta Kongreso de Esperanto ankaŭ gravaj decidoj por la plua prosperigo de nia sankta afero okazos, decidoj, kiuj en la historio de Esperanto meritis distingon. Tagoj de serioza laboro atendas la protagonistojn de Esperanto, de laboro, kies rezultoj forte helpu al kiom eble plej ĝenerala disvastigo de niaj idealoj!

Ĉar tiu ĉi kongreso estu, kiel ĉiuj ĝisnunaj de Esperanto, impresiga montrado kaj pruvo de la valoro de nia kara lingvo, sed tiun ĉi fojon antaŭ granda publiko, kiun prezentas la loĝantaro de grandurbo, kaj la efiko de tiu ĉi kongreso longatempe post ĝiaj tagoj estos sentebla en tiu ĉi loko, kie ĉiam ekzistis vigla intereso por kultur-problemoj, kaj malproksimen ekster ĝiaj limoj tra la tuta respubliko. Espereble ĝi instigos la registaron de la nunjara Kongresŝtato kaj ankaŭ ĉiujn homojn intelektajn interesiĝi pri la neŭtrala lingvo, kies ĉiumaniera uzebleco estos montrata al ili dum la nun sekvontaj tagoj nekontraŭdireble.

Tion spertos precipe la ankoraŭ ne-Esperantaj partoprenantoj en la fakaj konferencoj kaj ekz. la pacifista manifestacio per unu komuna lingvo multe pli forte impresos la ĉeestantaron ol iu ajn samcela nacia manifestacio, ĉar videble por ĉiu ĝi montros la interfratiĝon de popoloj ĉiulingvaj per iliaj reprezentantoj en tiu solena kunveno.

Sed, suliĉu la ĝisnunaj diroj pri „seriozaĵoj“. Ankaŭ multspecaj amuzoj kaj distroj atendas en Wien la XVI-anaron. Se — kion ni tre deziras kaj esperas — la ĉielo montros serenon mienon, estos vera ĝuo, promenadi tra la grandurbostrato, inspekti la magazenojn de komercistoj — precipe la karaj kongresaninoj trovos por tio kontentige multajn okazojn kaj povos prijuĝi la „modon de Wien“ ĉe la „fonto“ — veturi en la belegan proksiman pejzaĝon ĉirkaŭ la urbego, spiri la freŝan aeron de parkoj kaj de arbaroj kaj vespere ĝis la profundo de noktoj laŭ bona Kongresana kutimo amuziĝi kun samideanoj babilante, diskut-

ante, aŭ aŭskultante belan muzikon, bonegan teatraĵon, variajn kabared-prezentadojn amuzan lumbild-paroladon ktp. ktp. Ĉion eblan faris la Wien'aj samideanoj por sentigi la karajn gastojn hejmaj inter ili. Tamen ili ne volas promesi tro multon, nur inviti, ke la amikoj eksterlandaj mem vidu kaj provu kaj tiam juĝu pri la aranĝoj de la Kongreso preparitaj zorge kun multaj klopodoj de la Loka Kongresa Komitato.

Nun la Loka Kongres-Komitato finis siajn preparajn laborojn kaj kun vera ĝojo ĝi bonvenigas la amason da gastoj, kies nombro estas kvazaŭ jam rekompenco valora de ĝiaj penoj. Karaj gesamideanoj el ĉiuj regionoj de la tero, fariĝu, ni petas vin, sinceraj veraj amikoj, fratoj de viaj ĉi tieaj samideanoj, tiam ankaŭ la XVI^a restos neforgesebla por ni ĉiuj kiel nova bona kaj bela fundamentoŝtono por la de ni ĉiuj sopirata templo de Esperantismo!

Vieno vin salutas, karaj Esperantuanoj!

Wien, la 6^{an} de Aŭgusto 1924^a.

La Loka Kongresa Komitato.

Bonvenon en Wien!

Bonvenon koran, gefratara kara,
Veninta tien ĉi pro la ĉeesto
Al nia granda, sankta manifesto
De l' jaro mil kaj naŭcent dudek-kvara!

Salutas Vin la urbo populara
Kun gaja rid' kaj per afabla gesto
De l' loĝantar', aminda la atesto
Pri ĝia gastameco senkompara;

Ĉi Vin salutas kun la kor-deziro
Ke, ĉu amuzo Via ĉu laboro,
En ĝiaj muroj estu bonsukcesa,

Kaj por la tuta viv', post hejm-reiro,
Plej bela restu por Vi la memoro
Pri l' temp' en ĉarma Wien dum la XVI^a!

Fr. Zwach.

TUTMONDA VOJAĜOFICEJO
THOS. COOK & SON
Wien, I., Stefansplatz 2

vendas veturbiletojn por fervojo kaj vaporŝipo al ĉiuj landoj de la tero, lokojn en litvagonoj, ŝanĝas monon, havigas biletojn por rondveturadoj en la urbo, asekuron de vojaĝpakaĵoj, loĝejon en hotelo, gvidlibrojn por vojaĝoj ktp.

==== Informoj senpage. ====

Ĝenerala Kongresprogramo.

La Loka Komitato faris tion eblan por inde okazigi tiun ĉi grandan Vienan Kongreson. Por orientigo ni mencias ĉi-sube la ĉefajn arangojn el la kongresa programo:

- 6-a aŭgusto: vespere, senĝena intersalutigo de la kongresanoj en Koncert-Palaco;
7-a aŭgusto: antaŭtagmeze, malfermo de la kongresaj laboroj, unua ĝenerala interkonsilio, posttagmeze fak-kunsidoj kun neesperantistaj gastoj;
8-a aŭgusto: la tutan tagon fakkunsidoj en 24 grupoj, ĉe kiuj ankaŭ neesperantistoj partoprenos;
9-a aŭgusto: antaŭtagmeze labor-kunsidoj, posttagmeze je la 3-a horo senvualigo de Zamenhofa Memortabulo ĉe Hotelo Hammerand, Schlüsselgasse;
10-a aŭgusto: antaŭtagmeze 10 1/2 horo, granda solena Fest-Kunveno en la granda salonego de Koncert-Palaco, nur por la kongresanoj kun legitimacio kaj insigno, reprezentantoj de publikaj estraroj en kaj eksterlandaj, de korporacioj, institutoj, kaj posedantoj de honorkartoj. Solena parolado de Dro. Privat, salutoj, horkantado.
11-a aŭgusto: antaŭtagmeze dua ĉefkunveno kun raportoj de naciaj delegitoj, posttagmeze specialaj kunsidoj, vespere teatra prezentado en Bürgertheater: Raimund'a „La Malsparulo“;
12-a aŭgusto: kiel en la pasinta tago: kunveno, kunsidoj, teatra prezentado;
13-a aŭgusto: antaŭtagmeze, ferma kunsido, posttagmeze je la 5-a horo kaj vespere granda internacia gardenfestoj en Prater, Varietea urbo;
14-a aŭgusto: frue je la 6 a horo, per speciala vagonaro, ekskurso al la ravanta Alpa restadejo Semmering.

Labor-ordo de la XVI-a.

Table with 2 columns: horo, Numero de la kunveno. Includes events for August 6th, 7th, 8th, 9th, 10th, 11th, 12th, 13th, and 14th.

Table with 2 columns: horo, Numero de la kunveno. Includes events for August 15th, 16th, 17th, 18th, 19th, 20th, and 21st.

La 9an de Aŭgusto:

Table with 2 columns: horo, Numero de la kunveno. Includes events for August 8th, 9th, 10th, 11th, 12th, 13th, 14th, 15th, 16th, 17th, 18th, and 19th.

Table with 2 columns: horo, Numero de la kunveno. Includes events for August 10th: Bahaistoj, ceremonio; C. K.-kaj L. K. K.-kunsido laŭbezone; Granda solena manifestacio de la Kongresanaro kun la oficiala honorgastaro laŭ speciala programo; Festkoncerto laŭ speciala programo; Kabaredo „Vesperto“, I., Rotgasse 3.

La 11an de Aŭgusto:

Table with 2 columns: horo, Numero de la kunveno. Includes events for August 8th: Literatura Asocio; Ruĝa Kruco; Filatelitoj, tria kunsido, I., Stubenring 18; Dua ĉefkunsido de la XVIa; Pacifistoj (U. E. P. L.) granda manifestacio laŭ speciala programo; Blinduloj, kvara laborkunsido, blindulejo; Inĝenieroj, faka kunveno; Tabakkontraŭuloj, kunveno, I., Kleeblattg. 7; Blinduloj, koncerto de la blindaj Esperantistoj; Festprezentado de „La Malsparulo“, III., Bürgertheater, Vordere Zollamtsstrasse; Kabaredo, Internacia, I., Rotgasse 3.

La 12an de Aŭgusto:

Table with 2 columns: horo, Numero de la kunveno. Includes events for August 8th: Farmaciistoj, faka kunveno; Vegetaranoj kunsido; Tria ĉefkunveno de la XVIa; Rondveturado sur ŝipo „Leda“ sur la Danubo de la siphaltejo Weissgerberlande; Pacifistoj, ferma kunsido; Blinduloj, kvina laborkunsido, fermo, blindulejo (Prater); Dua prezentado de „La Malsparulo“, III., Bürgertheater, Vord. Zollamtsstr.; Kabaredo, Internacia, I., Rotgasse 3.

La 13an de Aŭgusto:

Table with 2 columns: horo, Numero de la kunveno. Includes events for August 8th: Fakaj kunsidoj laŭbezone; Interna fermo de la XVIa; Granda gardenfestoj laŭ speciala programo, Prater, „Bunte Stadt“.

La 14an de Aŭgusto:

Table with 2 columns: horo, Numero de la kunveno. Includes events for August 6th: Speciala rapidvagonaro al Semmering de Südbahnhof; Laŭvola kunveno en Volksgarten apud la iama imperiestra palaco Hofburg.

Dokumentoj.

Kontrakto de Helsinki.

(Kun la nova Teksto de artikolo IV., revizita de la geneva Konferenco de K. R. kaj U. E. A.)

I. Oficiala Esperantista Organizo.

La Oficiala Esp. Organizo estas jena:
1. La Naciaj Societoj elektu Konstantan Re-representantaron de la Naciaj Societoj (K. R.), konsistantan el unu reprezentanto de ĉiu nacia societo, kun nombro da voĉoj proporcia je la nombro de anoj, por kiu ĝi pagis kotizon al la kaso de la K. R. Tiu Re-representantaro starigos sian internan regularon. Ĝi povas havi prezidanton kaj ĝeneralan sekretarion elektitan ekstere de la Re-representantaro. Ĝi zorgos pri la reciprokaj informado kaj kunlaborado de la naciaj societoj por komunaj celoj kaj pri ilia mombuteno al la komunaj Institutoj de la Esperantistaro.

2. La individuaj Esperantistoj grupigu internacie per aligo al Universala Esperanto-Asocio, kiu disvastigas la ĝeneralan uzadon de la lingvo.
3. La Fakaj (teknikaj kaj profesiaj) Societoj grupigu la Esperantistojn por propagando kaj uzado en specialaj rondoj.

II.

La Konstanta Re-representantaro (K. R.) kaj la Universala Esperanto-Asocio (U. E. A.) interkon-

DOROTHEUM


Wien, I., Dorotheergasse 17

Bankfako


Aĉeto kaj Vendo de valutoj, biloj kaj devizoj
Aŭkcio de uzad-objektoj ĉiutage de la 15a
De mardo ĝis vendredo ankaŭ juvelaĵoj. Ekspozicio de la 13a

BILDOJ EL VIENO

el Lechner'a Albumo de Vieno, eldonita de la Universitata Librejo R. Lechner (Vilh. Müller),
Wien, I., Graben 31.



La Kortega Teatro kaj panoramo de Vieno
Burgtheater und Panorama von Wien -- Le théâtre de la cour impériale et une vue sur la ville -- The Imperial Court Theatre and a view to the City



Urbodomo
Rathaus -- L'Hôtel de ville -- The Town Hall



La Ŝtata Operejo
Staatsoper — L'opéra l'état — The State opera House



La Urba Ĝardeno
Stadtpark — Le jardin de la ville — The City Park

Entreprenoj de la Komunumo Wien

Gewista

Urba Anonca Entrepreno, Wien, I., Jasomirgottstrasse 2 - - - Telefono No. 60-5-60 serio

Urbaj Elektraj Tramvojoj

Komenco de veturoj je la 6^a de Ring, fino de veturoj je la 24^a de Ring. 2700 vagonoj ĉiutage uzataj, 73 linioj. Unuforma prezo de veturo dumtaga 1700 K. Linioj interrilatantaj la Wien'ajn stacidomojn: Westbahnhof—Franz-Josephs-Bahnhof—Nordbahnhof—per la linio 5; Franz-Josephs-Bahnhof—Nordbahnhof per la linio 15; Westbahnhof—Süd- kaj Ostbahnhof per la linioj 18 kaj 118; Tabor—Süd- kaj Ostbahnhof per la linio O; Franz-Josephs-Bahnhof—Süd- kaj Ostbahnhof per la linio D. Post la fino de la regulaj, veturoj dumnoktaj sur la rondlinio pasanta preter ĉiuj stacidomoj ĝis la 1^a nokte. — Al la Foir-ekspoziciejoj: Al la ĉefa pordego de Rotondo per la linioj A kaj Ak: veturo sen vagonŝanĝo de Rotondo (ĉefa aleo en Prater) al la Foir-palaco per la linioj H₂, L kaj (dum Foir-tempo) M. — La plej bona veturo al la somerloĝejoj en la Wienerwald-(Arbar-)regiono dum 25 minutoj de Ring: Neuwaldegg'on (linio 43), Pötzleinsdorf'on (linio 41), Nussdorf'on (linio 36), Grinzing'on (linio 38) kaj Sievering'on (linio 39). Eksterurbaj linioj 260 kaj 360 de Mauer, Rodaun'on, Perchtoldsdorf'on kaj Mödling'on kun rekta interrilato de la linio 60. Intervaloj de vagonaroj 15 kaj 20 minutoj, daŭro de veturo al la sportejoj kaj al la vetrajdejo Freudenu.

Aŭtomobiloj-Omnibusoj. Veturoj dumtage (labortagoj) de 7.45 ĝis 19.45 sur la linio Schottengasse—Graben—Stefansplatz—Rotenturmstrasse—Schwedenplatz; intervalo de omnibusoj 3 minutoj. Veturoj dumnoktaj de la 0^a ĝis la 3^a de Stefansplatz ĝis la stacidomoj Nord-, Süd- kaj Franz-Josephs-Bahnhof, Hietzing'on, Hernals'on, Gersthof'on kaj Döbling'on. — Specialaj veturoj de ekskursantaro per aŭtomobila omnibuso dumtage kaj dumnokte. Mendejo: IV., Favoritenstrasse 9. Telefono 52-5-80 serio.

Urba Gasfarejo

Direkcio kaj konstant ekspozicio: Wien, VIII., Josefstädterstr. 10, Telefono 24-5-20 serio.

Nombro de konsumantoj: la 31^{an} de Aŭgusto 1919^a: 239.085
la 15^{an} de Majo 1924^a: 288.000

Fabrikajoj: Gaso, ekonomia hejtigilo por mastrumoj kaj metioj, Koakso, 5 gradoj de koaksera grandeco. Benzolo por motoroj, por komerca uzo kaj plenkura, pura Toluolo, Solve-Nafto, kruda Nafto, ŝtonkarba gudro-peĉo. Fakaj konsultoj senpagaj pri ĉiuj specoj de gasizado.

Urbaj Elektrofarejoj

Direkcio: Wien, IX., Mariannengasse 4, Telefono 24-5-40.

Nombro de konsumantoj la 31^{an} de Aŭgusto 1919^a: 158.878
la 1^{an} de Majo 1924^a: 338.000

Prezo de unu Hektowat-horo lumelektra 520 K^{oj}, kune kun la depago por akvofortuzo kaj por komerco. La plej malkara lumigilo! Altigo de la lumprezio kompare kun tiu antaŭ la tutmonda milito nur ĝis la 7428-oblo! Prezo de unu Hektowat-horo fortelektra 280 K^{oj}, kune kun la depago por akvofortuzo kaj por komerco. Arango de instaloj luataj en malgrandloĝejoj, ankaŭ instaloj kun partopagoj en loĝejoj, vendo de lumig-aparatoj, ludono de elektromotoroj, vendo de elektraj lampoj.

Mendo kaj ricevo: Wien, IX., Mariannengasse 4.

Magazenoj de la Urbo Wien

Publikaj Deponejoj por ĉiuspecaj Konservotajoj. — Disponeblaj por entute 10.000 vagonoj.

Adreso por Telegramoj: Stadtlagerhaus Wien.

Direkcio: Wien, II., Ausstellungsstrasse. Telefono 42-0-50 Serio, 7 stacioj.

Modernaj grenmagazenoj kun maŝinaj ekipoj por transporto kaj purigo, establoj por grenpurigo kaj specialigo laŭkvalita, grentransport-ŝanĝo kun kvar ŝipelevatoroj, transportŝanĝo por unuopaj transportaĵoj per krano, liberaj de limdepago magazenoj, oficejo de la Centra Limdepagejo, publika pesejo, favorigo de transportoj returnaj.

Tri fervojstacioj: Wien-Lagerhaus, Wien-Winterhafen (vintra haveno), Wien-Speicher (magazeno) Zwischenbrücken.

Tri enŝipigejoj ĉe Danubio.

Kun la Magazenoj de la Urbo Wien estas en interrilato: **Malvarmigejo de la Urbo Wien.**

Ejoj por malvarmigo kaj frostigo kun 8000 kvadrataj metroj da disponebla spaco por konservado de viando, ĉasaĵoj, birdoj, graso, butero, fiŝoj, ovoj, fruktoj, sudlandaj fruktoj, lakto, biero, floroj kaj alispecaj malvarm-konservotajoj.

Establo por sekigo kaj plikvalitigo de fruktoj. La plej modernaj ekipoj por sekigo kaj plikvalitigo de prunoj, varmsekigo de ĉiuj frukto- kaj greno-specoj, specialigo laŭkvalita de faboj, senkernigo de nuksoj, senŝeligo de pizoj, poluro kaj duonigo. speciala ekipoj por sekigo de malgrandaj fruktoj.

Telefono 99-3-20

Bierfarejo de la Urbo Wien

Telefono 99-3-21

Rekomendas siajn tre bone konatajn specojn de bieroj, nome:

Spezial Wiener Stadtbräu
(hela biero kelmatura)

Wiener Stadtbräu Doppelmalz
(malhela biero kelmatura)

Borromäusbräu
(malhela forta biero)

Bieroj en boteloj, sendataj en la loĝejon per la liverejo de bieroj botelaj, Wien, III., Baumgasse 47. Telefono 12-23. En ĉiuj restoracioj de „Wiener Messe“ (Wien'a Foiro) nur la tipoj delikatbieraj el la Bierfarejo de la Urbo Wien estas servataj.

Urba Instituto por Asekuroj

Direkcio: Wien, I., Tuchlauben 8

Telefonoj 67-2-72, 67-401

Oficejoj en Landoj Aŭstrujaj: Graz, Herrengasse 11 — Linz, Weiguniplatz 8 — Innsbruck, Bürgerstrasse 3 — Klagenfurt, Bahnhofstrasse 53 — Salzburg, Faberstrasse 11 — Bregenz, Jahnstrasse 11.

Negoe-Branĉoj: Asekuro pro Fajro, Ŝtelo per enrompo, Rabo, Garantidevo, Aŭtomobiloj. Akcidentoj unuopaj kaj kolektivaj, dumvojaĝaj, Vitrorompo, Vivo kaj Rento. — Asekuroj por Transporto, Maŝinrompo, pro Hajlo ktp. plej kontenige estas perataj.

Kongresa Bulteno



Oficiala Organo de la XVI^a Universala Kongreso de Esperanto Wien-Vieno 1924

Redakcio: Koncert-Palaco, Wien, III., Lothringerstr. 20.

Redaktoro: D^{ro} Emil Pfeffer.

Nur rekte, kuraĝe kaj ne flankigante!

Legeble skribitaj manuskriptoj por la redakcio estu transdonataj en la kongresejo al la ĉefsekretario.

Numero 2.

Wien-Vieno, ĵaŭdo, 7. Aŭgusto 1924.

Aperas ĉiutage.

„Ni konstante ripetadis, ke ni tute ne deziras nin enmiksi en la internan vivon de la gentoj, sed ni deziras nur krei ligantan ponton inter la gentoj. La devizo de la idealaj Esperantistoj, neniam ĝis nun precise formulita, sed ĉiam klare sentata, estas: Ni deziras krei neŭtralan fundamenton, sur kiu la diversaj homaj gentoj povus pace kaj frate interkomunikiĝadi, ne altrudante al si reciproke siajn gentajn apartaĵojn.“

D-ro L. L. Zamenhof.

Kion prezentos la Kongrestagoj?

La Loka Komitato, organizinta la XVI^{an}, estis gvidata antaŭ ĉio de la intenco, ke tiu granda kongreso vere meritu sian nomon, same per la amplekso de ĝia plenumitaj laboroj, kiel ankaŭ per la varieco de la distroj, prezentitaj al la tutmonda samideano. Por ambaŭ flankoj de la nomita programo donas Vieno kiel urbo la plej konforman medion.

Vieno, jam de pluraj jaroj kuŝanta flanke de grandaj politikaj okazaĵoj, ne plu scenejo de politikistaj konferencoj kaj mond-historiaj decidoj, ne plu centro de bataloj kaj interpuŝiĝoj de naciaj pasioj, ĝojas esti elektita de nia vere pacema kaj vere internacia movado kiel la loko de la Konsiliĝoj.

Sed ankaŭ la kongresanaro povos baldaŭ rimarki, ke ili havas ĉiujn kaŭzojn, por esti kontentaj pro sia elekto. Oni devas preskaŭ miri, ke la ekkono pri la eminenta taŭgeco de Vieno por loko de internaciaj kongresoj kaj interkonsiliĝoj ne estis ĝis nun pli ĝenerale disvastigita. La bonega geografia situo de Vieno ĉe la grandaj transeŭropaj trafikvojoj, la aparta ĉarmo de tiu ĉi kunligo de grandurbo kaj urbo por turistoj, pro la situo ĉe la piedo de Alpoj, la ravanta pejzaĝa bildo de ĉi urbo kaj ĝia ĉirkaŭregiono, la somera beleco de ĝiaj bone flegataj parkoj, la pacemeco kaj nacia senpasienco de ĝiaj loĝantoj — jen kio kaj ankoraŭ multo alia nepre faras Vienon la plej taŭga kongresurbo.

La aranĝo de la XVI^a estas alia ol la ĝis nun kutima; la sukceso aŭ malsukceso decidis, ĉu tia aranĝo estos ankoraŭ estonte rekomendinda aŭ ne. Jam la unuaj sciigoj de la Loka Kongresa Komitato al la partoprenantoj en ĉi tiu kongreso informis pri kunmeto de la seriozaj kongreslaboroj en la unuan parton de la Kongres-semajno, antaŭ la solena manifestacia festkunveno dimanĉe, kiu havos la karakteron de la ĝisnunaj malfermaj kunsidoj. La sekvontaj ĝin tagoj donos multspecajn okazaĵojn, post la daŭrigaj kongreskunsidoj antaŭtagmezaj, amuziĝi kaj agrable interfratiĝi kelkloke. La tagordo de la labora kaj de la solena Kongres-partoj kaj la programo de promenoj, ekskursoj kaj amuzoj detale estas prezentitaj en la Kongres-kaj Gvidlibro; sed nur por la plej gravaj aranĝoj la horo jam estas antaŭfiksita en ili; pri la lokoj, tagoj kaj horoj de la ceteraj same kiel de la 24 fakaj konferencoj dumkongresaj informos precize, krom aldono en la Kongreslibro por la laste nomitaj, la ĉiutagaj antaŭsciigoj en ĉi tiu Kongres-Bulteno.

Do, nunmomente estu menciataj ĉi tie krom la jam citita solena manifestacia kunsido en la belega plej granda salono de la Kongresejo la saman tagon (dimanĉo) vespere granda koncerto, kiu prezentos karakterize la ĉarman Wien'an muzikon per ludataj de tre bona orkestro muzikaĵoj de Beethoven, Schubert, Strauss kaj aliaj majstroj de muzikarto vivintaj kaj verkintaj en Wien kaj famaj sur la tuta civilizita tero, plue post ĝi kiel jam dum la antaŭaj vesperoj, spritaj, bonhumoraj prezentadoj de internacia kabaredo.

Lunde kaj marde vespere okazos en la proksima al la Kongresejo Wiener Bürgertheater la festaj prezentadoj de la tre ŝatinda sorĉfabela komedio de Ferdinando Raimund, poeta dramverkisto kaj aktoro, kiu vivis dum la komenco de la pasinta centjaro kaj scipovis kvazaŭ speguli en siaj plej konataj dramoj ĉiujn ecojn moralajn kaj sociajn karakterizajn al la Aŭstruja kaj speciale la Wien'a popolo, tiel, ke unu el tiuj liaj verkoj pli bone kaj rapide informas fremdlandanojn pri la etiko kaj pensmaniero de tiu popolo ol longedaŭra restado inter ĝi. Geaktoroj el la ĉefaj Wien'aj teatroj, Burgtheater (Ŝtata Teatro) kaj Deutsches Volkstheater (Teatro de la germana popolo)

kaj la certe bone primemorataj de la Nürnbergaj Kongresanoj Ges^{oj} Starke el la tiea teatro ludos la ĉefajn rolojn en tiu teatraĵo, kies muzika akompano kaj kantoj donas al ĝi apartan ĉarmon. Espereble, tiu dramo kun etika tendenco akiros la plaĉon de la tutmonda aŭdantaro kaj estos unu el la plej ravaj memoraĵoj pri la nunjara Kongreso.

Post la ferma Kongres-kunsido merkrede antaŭtagmeze la vespera granda ĝarden-festo sur la teritorio de la Wienera kvazaŭ mezurba naturparko Prater donos agrablan finon al la kongrestagoj en Wien.

Dum la 14^a de Aŭgusto la bone preparita ekskurso per fervojo en la Stirian Alpregionon de Semmering kolektos ankoraŭ grandan parton de la gastoj kun la Wienera samideanoj por amika, ĝoj- kaj ĝuplena kunesto kaj tiam la Kongresanaro de Wien disfalos en siajn „erojn“; la eksterlandaj hejmen kunportos impreson de agrable travivitaj en la plej simpatia societo tagoj kaj la Aŭstrujaj hejmen iros kun la certeco, ke de nun ili ĉie sur la tero havas, spite la multajn land- kaj marlimojn, fidelajn karajn personajn amikojn, dank' al la genia interfratigilo: la neŭtrala Zamenhofa lingvo internacia Esperanto.

Ne forgesitaj estu ĉi tie ankaŭ la loka historia por Wien festo de solena malkovro de memortabulo por nia Majstro sur muro de la domo, en kiu li loĝis dum restado pro studoj en Wien dum la 1889^a (sabate je la 15^a) kaj la aranĝoj de grupaj promenoj tra la urbo kaj vizitadoj de ĝiaj vidindaĵoj, dum kiuj Wienera samideanoj donos la dezirindajn klarigojn, la rondveturoj en specialaj luksaj vagonaroj de la Urba Elektra Tramvojo kaj tiu sur speciala ŝipo tra la kanalo de Danubo kaj sur tiu riverego mem. ekskursoj Schönbrunn'on kun ĝia belega rokokostila grandega parko kaj ĝia bestoĝardeno kaj al Kobenzl kun ĝia mirinda ĉirkaŭvidejo super Wien kaj vasta ĝia ĉirkaŭo de fruktoportaj kampoj kaj vinberĝardenoj kaj de arbaroj sur pli malpli proksimaj kaj altaj montoj ĝis la Alpoj. La Loka Kongresa Komitato esperas, ke eĉ post jaroj ĉiu partopreninto kaj partoprenintino en la XVI^a diros gajmemore: Belaj estis la tagoj en Wien!


TUTMONDA VOJAĜOFICEJO
THOS. COOK & SON
Wien, I., Stefansplatz 2

vendas veturbiletojn por fervojo kaj vaporŝipo al ĉiuj landoj de la tero, lokojn en litvagonoj, ŝanĝas monon, havigas biletojn por rondveturadoj en la urbo, asekuron de vojaĝpakaĵoj, loĝejon en hotelo, gvidlibrojn por vojaĝoj ktp.


==== Informoj senpage. ====

BILDOJ EL VIENO


el Lechner'a Albumo de Vieno, eldonita de la Universitata Librejo R. Lechner (Vilh. Müller),
Wien, I., Graben 31.




La placo „Albrecht“
Albrechtsplatz — La Place „Albrecht“ — The Square „Albrecht“



La Monumento de Johann Strauss
Johann Strauss-Denkmal — Le Monument de Johann Strauss — The Monument of Johana Strauss



La popolĝardeno kaj la ŝtataj muzeoj
Volksgarten und die Staatsmuseen — Le jardin public et les musées de l'état — Public Garden



La fontano „Mozart“
Mozartbrunnen — La Fontaine „Mozart“ — The Fountain „Mozart“

Kongresa Bulteno



Oficiala Organo de la XVI^a Universala Kongreso de Esperanto Wien-Vieno 1924

Redakcio: Koncert-Palaco, Wien, III., Lothringerstr. 20.

Redaktoro: D^{ro} Emil Pfeffer.

Nur rekte, kuraĝe kaj ne flankigante!

Legeble skribitaj manuskriptoj por la redakcio estu transdonataj en la kongresejo al la ĉefsekretario.

Numero 3.

Wien-Vieno, vendredo, 8. Aŭgusto 1924.

Aperas ĉiutage.


„Ĉiam pli kaj pli, komencante de aferoj bagatelaj kaj transirante al aferoj plej gravaj, komencante de aferoj pure materialaj kaj transirante al ĉiuj flankoj de la homa spirito kaj moralo, oni proponados al ni diversajn rimedojn, kiuj servas al la fratigado de la homoj kaj al la rompadado de la muroj inter la gentoj — kaj ĉion tion ĉi ni povos prijuĝi, akcepti aŭ ne akcepti, sed ni neniam devos ĝin blinde forĵeti antaŭe. Ĉar ĉio, kio servas al la fratigado de la gentoj kaj al la rompadado de la malamikaj muroj inter la popoloj — se ĝi nur ne enmiksas sin en la internan vivon de la gentoj — apartenas al la verda standardo“.

D-ro L. L. Zamenhof.

turas en la stratfoson, de ĉambrislino, kiu la dekstran ŝuon kunlaĉas sur la maldekstra piedo. Ĉe tio disponas ĝuste la germanoj pri la plej bonaj intelektaj helpfortoj, pri la plej lertaj spiritaj meliistoj, pri la plej eminentaj disvastigantoj de l' lerneja scio. Neniu alia nacio ol la germana kalkulas tiom da konantoj de fremdaj lingvoj

ŝajnas — pli interpretisto de la sentimentoj, regantaj ekster la kadroj de l'intertraktado. Li tradukis ne la sonon, kiun trinkis lia orelo, sed la sentimenton, kiun li alportis kun si.

La germana poeto Grillparzer diris pri la germanoj, ke ili estas nefeliĉa popolo, ĉar ili havas la fantazion tie, kien ĝi ne apartenas. La interpretisto devas la pensojn de unu popolo enporti en la sonformaĵojn de la alia kaj li — por tiel diri — kunŝovas la spiritajn seĝojn al si reciproke. Sed la germana interpretisto ne povis sian romantikecon de la sentoj lasi hejme. Li havis la stelplenan ĉielon de la Kant'a ideo super si kaj la moralan leĝon de naciaj politikistoj en si kaj eble tial oni ne povis interkompreniĝi, ĉar la germana interpretisto estis tro profunda . . .



L. N. TOLSTOJ. Granda amiko kaj pioniro de Esperanto en Rusujo, la plej legata moderna verkisto, kies verkoj estas tradukitaj en pli ol 70 lingvojn: Anna Karenina, Edziĝo pro amo, Kio estas religio, Milito kaj prudento, Moderna sklaveco ktp. — Busto de Trubeckoj. — Vidu la noteton en la hodiaŭa kroniko.



en siaj vicoj. Tio estas almenaŭ la maliceco de l' objekto, ke la interpretisto, kiu devis konstrui la plej primitivan ponton de interkompreniĝo, ne alkreskis al la alteco de sia tasko. Oni ne devas tiel senpripense tuj forpuŝi de si la suspekton, ke la interna kontraŭstaro kaj opozicio de la naciistoj kontraŭ la rekonstruo de Eŭropo subite eksplodas en neartikulitaj sonoj kaj falskomprenoj. La interpretisto, kiun la germanoj venigis al Londono estis — kiel



Kanto de l' laboro.

(Dediĉita al la fratoj laboristoj kunvenintaj por la XVI-a.)

Eksonu kant' pri l' fianĉin',
Unua homa amikin',
Valora pli ol or'.
Riĉaĵo ĉia en la mond'
Elfluas el ĉi tiu font':
Glor' al labor'!

Kiam ankoraŭ kiel best'
La hom' en praarbara nest'
Sin kaŝis kun angor',
Kiel li venis al la pan'?
Nur per laboro de la man'!
Glor' al labor'!

Kaj kiel Galilei jam
Vokis al tuta mond' kun flam':
La mond' sin movas for!
Vi voku: Per laboro, jes,
La mond' sin movas en progres'!
Glor' al labor'! M. Polland.



La interpretisto.

En la hodiaŭa „Stunde“ („Horo“), tre populara Viena ĵurnalo, aperis, videble sub la influo de nia Kongreso, ĉi-suba ĉefartikolo, kiu estas denove frapanta pruvo por la urĝa neceseco de Esperanto en internaciaj kaj interŝtataj rilatoj. Ĝi montras evidente, kiel ĉiu prokrasto en la ĝenerala kaj oficiala akcepto de nia lingvo flanke de la registaroj suferigas kaj sin venĝas sur la popoloj, al kiuj la solvo de la problemo de lingvo internacia sin trudas nun kun elementa nepreco. La Red.

La Londona Konferenco devis marde por kelkaj horoj esti interrompita. La interpretisto, kiun la germana delegitaro kun si havis, tradukis la germanan respondnoton tiel neprecize, tiel kontraŭ la spirito kaj kontraŭ la literoj, ke la francoj kaj angloj ŝanceliĝis inter ekmiro kaj indigno. Por ke la pordo de intertraktado ne estu tro frue kun krako fermita, deklaris la germana delegitaro sian pretecon prezenti siajn ellaboraĵojn skribe. Por povi ilin prepari, devis la tuta Konferenco esti je kelkaj horoj prokrasita, la bona agordo disvaporigis, la temperaturo de la sentimentoj falis je kelkaj gradoj kaj de la lipoj de profesiaj diplomatoj fluus mokanta rideto.

Interpretisto, kiu tradukas malbone, estas spirita parenco de lakeo, kiu la vinon anstataŭ en la glason verŝas sur la buston de la ĉetoble sidantaj sinjorinoj, de droŝkisto, kiu anslataŭ veturi sur la strato ve-

TUTMONDA VOJAĜOFICEJO
THOS. COOK & SON
Wien, I., Stefansplatz 2

vendas veturbiletojn por fervojo kaj vaporŝipo al ĉiuj landoj de la tero, lokojn en litvagonoj, ŝanĝas monon, havigas biletojn por rondveturadoj en la urbo, asekuron de vojaĝpakaĵoj, loĝejon en hotelo, gvidlibrojn por vojaĝoj ktp.
==== Informoj senpage. ====

BILDOJ EL VIENO

el Lechner'a Albumo de Vieno, eldonita de la Universitata Librejo R. Lechner (Vilh. Müller),
Wien, I., Graben 31.



La kortega palaco
Hofburg — Le palais Impérial — The Imperial Palace



La regado sur maro
Die Macht zur See — La Domination sur mer —
The Naval Power



La regado sur tero
Die Macht zu Lande — La Domination sur terre —
The Military Power

Burggarten

(Kastelgardeno) ĉiutage je la 8^a vespere (se pluvas en la festsalono de Hofburg)
Sinfoniokonzertoj — Operoj — Kabaredoj.
 Ludas la Viena Sinfonio-orkestro.
 Vendado de kartoj en koncert-direktejo Vindobona, Karlsplatz, vendejhalo, aŭ en Burggarten.

Bonega tagmanĝo

en la komunaj manĝejoj de **Mittella-A. G.**

Malfermaj dum labortagoj:

I. Himmelfortgasse 8. — I. Ballhausplatz 1 (Hofburg). — I. Postgasse 9 (alte Postsparkasse). — I. Liebiggasse 6 (altes Korpskommandogebäude). — I. Nibelungengasse 10. — I. Schillerplatz 4. — III. Landstrasser Hauptstrasse 146. — VI. Mariahilferstrasse 88a (Zitahof, I. Stock). — VII. Kirchengasse 13. — VIII. Josefstädterstrasse 43. — IX. Porzellangasse 33.

Malfermaj ankaŭ dum dimanĉoj kaj festotagoj:
 I. Schillerplatz 4. — VIII. Josefstädterstrasse 43.

Sinanonco ĉe la kuirejestroj!

Neniu trinkmono. Neniu alkoholo.
 Manĝtempo 12^a-3^a, dum dimanĉoj kaj festotagoj 12^a-2^a.

Manĝaĵoj povas esti ankaŭ forportataj.

Prezoj en abono:

A-menuo:
 K 4000 (Supo, legomo kun aldonajo, farunajo.)
B-menuo:
 K 8000 (Supo, viando kun aldonajo, farunajo.)
C-menuo:
 K 11.000 (Supo, viando kun aldonajo, farunajo.)
D-menuo:
 K 13.500 (Supo, restaĵo kun aldonajo, farunajo.)
 Alpago por unuopaj manĝkartoj: por A-menuo K 500, por B-, C- kaj D-menuoj K 1000.
 Dimanĉa menuo K 15.000.

Krome apartaj manĝaĵoj en granda elekto kaj je malgrandaj prezoj.

Opero-Restoracio kaj -Kafejo

Wien, I., Operngasse 8
 kontraŭ la Ŝtata Operejo.

Menuoj laŭ fiksjaj prezoj kaj laŭ la manĝaĵoj-listo.

Esperanto-Literaturo

ĉiuspeca el nia eldonejo estas havebla en granda sortimento en la **Kongresa Librejo.**

Precipe ni atentigas pri niaj kolektoj

Esperanta Biblioteko Internacia

Nova Esperanto-Biblioteko

kaj pri nia gazeto

Germana Esperantisto

(Specimenaj numeroj en la Kongresa Librejo)

Esperanto-Verlag Ellersiek & Borel G. m. b. H.

Berlin kaj Dresden.

Aŭstruja Akcia Societo por Aeroplanvojaĝoj

Ĉiutagaj Flugoj de

Prezoj de flugo:

| | | | |
|------|--------------|------------|-----------|
| | München'on | Aŭstr. Koj | 900.000 |
| | Nürnberg'on | " " | 1.350.000 |
| | Frankfurt'on | " " | 1.950.000 |
| Wien | Zürich'on | " " | 1.760.000 |
| | Genève'on | " " | 2.350.000 |
| | Budapest'on | " " | 400.000 |

Rondflugoj super Wien kaj la Wien'a Arbaro

(Daŭro proks. 20 minutoj) Prezo Aŭstr. Koj 150.000 por unu persono

En Junkers plenmetalaj Limuzinoj

Flugbiletoj kaj informoj en „Oesterreichisches Verkehrsbureau“, Wien I, Friedrichstrasse 1
 Telephon 52-5 90

Fabriko de Fortepianoj Pallik kaj Stiasny

Wien, VII., Neubaugasse 68.

Telefono 52-4-59, 34-5-15.

Pianinoj, koncert-fortepianoj kun angla aŭ Wien'a mekaniko, bonega kvalito.

Fondita 1894.

Honora Diplomo Jubilea Ekspozicio 1898.

(Aŭstria oficejo por trafiko) Oesterreichisches Verkehrsbureau

Centro Wien, I., Friedrichstrasse Nr. 1

(kontraŭe de Sezession)

Telefono: 52-5-90 Serie. Telegramadreso: Austriaverkehr.

Filioj kaj reprezentantoj en- kaj eksterlande entreprenoj por ŝipaj kaj aeroplanaj veturadoj. — Ŝipkomunikoj al ĉiuj gravaj havenoj. — Propra banko. — Societaj kaj aŭtomobilaj vojaĝoj. — Informoj pri ĉiuj vojaĝ-aferoj.

De la 7^a Aŭgusto propra servado en Konzerthaus (Kongresejo).

Anglo-Austrian Bank Limited

London, 24, Lombard Street, E. C. 3
 Vienna Representation I. Strauchgasse 1

Capital Authorized . £ 2,000,000
 Capital Issued 1,406,370
 Reserves 375,156

Telegrams: Anglobank Vienna — Telephone: 63570

21 monsaĝejoj en Vieno

Sidlokoj:

Aŭstrujo: Baden ap. Wien, Bregenz, Gmünd, Graz, Graz-Hauptbahnh. (ĉefa stacidomo), Innsbruck, Krems, Laa a. Th., Linz, Mariazell, Semmering, St. Pölten, Villach, Villach-Bahnhof (stacidomo), kaj Velden ĉe Wörthersee, Wels, Wiener Neustadt. — Jugoslavio: Maribor. — Hungarujo: Budapeŝto, monsaĝejoj: Calvinplaco kaj Elisabethring. — Italujo: Trieste. — Rumanujo: Czernowitz, Grosswardein.
 Ĉiubankaj transakcioj estas efektivegataj

VIAN VOJAĜPAKAĴON

asekuras kun la plej favoraj kondiĉoj
„DER ANKER“
 ĝenerala Akcia Societo por Asekuroj
 Wien, I., Hoher Markt 10/11 Tel. 66-5 55 Serie.

Vojaĝoficejo „Klea“

Wien, VI., Mariahilferstrasse 85/87
 (en la komercejo „Klea“)

— Tel. 54-27 kaj 64-72. —

Veturbiletoj laŭ ĉiu direkto de en- kaj eksterlando, veturbiletoj por ĉiuj vaporsiplinioj, asekuro de pakajoj ktp.

Seninterrompa servo (ankaŭ sabate) de la 9^a ĝis la 17^a

Restoracio Francisko Falk

„ZUM STADTPARK“

I. Kolowratring 1, apud la Urba Parko,
 nur unu minuto de la Kongresejo „Konzerthaus“, rekomendas al la kongresanoj sian bonegan manĝotablon tagmezan kaj vesperan. Moderaj prezoj kaj bona servado, distingita biero kaj bonaj vinoj.



Laŭda Kanto

pri

Farina „Gegenüber“

dem Jülichplatz (kontraŭ Jülichplaco)

La plej Malnova kaj la plej Bona
KOLNA PARFUMAKVO

== Grandaj Vendoj ==
 Favorprezoj de Objektoj
 Mastrumaj kaj Vestaj

Ŝtata A. G. Zentralpalast

VII., Mariahilferstrasse
 Ecke Kaiserstrasse.

Kongresosa Bulteno



Oficiala Organo de la XVI^a Universala Kongreso de Esperanto Wien-Vieno 1924

Redakcio: Koncert-Palaco, Wien, III., Lothringerstr. 20.

Redaktoro: D^{ro} Emil Pfeffer.

Nur rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante!

Legeble skribitaj manuskriptoj por la redakcio estu transdonataj en la kongresejo al la ĉefsekretario.

Numero 4.

Wien-Vieno, sabato, 9. Aŭgusto 1924.

Aperas ĉiutage.

„Ni komencu la grandan feston, por kiu ni ĉiuj kunvenis el la diversaj landoj de la mondo; ni ĝoje pasigu nian grandan ĉiujaran semajnon de la pure homara festo. Ni memoru pri tio, ke niaj kongresoj estas ekzercanta kaj edukanta antaŭparolo por la historio de la estonta interfratigita homaro. Por ni estas gravaj ne iaj bagatelaj eksteraj detalaĵoj de nia lingvo, sed ĝia esenco, ĝia ideo kaj celo, tial ni antaŭ ĉio devas zorgi pri ĝia seninterrompa vivado, pri ĝia senhalta kreskado. Granda estas la diferenco inter homo-infano kaj homo-viro; granda eble estos la diferenco inter la nuna Esperanto kaj la evoluciinta Esperanto de post multaj jarcentoj; sed dank’ al nia diligenta gardado la lingvo fortike vivos, ĝia spirito fortiĝos, ĝia celo estos atingita, kaj niaj nepoj benos nian paciencon.“

D-ro L. L. Zamenhof.

Evoluo aŭ stagnacio?

La timo pro novaj vortoj.

de Prof. P. Christaller, Stuttgart.

Multaj esperantistoj timas pro novaj vortoj. Unu el ili en Esperanto Triumfonta (No. 155) kondamnas ĉiun, kiu kreas novan vorton, kaj eĉ nomas lin malamiko kaj perfidulo de nia lingvo. La fervora bonulo, laŭ sia nescio, ne pripensis, ke li kondamnis personojn, kiuj tre, tre multon faris por nia afero, ekz-e rektoron Boirac, la multjaran prezidanton de la Lingva komitato, d-ron K. Bein, la eminentan verkiston. La kritikinto proponas, ke oni havu en vortaroj nur la oficialigitajn vortojn kaj tiujn, kiujn nia majstro krome uzis. Nu, ĉar tiu dua fonto ne plu funkcias, ni do havu lingvon ŝtonigantan, tio estus morto de nia lingvo. Mortintaj lingvoj estas ili, kiuj ne plu evoluas. S^{ro} B., la kritikinto, ŝajne ne scias, ke nia majstro en ĉiu grandeta verkaĵo aŭ tradukaĵo uzis novajn vortojn, kaj ke li iam skribis: „ne miru, ke en miaj tradukoj de la klasikaj verkoj vi trovos infoje lokon, kiu en la unua momento ŝajnos al vi ne tute klara. Se mi volus doni nur tradukojn kun tute populara stilo, tiam mi devus: a) elekti por traduko nur verkojn popularajn, b) ĉiujn ne perfekte kompreneblajn aŭ ne facile tradukeblajn frazojn tute eljeti, aŭ traduki ilin libere laŭ mia plaĉo. Tia maniero de agado estus por mi tre oportuna kaj postulata de mi multe malpli da tempo, ol mia nuna maniero de tradukado, kiu ofte devigas min longe mediti pri tiu aŭ alia esprimo aŭ frazo. Sed kvankam la ŝajna valoro de miaj tradukoj tiam multe pligrandiĝus, ilia efektiva valoro malgrandiĝus, ĉar: 1) nia literaturo konsistus tiam nur el verkoj-malgravaj; 2) la tradukoj estus ne fidindaj kaj donus mal-

ĝustan kopion de la tradukita verko; 3) nia lingvo ne riĉiĝus kaj ne disvolviĝus. Precipe pri tiu ĉi tria punkto mi volus atentigi niajn verkistojn: estas tre dezirinde, ke ni ne evitu malfacilajn tradukojn, sed kontraŭe ke ni ilin serĉu kaj venku, ĉar nur tiamaniere nia lingvo plene ellaboriĝos. Naciajn idiotismojn, kiuj ne prezentas necesajn, ni devas kompreneble eviti kaj ni devas peni traduki ilian sencin en maniero plej logika kaj internacia; sed tiajn esprimojn, kiujn ĉiu lingvo nepre devas posedi, ni devas peni en tiu aŭ alia maniero nepre traduki, sed ne simple eviti ilin, pro timo, ke nia esprimo eble ne plaĉos al la legantoj aŭ ne ĉiuj ĝin tuj bone komprenos. Unu el la plej ĉefaj taskoj de niaj verkistoj devas esti la ellaborado de la lingvo: tial, se ia esprimo, kiun ne ĉiuj tuj komprenas (ekzemple „elrigardi“, subaĉeti“ ktp.), ŝajnas al ili nebona, ili devas peni anstataŭigi ĝin per esprimo pli bona: sed se ili, por ne malbeligi sian stilon, simple evitos tiujn frazojn, ili faros al nia lingvo tre malbonan servon. Kompreneble, en ĉi tio, kiel en ĉio alia, devas esti observata la deca mezuro. Ne tro krude, ne tro multe per unu fojo! Novaj esprimoj devas esti enkondukataj, nur iom post iom, nerimarkeble. Krom tio ni devas memori, ke nia lingvo devas servi ne sole por dokumentoj kaj kontraktoj, sed ankaŭ por la vivo; tial ofte (precipe en vivaj dramoj) pli bona estas frazo ne tute logika kaj ne perfekte preciza, sed mallonga kaj viva, ol frazo perfekte preciza, sed enuiga peza kaj tre kabineta.“ (La Revuo, vol. 2 a pĝ. 95, komparu ankaŭ Lippmann, Lingvaj Respondoj de D^{ro} Zamenhof, n-o 102.)

S^{ro} B. eble neniam verkis krom privatajn leterojn aŭ similaĵojn, alie li parolus alimaniere. Estas ja facile, nenion fari krom kritiki la farantojn. Kion li farus, se li devus ion skribi pri zoologia temo, se li ne havas vortojn kiel „mandrelo, pumo, tapiro; marabuto alcedo, ortolano“? en alia verkaĵo li verŝajne ne rajtus uzi „Islando, Irlando, flandro, svedo, dano, norvego, kafro“, ĉar ili ne estas oficialaj, kaj ĉu la majstro en iu presitaĵo uzis tiujn esprimojn mi ne certe scias kaj verŝajne ankaŭ s^{ro} B. ne scias. Mi citas kelkajn pliajn vortojn, malpermesatajn laŭ s^{ro} B.: epilobio, latiro, origano, sikomoro; diorito, radiumo, sienito; anodo, ergo, omo, pilo, relajso, kapacito, tensio; lenso, panto-grafo, periskopo, teodolito; integralo, kvadranto; izobaro, perigeo, Uranuso; fetio, rektumo, kondilo ktp. Por „abako“ li ekzemple ĉiam devus diri „surkapitela tabulo“! En E. Triumfonta n-ro 152 iu kontraŭis la vorton „vando“, li diris, ke „muro“ sufiĉas, ke se necese, oni aldonu „ligna“ aŭ „masonita“. Sed kion li aldonos, kiam li parolas pri vandeto, kiu disigas en iaj semoj la unuopajn kernojn aŭ grajnoj? Eble haŭta mureto? Mi ridas kaj preferas Esperanto-mortigan „vando“. Kompreneble apud tiu vorto ankoraŭ „septo, pario, parieto“, kiujn oni trovas, ŝajnas al mi superflujaj, tamen mi volonte akceptas „pario“ — laŭ Verax — en la senso de surfaco de vando (germane Wandung, Wandfläche).

Ke en vortaroj estas ankaŭ vortoj ne-oficialaj aŭ ne uzitaj de Zamenhof, tion mi juĝas eĉ necesa, ĉar la „epidemio“ ekzistas, oni do devas kalkuli

kun ĝi. Nu, en tia kazo, ĉu ne estas pli bone, ke oni trovas en vortaro la vortojn, kiujn jam uzis verkistoj, ol ke ĉiu ĉerpos vorton laŭ sia plaĉo, ne sciante, ke iu alia jam uzis formon pli taŭgan por tiu sama ideo. Certe! estas eĉ devo de vortaristo, konigi la jam uzitajn vortojn ne oficialajn. Nur li nepre montru per iu signo, ke la rilata vorto ne estas oficiala. Tiam ĉiu timulo povas eviti ĝin aŭ per suba rimarko klarigi la esprimon.

Multaj opinias, ke nur la Lingva Komitato proponu novajn vortojn, aŭ — laŭ E. T. 152 — ke la verkistoj demandu ĉe la L. K., ĉu ili rajtas uzi tiun aŭ tiun vorton. Tio estus volapŭka maniero, laŭ kiu la aŭtoro pri ĉio decidis. Zamenhof saĝe lasis liberon al la vivo, eĉ — kiel supre citite — li instigis la laborantojn por la lingvo, ke ili helpu ĝin evoluigi. Kia malhelpo estus por verkisto, se li, ekzemple pri radio-telefonio volas ion skribi per gazeto! Skribinte la artikolon, li devus zorgi kompari, kiuj vortoj estas oficialaj aŭ Zamenhofaj, poste li devus sendi la liston de la ne-aprobitaj vortoj al Parizo, de tie oni sendus la liston, eble post kelka tempo — por kunigi la liston kun aliaj similaj, kaj por ŝpari sendkoston — al ĉiuj L. K. anoj, ili voĉ-donus, kaj post unu-du-tri monatoj la verkisto ricevus sciigon pri la rezulto. Tia procedo estus kateno por nia lingvo. La L. K. principe ĝis nun ne proponis ion novan, ĝi nur „kontrolas“, ĝi laŭ bontrovo enlistigas vortojn ofte trovitajn en la Esperanto-literaturo kaj sendas la liston al siaj anoj, ke ili juĝu, ĉu oficialigo estas konsilinda. Oni povas bedaŭri tiun farmanieron (mi mem dezirus iom plian iniciatemon), tamen ĝi havas ankaŭ valoron kaj la lingvo certe ne disfalis, eĉ kiam multaj novaj vortoj serĉas eniron. La uzo de tia vorto tute ne estas enigo en la lingvon, ĉar la lingvo vivas kiel iu nacia, kaj la inertemo de la amaso ne facile akceptas la novaĵon. Mi nur citu du ekzemplojn: Zamenhof ofte uzis la vorton „aflikti“, kiu estas tute samsenca kun „ĉagreni“. Mi ne scias la kaŭzon, la nova vorto ne estas pli mallonga, la ideo ankaŭ ne estas tiom ofte bezonata, ke dua esprimo estas dezirinda; eble li estis influata de la deziro de kelkaj, iom malmultigi la ĉepelitajn literojn, kaj li eble kredis, ke la nova vorto forpuŝos iom post iom la malnovan, kaj tiu ĉi fariĝos arkaismo. En la tria aldono al la universala vortaro la vorto „aflikti“ estas akceptita, tamen oni tre malofte renkontas en la nuna literaturo tiun vorton. La „popolo“ ĝin ne akceptas. Simile: laŭ permeso de la L. K. oni rajtas ĉe la adverbaj -aŭ-vortoj uzi la paralelan formon kun -e, kio allasus la pli mallongajn kaj pli belajn formojn „hiera, morga, adii“ ktp. anstataŭ „morgaŭa, adiaŭi“ ktp.; tamen oni preskaŭ neniam vidas la novan formon, kaj mi estas certa, ke uzanto de ili estus riproĉata de s-ro B. kaj kunuloj.

Parolante pri la stelumitaj vortoj en mia vortaro german-esperanta, eldonita en 1923 de Ellersiek kaj Borel, kaj en la sam-ampleksa vortaro esperanto-germana, kies manuskripto nun estas finita, mi certigas, ke tre, tre malmultaj el tiuj vortoj estas novaj, t. e. ne jam ie uzitaj. La plej multaj estas ĉerpitaj el la novaj literaturajoj de nia lingvo. Ili estas enmetitaj, eĉ kiam tiu aŭ tiu el ili tute ne

TUTMONDA VOJAĜOFICEJO
THOS. COOK & SON
Wien, I., Stefansplatz 2

vendas veturbiletojn por fervojo kaj vaporŝipo al ĉiuj landoj de la tero, lokojn en litvagonoj, ŝanĝas monon, havigas biletojn por rondveturadoj en la urbo, asekuron de vojaĝpakaĵoj, loĝejon en hotelo, gvidlibrojn por vojaĝoj ktp.

==== Informoj senpage. ====

plaaas al mi; en tia okazo mi metis angulajn krampojn, eĉ kiam la vorto jam estas uzita de Zamenhof (ekz-e la vorto mnemoniko), sed ofte mi ankaŭ forlasis tiajn krampojn — kaj tio ankaŭ jam estas riproĉita — ĉar mi timas tro multe trudi mian personan preferon, mi volonte lasas al la vivo la decidon, ĉu iu vorto estas taŭga aŭ ne. Bedaŭrinde ja ofte la vivo decidis pri iu stranga formo, ekzemple en la germana lingvo ĝi estigis la vorton „Frauenzimmer“ (virin-ĉambro) por „ino“, aŭ „Geizhals“ (avarema kolo) por „avarulo“, aŭ „Junggeselle“ (jun-ulo), kiu povas esti okdek-jara, por „fraŭlo“. Mi esperas, ke tiaj ridindaĵoj, kiuj certe en ĉiu nacia lingvo ekzistas, ne enigos en Esperanton, se tamen tiaj enigos, tiam nia lingvo ankaŭ en tio montras, ke ĝi estas viva, kaj Zamenhof ja ankaŭ ne timis la jamajn esperantismojn.

Certe ĉiu nova vorto pliriĉigas nian vortaron, kaj posedo de la tuta vortaro fariĝas neeblaĵo por la esperantisto. Sed ĉu tio ne okazas en ĉiu lingvo? ĉu la plej scia spertulo en iu scienca fakoj konas ĉiujn vortojn de iu alia scienco? ekz-e ĉu filozofo konas ĉiujn zoologiajn nomojn? mi certe kredas ke ne, nek ke iu multescia scienculo konas la tutan terminaron de masonisto aŭ teksisto.

Do, la „epidemie“ uzi novajn vortojn, ekzistas, kaj mi volonte kredas, ke multaj esprimoj estas uzataj de personoj, kiuj ne sufiĉe konas la jaman vort-trezoron de nia lingvo, estas certe konsilinde, ke oni unue volu ĉerpi el la jam ekzistantaj, tamen, kiam la serĉata esprimo estas tro longa, aŭ ankaŭ ne tuj klara, tiam nova, t. e. el naciaj lingvoj ĉerpita vorto estas preferinda. La krioj kontraŭ la epidemie ja havas sian bonon, tamen ili, espereble, ne detenas la laborantojn en nia afero sekvi al sia interna devigo labori por nia lingvo. Kiel ĉiu nacia lingvo konstante riĉiĝas per la postuloj de la pulsanta vivo — antaŭ cent jaroj oni ekz-e ne konis la ideon de „striko“ — tiel ankaŭ Esperanto devas riĉiĝi, ĵu pli ĝi penetras en la diversajn fakojn de homa agado, alie ĝi havus lokon apud lingvoj de sovaĝuloj, kiel ekz-e iu azia lingvo por „cerbujo“ akceptis la vorton „pensoj-skatolo“.

Resume: trankviligu ili, kiuj timas difalon kaj pereon de nia lingvo, trovante sur ĉiu paĝo de nova literaturaĵo vorton, kiun ili ankoraŭ ne konas. Certe ne ĉiu nia samideano povas aĉeti la plej

enhavan vortaron esperanto-sialingvan, sed ni ja havas niajn gazetojn, en kiuj oni rajtas demandi pri la signifo de tiu aŭ alia vorto. Niaj redaktoroj certe volonte respondos, kaj per tia kunlaborado la intereso per la gazeto plivigliĝas. Nia lingvo ne havas tiom malfortajn krurojn, ke kelkaj ne-kutimaj vortoj ĝin faligu, pro ili la mondo ne suferos nek nia amata Esperanto.

Diversaj Informoj.

Esperanto ĉe la Viena gazeto. Multaj eksterlandaj samideanoj, konsciaj pri la gravega rolo, kiun ludas la perioda prelo por la antaŭenigo de nia movado, demandis, kiel staras ĉi-rilate la afero en Vieno. Ni povas doni al ili la plej ĝojigan respondon. Nia movado estis en Vieno ĉiam priatentata de la gazetaro, sed nun oni rimarkas, ke la XVI-a trege imponis kaj surprizis la Vienajn ĵurnalistajn sferojn. Ĉiuj ĉefaj gazetoj publikigis kaj konstante publikigis plu varmajn, eĉ entuziasmajn bonven-artikolojn. La hieraŭa „Stunde“ prenis nian kongreson, la senperecon de l' interkomprenigo, kiel okazon, por ekatiki la oficialajn sferojn de Germanujo, kiuj per la „interpretista skandalo“, menciita hieraŭ en nia ĉefartikolo, forte malutilis al sia popolo. Ne estas eble citi ĉiujn el la 18 plej gravaj ĵurnaloj de Vieno — ni diru nur, ke la gazetaro Viena, sen konsidero pri ĝia partia aparteneco, ekkomprenis kaj forte akcentas precipe la politikajn kaj etikajn konsekvencojn de l' Esperantismo; tio estas antaŭ ĉio ĝojiga. En la kongresejo funkcias por la naciilingvaj ĵurnalistoj presinforma oficejo, vige uzata, kaj gvidata nuntempe de la sperta sam. Ullmann. Fine ni menciis, ke ankaŭ redaktoroj kaj korespondantoj de gravaj eksterlandaj ĵurnaloj, venintaj al la XVI-a kun kritikema scivolemo, jam konvertiĝis sub la influo de tiu impresanta spektaklo, kiun prezentas la anoj de 43 nacioj, en frata solidareco interbabilantaj en la Kongresejo. Do ni estu kontentaj, ĉar la tutmonda naciilingva perioda prelo estas la ŝtupetaro por la definitiva triumfo de nia ideo!

Invito al la XVI-a. La Loka Kongresa Komitato ricevis la sekvantan invit-leteron de la Unio de Internaciaj Asocioj (Union des Associations Internationales) en Palais Mondial en Bruselo por la Tutmonda Kongreso de internaciaj organizaĵoj, okazanta la 8-an de septembro:

Sinjoroj! Ni havas la honoron inviti vin al la Konferenco de Internaciaj Asocioj okazanta en Genevo la 8-an de Sept.

Niaj bultenoj informis vin regule pri la aktualeco de novaj laboroj de la asociitaj organizaĵoj pro komuna kunlaboro, komencita en la unua kongreso de Internaciaj Asocioj (Congres Mondial) en 1910, daŭrigita en la kongreso de 1913 kaj 1920 kaj evoluigita en la konferenco de 1921 kaj 1922.

Niaj lastaj bultenoj ankaŭ informis vin pri la peniga sperto, kiu estis okazigita al ni, flanke de la belga gubernemento. Laŭ formala konsento estis permesate al ni,

oceanon en matena lumo, la sentinan, helblue radiantan horizonton, la neĝajn regionojn de Norvegujo, la karnavalon de Nizza kaj li aŭdis subite ĉiujn orkestrojn de Parizo.

Li martelis kaj martelis. Kaj la dekunu horoj pasis efektive.

Francis Rooth estis ankaŭ post la laboro tute sola. Li havis nenian volonton por paroli kaj tion oni klarigis al si kiel arogantan fieracon.

Li parolis kun neniu.

En la tria tago li estis subite vokita supren el la ŝakto. Mister Charles M. E. Chugge atendis lin en la kontoro de la direkcio. Ĉu li ne devas transvestigi? Ne. Des pli bone, Mister M. E. Chugge volas lin vidi ĝuste en la vestaĵo de ministro.

Nur malgrandan memorajon por sia bonfaranto volis Francis Rooth rapide preni el sia loĝejo. Tio estis farita en unu minuto.

Francis Rooth vidis en la kontoro de l' mineja direkcio sian bonfaranton M. E. Chugge je la unua fojo. Ĝi estis senenergia, pala, korpulenta viro, formale kuŝanta en mole remburita seĝo. Lia spongeca vizaĝo ŝajnis dormema. La ŝvelforma mano salutis apatie.

„Volu sidigi, Mister Rooth, kaj rakontu al mi, kiel vi fartas!“

„Dankon, mi preferas stari. Ĉu vi deziras detalan priskribon aŭ nur en ĝeneralaj trajtoj? Ĉu mi devas komenci de la enŝipiĝo?“

La spongeca vizaĝo ridetis apatie. „Sed ne, ne! Kiel vi nun fartas, volu rakonti al mi.“

Francis Rooth jam pli frue antaŭsentis, ke la miliardulo ne demandas lin pri liaj travivaĵoj dum la mondvojaĝo. Pro tio li metis en la poŝon la malgrandan memorajon. Sed pro singardo li demandis ankoraŭ unufoje:

„Ĉu mi rakontu pri Hindujo — pri la nordaj punktoj — pri niaj tigroĉasoj en Bengalio?“

starigi en Bruxelles la „Palais Mondial“ kiel komunajn ejojn de la Asocioj kaj Centro de la Internacia intelekto. Subite oni forprenis de ni la domon, en kiu amasigis niaj kolektaj kaj estis efektivegataj niaj laboroj. La raporto, kiun ni sendas al vi, entenas menciion de historia fakto kaj helpdokumentojn.

Intertempe konstante disvastiĝas tra la tuta mondo la internacia movado pozitiva kaj organizema. Senĉese laboras la asocioj por organizi la internacian vivon kaj por protekti ĝin kontraŭ minacantaj danĝeroj. La kontakto, la interŝanĝo de deziroj, la kooperacio kaj koordinigo estas grave necesaj inter la asocioj kaj inter tiuj, kiuj prizorgas la direkcion. Ĉi-tiuj estas precipe la objektivaj punktoj, postatataj de nia Unio kaj de la mondkongresoj.

La programo de la konferenco havos la sekvantajn tri punktojn:

1. Raporto ĝenerala pri la aktuala internacia vivo kaj pri la laboroj kumpilitaj de la grandaj internaciaj asocioj.

a) specialaj raportoj de la unuopaj asocioj,

b) ĝenerala raporto de la Unio.

2. Kreo de interrilatoj inter oficialaj organizaĵoj internaciaj kaj de privataj; Rolo de regnaj asocioj, de la Ligo de nacioj, de la kooperativa komisiono de intelektuloj kaj de panamerika unuigo.

3. Rekonstruo sur larĝa kaj solida bazo de internacia centro kaj de institutoj, laborantaj en Palais Mondial. Ĉi-tiu-cele: a) evoluigoj kaj apliko de statutoj, kreitaj de la konferenco 1922-a, b) eventuala modifo de la statutoj de l' unio kaj ŝanĝo de ĝia sidejo (Geneve, La Haye, Paris, Rom aŭ Washington); c) ligo inter la centro kaj la nacioj organizaĵoj celantaj la studon de internaciaj aferoj kaj laborantaj por ĝi.

Ĉiuj internaciaj organizaĵoj estas invitatataj sendi delegitojn al ĉi-tiu konferenco, por ke iliaj komitatanoj povu persone kunhelpi en la kunveno. La regularo de la konferenco reviziota en la malferma kunveno estos la sama kiu estis en la plifruaj kunvenoj. La regnoj kaj la unuigoj de regnoj estas invitatataj sendi delegiton. La nacioj organizaĵoj, kiuj okupas sin en diversaj landoj per la ĝenerala evoluigo de internaciaj aferoj estas invitatataj sendi delegitojn „ad audiendum“. Unu administra kunsido rezervita por la membroj de la unio okazos dum la konferenco por aŭskulti la raporton de la ĝenerala sekretario, por aprobi la kalkulojn kaj efektiviĝi la laŭstatutajn elektojn.

Sinjoroj, ni esperas, ke vi volonte akceptos la inviton, senditan al vi kaj ni estus tre feliĉaj, se vi nin tuj konfirmis pri tio. Akceptu la esprimon de nia plej distingita respekto.

La ekzekutiva komitato

P. Otlet, H. La Fontaine.

Al ĉiuj kongresanoj!

Dimaneĉ je la tria posttagmeze aranĝas la junularo komunan marŝon al Schönbrunn. Kunveno antaŭ la kongresejo.

Felietono

La bonfaranto.

(Daŭrige.)

Kiam li la 14-an de oktobro 1937 alteriĝis en Nov-Jorko, ŝajnis al li, ke ĉio ĉi estis sonĝo nur de unu nokto.

Li volis fari la dankviziton ĉe Mr. Charles M. E. Chugge, sed lia amiko, la pentristo, diris: „Atendu, li sendos al vi inviton.“

La 18-an de oktobro li estis denove en Nov-Orleano. Li venis en sian malnovan loĝejon kaj estis terurita pro ĝia malvasteco, senlumeco kaj mankpleno. Sed li elpakis senvorte la kofrojn kaj provizis la loĝejon per ĉiuj bonoj, kiujn li akiris dum la vojaĝo: Per persaj tapiŝoj, hungaraj brodaĵoj, japanaj lignogravuroj, hina porcelano, franca silko, anglaj teomaŝinoj, turkaj fumadobjektoj, kestoj kun papilioj el Brazilio, elŝtopitaj kantbirdoj el Hindujo kaj cent aliaj brilantaj trezoroj.

La 20-an de oktobro li ricevis la ordonon, la 22-an rekomenci sian servon en la minejo, ŝakto VII, tria etaĝo. Li rememoris subite la interkonsenton, pensis pri la Pinkertonanoj, kiuj aliokaze prenis lin perforte, kaj iris.

La 22-an de oktobro li sidis denove profunde malsupre en la ŝakto, duonnuda, kun brusto fulgokovrita, sur kiu gutis malsupren la ŝvito, tute soleca, nur kun sia malgranda lampo apud si, kaj — tie ĉi li devis resti dum dekunu horoj! Li aŭdis la gutadon en la malseka, nigra ŝtonaĵo, li aŭdis el malproksimo la batojn de siaj kamaradoj, li manĝis sian panon el la nigra pugno. Meze en la malluma soleco de la ŝakto li vidis subite la

DOROTHEUM

Wien, I., Dorotheergasse 17

Bankfako

Aĉeto kaj Vendo de valutoj, biloj kaj devizoj
Aŭkcio de uzad-objektoj ĉiutage de la 15^a
De mardo ĝis vendredo ankaŭ juvelaĵoj. Ekspozicio de la 13^a

La katolika E-kongreso devos pritrakti jenajn de la kardinalo Piffel aprobitajn proponojn:

I. De Pro Meŝtan:

1. La katolikaj Esperantistoj klopodu, ke en internaciaj urboj, kiaj estas Romo, Jeruzalemo, Londono, Parizo, Vieno, k. a., la ekleziaj aŭtoritatoj devigu oficiale unu aŭ plurajn pastrojn, ellerni perfekte la internacian lingvon Esperanto, kaj okazigu laŭbezone regulajn Diservojn, por ke ili servu la tien are kunvenintajn katolikajn Esperantistojn, kiuj deziras tie plenumi ankaŭ siajn animajn dezirojn.

2. La katolikaj Esperantistoj alstreĉu ĉiujn siajn fortojn kaj ne ŝparu monon kaj oferojn por ebligi la reaparon de la nepre necesa organo „Espero Katolika“, benita de la Papoj Pio X-a kaj Benedikto XV-a, kaj protektata de Lia Kardinala Moŝto D-ro Piffel.

Se reapero de „Espero Katolika“ ne estos ebla, oni fonde novan organon kun pli granda redakcia stabo.

La redakcio kaj administracio de tiu organo estu gvidataj de apartaj personoj.

II: De S-ro Hookham:

La komisionoj kaj institutoj starigitaj de I. K. U. E. ĉiujare pretigu raporton pri sia pasintjara laboro, kiu raporto estu antaŭmetata al la kongreso.

III. De D-ro Smulders:

1. La Estraro de la Internacia Katolika Unuigo Esperantista (I. K. U. E.) sendu al la Sankta Seĝo humilajn petokribojn, por ke estu favorata la proceso pri la beatigo de Papo Pio X-a, de kiu la katolika Esperanto-movado jam tuj ĉe sia ekestado ricevis benon, alkuragiĝon kaj la veran katolikan senton.

2. La Naŭa Kongreso de I. K. U. E. akceptu la preĝotekston por privata uzado, redaktitan de Pro Meŝtan kaj aprobitan de Lia Kardinala Moŝto D-ro Piffel.

Ho, Dio, ni petegas: donu al Via granda Servanto Papo Pio X-a, kiu surtere celadis ĉion renovigi en Kristo, kaj en tiu sento ankaŭ tiom ofte benis, alkuragiĝis kaj aprobis la ĉiujn naciojn pace unuigantan katolikan Esperanto-movadon, la gloron de Viaj altaroj, kaj al ni ĉiuj la gracon, ke ni vivu laŭ lia sankta ekzemplo, pligrandigu Vian Dian gloron, kaj ĉiam nin montru fidelajn gefiloj de la sankta katolika eklezio. Per Jesu Kristo, nia Sinjoro. Amen.

IV. De S-ro Schendeler:

La dum „Nia Oka“ starigita „Katolika Inform-Oficejo“ (K. I. O.) prizorgu ankaŭ la recenzadon de la Esperantaj verkoj, precipe de tiuj, kiuj estas danĝeraj por la Kredo aŭ la bonaj moroj. Ĝi ankaŭ liveru kritikojn al artikoloj, eventuale aperantaj en Esperanto-periodikoj, en kiuj oni primokas nian sanktan religion aŭ ĝiajn institutojn. Tiujn recenzojn kaj kritikojn ĝi aperigu en nia organo aŭ en apartaj broŝuroj.

Kristanaj Esperantistoj: La du kunsidoj de la Kristana Esperantista Ligo Internacia ĝojige prosperis. Per la lumbilda parolado de S-ro Horner, Genève, estas klare montrite, ke la Universala Interligo de la

Kristanaj Asocioj de Junaj Viroj nepre bezonas por siaj servoj en la tuta mondo praktikan internacian helplingvon kiel estas Esperanto.

En la ĝenerala faka kunveno, prezidita de S-ro Hübner, Aneiding, oni decidis sendi invitojn al ĉiuj Kristanaj internaciaj societoj, ke ili sendu delegitojn al la venontaj kongresoj. — La Universala Komitato de la Kristanaj Asocioj de Junaj Viroj, sekve de la propono de profesoro Pierre Bovet de la universitato de Genève, decidis doni lokon al speciala esperantista sekcio inter la diversaj lingvaj grupoj ĉe la estonta tutmonda kongreso, kiu okazos dum 1926 en Helsingsfors, Finnlando. — Kiel delegitino de la Internacia societo de la Kristanaj Asocioj de Junaj Virinoj F-ino Löwen, Wien partoprenis en la fakaj kunvenoj.

Universala Esperantista Pacifista Ligo. 8-VIII-1924.

Preparan kunvenon ĉeestis hieraŭ la estraro. Hodiaŭ okazis laborkunsido.

Saluton donis S-ro R. M. Frey. en la nomo de la Aŭstra Esperantista Pacifista Sekcio, Alvenis salutleteroj de la Finlanda Esperantista Pacifista Ligo, la Bulgara Vegetara Asocio, la Internacia Virina Ligo por Paco kaj Libereco (Genève), La Internaciano de kontraŭmilitistoj, la Prezidanto de la Aŭstra Respubliko — Dro. Hainisch, S-ino Marie Hankel el Dresdeno, kaj la Brita sekcio „Neniam Plu la Milito“, k. t. p. Ni havis la ĝojon saluti nian Honoran Prezidanton — S-inon Zamenhof, kiu ĉeestis la kunvenon.

Eksiĝis el ofico, pro manko de tempo, la ĝisnuna sekretario, F-ino Mary Riley: tamen ŝi volis helpi je junulara flanko. Oni elektis sin kiel Internacian Junularan Sekretarion. Estis decido de la Kunveno, ke la Centro de la Ligo estu nuntempe en Vieno, kie samideanoj kun taŭgaj facilaj estus pretaj daŭrigi la laboron. Kiel Prezidanton oni elektis S-inon Isbrücker el Eago; kiel Ĝeneralan Sekretarion, S-ron R. M. Frey (Wien, III., Bechar dg. 14); Kasiston, S-ron Karl Klausnitzer; vic-Kasiston, S-ron T. V. Kasmader, (ambaŭ el Vieno). La Centro estis petata sendi alvokojn al naciaj societoj, ke ili elektu ĉefkomisiitojn en landoj kie ankoraŭ ne ekzistas tiuj.

Laŭ la opinio de S-ino Isbrücker, kaj S-ro J. Glück, subtenata de la kunveno, estas grave necese, ke la Centro estu tute neŭtrala kaj ke ĝi enhavu kiel kunlaborantojn, samideanojn el ĉiuj flankoj de opinioj.

Proponon oni akceptis, ke la Ligo aliĝu al la Tutmonda Pacifista Ligo en Genève: ke de ĉi tiu Ligo, programoj por kunlaborado estu akiritaj, per la Centro, kaj sendotaj al ĉiuj naciaj ĉefkomisiitoj. Ĉe la ferma kunsido raporton donos la antaŭa sekretario pri la jara laboro jam farita en diverslandaj sekcioj (hodiaŭ estas atendataj ankoraŭ kelkaj raportoj, poŝte); tiam ankaŭ, elektita komisiono prezentos skizon de statutoj prizorgotaj dum la Kongreso.

Oni gratulis S-ron Frey pro lia granda laboro por la Pacifista Konferenco ĉe la XVIa.

Ĉiuj ĉeestantoj aliĝis al la Ligo kaj donacis abonojn. Ili decidis, rilate la Pacifistan Manifestacion Publikan, ke ĝi fariĝu tre granda propagando.

Estimataj Samideanoj! — Bonvole venu grand-amase al ĉi tiu solena festo, Lunde, 3.30 p. m! Parolados la nova Prezidanto, S-ino Isbrücker; D-ro Privat; la protektanto, Universitata Profesoro Suess; S-ro Kenn el Hinjujo; kaj la nova Ĝenerala Sekretario — S-ro R. M. Frey.

Antaŭen! Al la Universala Paco! — laŭ la Espero de Zamenhof kaj de ni ĉiuj!

(Protokolanto — Mary Riley.)

Internacia Instruistaro. Unu el la plej gravaj fak-kunsidoj en la kadroj de la XVI-a estis aranĝita hieraŭ en la malgranda koncertŝtalo kaj malfermita de sam. Artur Degen el Leipzig, la prezidanto de l' Esperanto-unuigo de la germanaj instruistoj. Ĝinstruistoj el 14 diverslingvaj landoj plenigis la ĉambregon kaj en vigla diskuto realigis la organizajn laborojn, kiuj inaŭguratig jam antaŭ 13 jaroj, estis en Praha 1922 rekomencitaj kaj en Nürnberg 1923 energie daŭrigitaj.

En la granda lukto pri la reformo de l' edukado en ĉiuj landoj havas tiu ĉi mondligo de l' instruistoj kompreneble eminentan rolon. La statuto nomas kiel bazon la celadon al paco kaj progreso, kiel celon la unuigon de l' edukistoj en la tuta mondo trans la landlimojn laŭ sekvantaj principoj: Lukto pri edukado kontraŭ milito kaj interpopola malamoro, reformo de lernejoj laŭ la principoj de racio kaj humaneco.

La ligo uzas ekskluzive Esperanton, havas centran oficejon en Leipzig, propran organon same tie, eldonas jarlibrojn, adresarojn de siaj membroj, pedagogiajn kaj laŭraciajn literaturaĵojn por la infanoj, aranĝos studvojaĝojn, interŝanĝadon de infanoj dum la ferioj k. s.

La estraro konsistas el kvin membroj de diversa nacieco, nome Boubou-Francoj, Krumpholz-Ĉeĥosl. Resp., Piattitalujo, König-Hungarulo, Mladinova-Bulgarulo. La redakcia komitato de l' faka gazeto formas la germana grupo de instruistoj en Auerbach-Falkenstein. La junularan fakon prilaboras aparta komitato, konsistanta el Pfütze-Germanulo, Riley-Anglujo, Šupichova-Ĉeĥosl. Resp. Kiel referaton por la venontjara fak-kunsido oni akceptis la temon: „Senfaka universala instruado“.

La ligo vidas sian ĉefan taskon en tio, ke ĝi servos al la reciproka proksimiĝo de l' popoloj ne per konvinkado de maturuloj, sed per realigo de laŭnatura edukado de la junularo en ĉiuj landoj de la tero.

Ekzamenoj de la Internacia Instituto de Esperanto. La sekvantaj kandidatoj sukcesis en la skriba parto de la ekzameno por Atesto pri Kapableco:

- S-oj Courtinat
- Prager
- Schönrich
- Egger
- Kimmel
- Urban.

Kiuj el la nomitaj ankoraŭ ne ricevis la diplomon, sendu la takson (sv. Fr. 12:50 = 150.000 a. Kr.) rekte al Esperanto-Instituto, Boulev. du Théâtre 12 en Genève.

Sukceso ĉe la studentoj. Seriozaj estis la laboroj de la nemultaj studentoj ĉeestintaj la unuan ĉefkunvenon de la studenta fak-konferenco, seriozaj kaj idealismaj. Demandoj organizaj okupis ĉefe la ĉi-unuan kunvenon. La dua pritraktos sciencajn problemojn. Samtage okazos internacia propaganda mitingo.

La kunveno arigis interesan partoprenantaron. S-o F. W. Illing, germana verkisto, kiu prezidis la kunvenon, fino Zamenhof, japana studento, jugoslava profesoro kaj Viena docento estis la plej rimarkindaj personoj. Krome bulgaroj, poloj, germanoj, italoj kaj aŭstroj. Senpasiale la konferenco ekzamenis la diversajn proponojn pri organizo, kvankam funde diferencaj politikaj konceptoj renkontis unu la alian. Kaj oni fine kompreneble decidis fondi la studentan internacian asocion esperantistan kaj loki ĝian centron en Varsovio, en la Zamenhofurbo.

Ĉiujn esperantistojn certe interesas la raportoj donitaj de nia kolego japana pri 20,000 en Japanujo ekzistantaj esperantistoj, de niaj Varsoviaj samideanoj pri ilia asocio havanta preskaŭ 100 membrojn kaj de niaj bulgaraj kaj italaj samfakuloj pri la sukcesaj varbaj laboroj en iliaj universitataj rondoj.

Fine estu menciata, ke krom la kutimaj salutvortoj de la prepara komitato kaj de la prezidanto, alvenis ankaŭ salutletero de lia dekana moŝto de la filozofia Viena fakultato universitata.

La konferenco decidis sendi telegramon al lia rektora moŝto de la Viena universitato, kiu afable honorigis nin per sia protekto.

Komercaj oficistoj, nova kunveno! Kunvenis jaŭde je la 5-a vespere en gimnazia ĉambro n-ro 20 sole 10 geoficistoj el 4 landoj kaj ĉar estis pritraktotaj gravaj fakaj aferoj, kiuj havas signifon ankaŭ por la cetera movado esperantista, decidis la ĉeestintoj kunvoki denovan kunsidon por sabato, la 9-a de aŭg. je la 10-a horo en la ĉambro n-ro 24. Ĉeesto de ĉiuj komercaj oficistoj nepre necesa kaj certe atendata!

Ĵus aperis:

Prof. E. Grosjean-Maupin. — Oficiala Klasika Libro, franca, angla kaj germana parto. Prezo: 3 franc. fr. (Centra Esperantista Librejo — 51, Rue de Clichy, Paris 9.)

Tiu ĉi libro enhavas, krom la 16 oficialaj gramatikaj reguloj, ĉiujn nunajn oficialajn radikojn de Esperanto.

La unua parto enhavas la francan, anglan kaj germanan zorge korektitajn kaj kompletigitajn tradukojn de tiuj oficialaj radikoj, esceptante la radikojn, kiuj estas sfiĉe internaciaj por ne bezoni tradukon.

La dua parto enhavas la internaciajn radikojn, kiuj, eĉ estante netradukitaj, estas generale kompreneblaj por eŭroplingvanoj.

La tria parto enhavas la esperantlingvan difinon de netradukitaj radikoj.

La kvara parto enhavas rimarkojn por la franc-, angla- kaj germanlingvanoj.

Ĵurnalistoj! Raportantoj! Fakestroj!

Zorgu pri preciza kaj rapida inform-servo en la „Bulteno“! Ĉiuj seligoj, raportoj kaj aktual-temaj artikoloj venu legeble skribite senprokraste en la manojn de la ĉefsekretario!

nubojn migri super la tero kaj loĝi inter la pintoj de montoj.

Kaj tiel estis finkreita la mondo. Kaj Adam kaj Eva estis sin kinsintaj...

Cent jarojn poste okazis, ke vermeto venis antaŭ la tronon de Dio kaj atendis tie, ĝis Dio ĝin vidos. Ĝi atendis ne longe; ĉar la Ĉiombona ĝin ekvidis, prenis ĝin sur sian manon kaj demandis pri ĝiaj deziroj.

Ho, bela ĝi volus esti! Tiel bela kiel la ĉielo, tiel bela kiel la maro. De la ĉielarko ĝi volus ankaŭ ion havi kaj de la ĉarmo de l' frua printempo. Ho, kaj de la delikateco de l' unua pasema kiso ĝi tiel arde dezirus ion kun si porti! Kaj kun tiu realigo ĝi volus vivi inter ĉielo kaj tero.

Kion faris Dio?

Li, la Ĉiombona, aŭdis nenian plendon kontraŭ sia verko en tiu petego, li aŭdis nur la laŭdon! Laŭdon por sia ĉielo kaj siaj maroj, por sia kolorarko kiu sin konstruas sur nuboj, por sia ĉarma printempo kaj por la kiso, vekiganta sur la lipoj de liaj homoj.

Kaj li ridetis kaj pensis dum kelka momento kaj songis la duan fojon songon de kreado. Kaj vidu! Jen sin elteksis sur la vermeto kolorariaj flugiletoj, delikataj kiel rigidiginta ekspirilo; la oro de l' dia trono kaj la blankaj vestaĵoj de Keruboj sin spegulis en ili.

Kaj Dio ekrigardis, ĝojis kaj diris: „Nun flugu!“

La vermeto ekzamenis siajn ĉarmojn kaj elŝvebis el la mano de Dio malsupren al la tero.

Kaj ĝi estis la libelo, tia ĝi estas hodiaŭ.

En ĝiaj flugiloj brilas la bluo de la ĉielo, en ĝiaj flugiloj estas la iris de l' ĉielarko. En ĝiaj flugiloj estas la bluo de la maroj, kaj la suno kaj la luno povas tra ĝiaj flugiletoj lumi kiel tra akvo. Kaj se sin tiuj flugiletoj movas, tiam spireto vibras ĉirkaŭ ili — la maja zefiro vekas tiel la florojn en la horo post noktomezo. Delikataj tamen ili estas, ho, tiel delikataj, ke, kie du sin kisas, per la unua nekuraĝa kio de la juna amo, tia flugileto povus disigi la kison, kiu tamen ankoraŭ estus kaj restus kiso.

*

Kiam vi vidas flugeti libelon, ne peni rabi al ĝi liberecon. Rigardu ĝin, kiel ĝi ripozas sur lagoborda junko, blua lumeto, transformanta por momento simplan herberon en miraklofloron!

Artur Anders.

La muzo de l' poeto.

(Dediĉita al Esperanta Literatura Asocio.)

Ŝi estis tiel bela — li estis poeto, Malriĉa, nekonata, mizera proleto, La belon kaj virinan amon avidanta.

Ho venu al mi, mi je vi sopiris, Li diris al ŝi; kion li deziris, Ŝi al li donis en senlima amo.

Ŝi estis por li ĉio; servistin' kaj muzo; Dum tago servistin' en eluzita bluzo, Muzo dum nok' en die nuda belo.

Pasioj, kiuj ilin en la amado lulis, En liaj versoj poste flame brulis, Kaj en la mizerĉambro venis brile — gloro!

Li ŝin forpuŝis tiam, ĉar ŝin ne bezonis, Ŝi en la marĉo de l' urbeg' ekdronis, De la malriĉa poeto la muzo...

Kaj el grandmondo, post edziĝa peto, Kiel edzino de l' glora poeto, Lin sekvis riĉa knabin' al altaro...

Dum kun edzino sia li promenis, Ŝi lin rekonsis foje kaj ekŝvenis: Ĉe stralkruciĝo ŝi staris — sub lampo...

Nur post momento leviĝis rigardo Ŝia dolore kun pasia ardo Al li tra larmoj en la blu-okuloj...


Kaj tiel laŭta ĝi estis doloro, Ke la edzino vokis kun angoro: Ho, kion volas de vi la persono?

Li kisis ŝin kaj diris: Karulino, Deturnu la rigardon, ĉar malĉastulino Ĉi estas ia, en kol', evitinda!...


(Laŭ germana originalo.)

BILDOJ EL VIENO

el Lechner'a Albumo de Vieno, eldonita de la Universitata Librejo R. Lechner (Vilh. Müller),
Wien, I., Graben 31.



Akademio de Bel-Artoj kaj la Monumento de Schiller
Akademie der bildenden Künste und Schiller-Denkmal — L'Académie des Beaux-Arts et le Monument de Schiller
The Academy of fine Arts and the Monument of Schiller



La monumento de Mozart
Mozart-Denkmal — Le Monument de Mozart
The Monument of Mozart



La monumento de Gutenberg
Gutenberg-Denkmal — Le Monument de Gutenberg
The Monument of Gutenberg

Burggarten

(Kastelĝardeno) ĉiutage je la 8^a vespere (se pluvus en la festsalono de Hofburg)
Sinfoniokonzertoj — Operoj — Kabaredoj.
 Ludas la Viena Sinfonio-orkestro.
 Vendado de kartoj en koncert-direkciejo Vindobona, Karlsplatz, vendejhalo, aŭ en Burggarten.

Bonega tagmanĝo

en la komunaj manĝejoj de **Mittella-A. G.**

Malfermaj dum labortagoj:
 I. Himmelfortgasse 8. — I. Ballhausplatz 1 (Hofburg). — I. Postgasse 9 (alte Postsparkasse). — I. Liebiggasse 6 (altes Korpskommandogebäude). — I. Nibelungengasse 10. — I. Schillerplatz 4. — III. Landstrasser Hauptstrasse 146. — VI. Mariahilferstrasse 88a (Zitahof, I. Stock). — VII. Kirchengasse 13. — VIII. Josefstädterstrasse 43. — IX. Porzellangasse 33.

Malfermaj ankaŭ dum dimandoj kaj festotagoj:
 I. Schillerplatz 4. — VIII. Josefstädterstrasse 43.

Sinanonco ĉe la kuirejestroj!
Neniu trinkmono. Neniu alkoholo.
Manĝtempo 12^a—3^a, dum dimandoj kaj festotagoj 12^a—2^a.
 Manĝaĵoj povas esti ankaŭ forportataj.
Prezoj en abono:
A-menuo:
 K 4000 (Supo, legomo kun aldonajo, farunajo.)
B-menuo:
 K 8000 (Supo, viando kun aldonajo, farunajo.)
C-menuo:
 K 11.000 (Supo, viando kun aldonajo, farunajo.)
D-menuo:
 K 13.500 (Supo, rostaĵo kun aldonajo, farunajo.)
 Alpago por unuopaj manĝkartoj: por A-menuo K 500, por B-, C- kaj D-menuoj K 1000.
 Dimanca menuo K 15.000

Krome apartaj manĝaĵoj en granda elekteleblo kaj je malgrandaj prezoj.

Opero-Restoracio kaj -Kafejo

Wien, I., **Operngasse 8**
 kontraŭ la Ŝtata Operejo.
 Menuoj laŭ fiksjaj prezoj kaj laŭ la manĝaĵoj-listo.

Esperanto-Literaturo

ĉiuseca el nia eldonejo estas havebla en granda sortimento en la **Kongresa Librejo.**

Precipe ni atentigas pri niaj kolektoj **Esperanta Biblioteko Internacia** **Nova Esperanto-Biblioteko**

kaj pri nia gazeto

Germana Esperantisto

(Specimenaj numeroj en la Kongresa Librejo)

Esperanto-Verlag Ellersiek & Borel G.m. H.

Berlin kaj Dresden.

Aŭstruja Akcia Societo por Aeroplanvojaĝoj

Ĉiutagaj Flugoj de

| | | |
|------|--------------|--------------------|
| | | Prezoj de flugo: |
| Wien | München'on | Aŭstr. Koj 900.000 |
| | Nürnberg'on | " " 1,350.000 |
| | Frankfurt'on | " " 1,950.000 |
| | Zürich'on | " " 1,760.000 |
| | Genève'on | " " 2,350.000 |
| | Budapest'on | " " 400.000 |

Rondflugoj super Wien kaj la Wien'a Arbaro

(Daŭro proks. 20 minutoj) Prezo Aŭstr. Koj 150.000 por unu persono

En Junkers plenmetalaj Limuzinoj
 Flugbiletoj kaj Informoj en „Oesterreichisches Verkehrsbureau“, Wien I, Friedrichstrasse 1
 Telephon 52-5 90

Fabriko de Fortepianoj Pallik kaj Stiasny

Wien, VII., **Neubaugasse 68.**
 Telefono 32-4-59, 34-5-15.

Pianinoj, koncert-fortepianoj kun angla aŭ Wien'a mekaniko, bonega kvalito.
 Fondita 1894.
 Honora Diploma Jubilea Ekspozicio 1898.

(Aŭstria oficejo por trafiko)

Oesterreichisches Verkehrsbureau

Centro Wien, I., Friedrichstrasse Nr. 1 (kontraŭe de Sezession)

Telefono: 52-5-90 Serie. Telegramadreso: Austriaverkehr. Filioj kaj reprezentejoj en- kaj eksterlande entrepreno por ŝipaj kaj aeroplanaj veturadoj. — Ŝipkomunikoj al ĉiuj gravaj havenoj. — Propra banko. — Societaj kaj aŭtomobilaj vojaĝoj. — Informoj pri ĉiuj vojaĝ-aferoj.

De la 7^a Aŭgusto propra servado en Konzerthaus (Kongresejo).

Anglo-Austrian Bank Limited

London, 24, Lombard Street, E. C. 3
 Vienna Representation I, Strauchgasse 1

Capital Authorized . £ 2,000,000
 Capital Issued 1,406,370
 Reserves 375,156

Telegrams: Anglobank Vienna — Telephone: 63570

21 mansasgejoj en Vieno

Sidlokoj:
 Aŭstrujo: Baden ap. Wien, Bregenz, Gmünd, Graz, Graz-Hauptbahn. (ĉefa stacidomo), Innsbruck, Krams, Laa a. Th., Linz, Marizell, Semmering, St. Pölten, Villach, Villach-Bahnhof (stacidomo), kaj Velden ĉe Wörthersee, Wels, Wiener Neustadt. — Jugoslavo: Maribor. — Hungarujo: Budapeŝto, mansasgejoj: Calvinplaco kaj Elisabethring. — Italujo: Trieste. — Rumanujo: Czernowitz, Grosswarden. Ĉiubankaj transakcioj estas efektivigataj

VIAN VOJAĜPAKAĴON

asekuras kun la plej favoraj kondiĉoj
„DER ANKER“
 ĝenerala Akcia Societo por Asekuroj
 Wien, I., Hoher Markt 10/11 Tel. 66-5 55
 Serie.

Vojaĝoficejo „Klea“

Wien, VI., **Mariahilferstrasse 85/87**
 (en la komercejo „Klea“)
 Tel. 54-27 kaj 64-72.

Veturbiletoj laŭ ĉiu direkto de en- kaj eksterlando, veturbiletoj por ĉiuj vaporsiplinioj, asekuro de pakajoj ktp.

Seninterrompa servo (ankaŭ sabate) de la 9^a ĝis la 17^a

Restoracio Francisko Falk

„ZUM STADTPARK“
 I. Kolowratring 1, apud la Urba Parko, nur unu minuto de la Kongresejo „Konzerthaus“, rekomendas al la kongresanoj sian bonegan manĝotablon tagmezan kaj vesperan. Moderaj prezoj kaj bona servado, distinga biero kaj bonaj vinoj.



Laŭda Kanto
 pri **Farina „Gegenüber“**
 dem Jülichplatz (kontraŭ Jülichplaco)
 La plej Malnova kaj la plej Bona
KOLNA PARFUMAKVO

== **Grandaj Vendoj** ==
 Favorprezoj de Objektoj
 Mastrumaj kaj Vestaj

Stafa A. G. Zentralpalast VII., Mariahilferstrasse
 Ecke Kaiserstrasse.

Kongresa Bulteno



Oficiala Organo de la XVI^a Universala Kongreso de Esperanto Wien-Vieno 1924

Redakcio: Koncert-Palaco, Wien, III., Lothringerstr. 20.

Redaktoro: Dr^o Emil Pfeffer.

Nur rekte, kuraĝe kaj ne flankigante!

Legeble skribitaj manuskriptoj por la redakcio estu transdonataj en la kongresejo al la ĉefsekretario.

Numero 5.

Wien-Vieno, lundo, 11. Aŭgusto 1924.

Aperas ĉiutage.

„Nia afero regule kaj trankvile iras antaŭen. La tempo de la teoriaj juĝoj kaj de kliniĝado antaŭ ŝajnaj aŭtoritatoj jam de longe pasis. Se iu nun esprimas sian opinion aŭ konsilon pri Esperanto, oni jam ne demandas, ĉu li estas homo grandfama aŭ ne, — oni nur demandas, ĉu liaj konsiloj estas konformaj al la naturaj bezonoj kaj la natura irado de nia lingvo aŭ ne. Ne por fieri pri nia forteco mi diras ĉi tion: neniu el ni havas la rajton esti fiera; ĉar nia forteco ne estas la merito de iu el ni aparte, sed ĝi estas nur la rezultato de multjara pacienco laborado de multo da personoj. Mi volis nur atentigi vin pri tio, ke en nia afero ĉio povas esti atingita nur per harmonio kaj konstanteco. Se nin ne gvidus fera konstanteco, nia lingvo jam de longe ne ekzistus, kaj la vortoj „lingvo internacia“ estus nun la plej granda mokataĵo por la mondo“.

D-ro L. L. Zamenhof.

La Pentekosta miraklo de unu komuna lingvo.

El la amasda poresperantaj artikoloj, je kiuj nun abundas nia gazeto, ni elprenas hodiaŭ por transdoni al la XVI-anoj ĉi-suban vere distingindan artikolon, aperintan hieraŭ kiel ĉefartikolo en la Viena katolika „Welt-Blatt“ („Mond-Gazeto“). Ĝi servu kiel imitinda ekzemplo por la alilandaj katolikaj gazetoj kaj samtempe kiel instruo por tiuj — cetere nur malmultaj — el inter ti, kiujn ankoraŭ ĉiam persekutas la penso, ke la „interna ideo“, kiun D-ro Zamenhof nedisigeble kunigis kun la lingvo Esperanto, estas baro en ĝia praktika propagando. La granda — jam nun konstata — propaga sukceso de la XVI-a por Vieno kaj Aŭstrujo devenas ĝuste kaj ĉefe de tio, ke nia gazeto ne prisentis, sed ĉefe de tio, ke internajn, etikajn valorojn de nia komuna lingvo.

La Red.

Jam morgaŭ kunvenos la tuta reprezentantaro de Esperantistoj el la tuta mondo, kiom ilin povos ampleksi la spaco, en la granda ĉambrego de Koncert-Palaco por solena manifestacio por la de ili reprezentata ideo kaj la reprezentantoj de nia registaro, de l' urbo Vieno kaj de eminentaj korporacioj povos kiel honorgastoj esti atestantoj de la popolojn konkordiganta

spirito, kiu trapenetas ĉiujn de ĝi unuigitajn el ĉiuj terpartoj ĝis orienta Azio kaj ĝis Aŭstralio same bone kiel el la Nova Mondo aŭ el la novaj nord-orientaj ŝtatoj de Eŭropo.

Tiu ĉi spirito ĝi estas, kiu puŝis la elpensinton de l' komuna interkomunika lingvo, Doktoron L. L. Zamenhof jam de frua juneco al lia epoka verko kaj lin dum jardekojn longaj penadoj por la lingvo subtenis; tiu humaneca, porhomara spirito radias el ĉiuj liaj kongresparoladoj, kiujn la „Majstro“ ĉiujare, depost 1905, direktis al siaj disĉiploj kaj aliĝintoj, kaj kiu nun fine ankaŭ ĉiam pli kaj pli enpenetas en la vastajn sferojn de la publiko.

Kaj nia tempo tian rimedon bezonas urĝege. La animoj de l' popoloj, plej profunde ekscilitaj de la sur la tuta tero furiozinta sanglukto, povos trovi nenian trankvilon, kiel longe ne okazos denove la reciproka alproksimiĝo de l' popoloj por paca kunvivo kaj kiel longe la naciaj antagonismoj estos akcentataj anstataŭ mildigitaj. Forta portanto de tiuj antagonismoj estas nekontesteble la nacia lingvo kaj rimedo, por tiun antagonismon forigi, ne ofendante la apartajn vivantajn lingvojn en ilia plene rajtigita signifo, devas esti salutita kiel valora medikamento.

Fakte instruis la sperto de ĉiuj ĝisnunaj Esperantaj mondkongresoj kaj la nunaj Vienaj ĝin konfirmas, ke kun la diferenco de lingvoj formalaperas la cetere preskaŭ ĉiam kaj ĉie akre senteblo frotrezisto en la reciproke rilatoj de diversnaciaj kaj ke ili, parolante per unu unikan, al ili ĉiuj egale facile kompreneblan kaj ĉe tio al neniu aparta popolo apartenanta lingvon, sentas sin nun nur kiel homoj, ne kiel naciuloj kaj ke en iliaj vicoj nacia ŝovinismo trovas nenian lokon.

Tion dankas ili al la genia kreaĵo de doktoro Zamenhof, kiu kun sia lingvo donis al ili ankaŭ la „interna ideo“ de l' Esperantismo. Jam ĉe la Ĝeneva Kongreso li subtekis en sia alparolo tiun ideon, ke ĝi per la komuna lingvo interproksimigas ne nur la cerbojn de la homoj, sed ĉefe kaj antaŭ ĉio iliajn korojn. Kaj la ĉefa tasko de ĉiuj Esperantaj kongresoj estas ĝuste ĉiam denove plivivigi tiun amon al la Esperantismo kaj per tio al la kompreno por la unueco de l' homaro super ĉiaj ling-

vaj aŭ rasaj diferencoj, per unu vorto, nobl-igita, idealigita kosmopolitismo, ne foroferanta tamen blinde la individue-naciajn apartecojn, kaj tamen sin enmembriganta en la grandan universalecon de Die benita popular-familio kaj kondukanta tiel al la bono de l' homaro, al la paco de l' popoloj.

Kiel sur religia kampo la Pentekosta miraklo, pri kiu la historio de apostoloj rakontas, estis epokfaranta por la disvastiĝo de la instruo de Kristo, kies ĉeftraĵo estas la amo al la proksimulo de kiu ajn stato aŭ raso, tiel same tiu ĉi Pentekosta miraklo de por ĉiuj homoj egale komprenebla lingvo estas ankaŭ sur la kampo de l' politika kaj sociala vivo la unika rimedo, por tiun reciprokan komprenon por la proksimulo el kiu ajn popolo elkrei kaj pliprofundigi. Ĝi forigas la barojn, kiujn metas la nekompreno de la lingvo de tiuj proksimuloj kaj proksimigas tiel la naciojn al si reciproke, pli bone ol traktatoj kun siaj paragrafoj kaj punktaĵoj. La Esperantismo, ĝuste komprenita kaj ekzercata kaj ĝenerale efektiva, estas la plej bona ponto por vera interpopola paco.

Ne vanta ludajo, ne spirita sporto, ne nur al la komercisto oportuna komprenigilo estas do Esperanto; la valoro, la signifo de tiu lingvo iras multe pli profunde, ĝis la radikoj de la instruo de Kristo: Amu vian proksimulon kiel vin mem. Kiu el tiu ĉi vidpunkto komprenas kaj konsideras la celadojn de Esperantistoj, la spiriton de Esperantismo, tiu ankaŭ kiel konvinkita vera katoliko — laŭ la ĝuste nun de la kardinalo Piffl al la katolikaj en Vieno kunvenintaj Esperantistoj el ĉiuj landoj esprimita konvinko — sin servigos je tiu ĉi la naciajn antagonismojn transportanta rimedo de l' komuna interkomunika lingvo Esperanto, por de sia parto kunlabori ĉe la de Dio volata interkonsentiĝo de l' popoloj en la spirito de Kristo, la vera instruanto de l' paco.

**Grava kuranta inform-
materialo rezervita por
la morgaŭa numero !**

TUTMONDA VOJAGOFICEJO
THOS. COOK & SON
Wien, I., Stefansplatz 2

vendas veturbiletojn por fervojo kaj vaporŝipo al ĉiuj landoj de la tero, lokojn en litvagonoj, ŝanĝas monon, havigas biletojn por rondveturadoj en la urbo, asekuron de vojaĝpakajoj, loĝejon en hotelo, gvidlibrojn por vojaĝoj ktp.

==== Informoj senpage. ====



Al mia infano!

(Dediĉita al la hodiaŭa Granda Pacifista Manifestacio.)

Ho, ĉu vi povos pardoni al mi la teron, infano?
Kaj senforton mian ĉe l' morto de via unua amo?
Ĉe la rompiĝo de l' homo, la unua via, la pupo?
Ĉar por vi mortis ja homo en tiu mort-iluzio.
Kiel min trafis en koron via ploranta rigardo,
Tiu unua ekdubo pri la boneco de l' mondo.


Ho, ĉu vi al mi pardonos la teron, mia infano?
Kaj la unuan ekvidon de homo sen brak' kaj piedoj?
Ree en mond-antaŭsentato eksvenis via koreto,
La bildo pri bona kaj bela homaro rompiĝis;
Kaj la anĝelo en vi ne povis kompreni: pro kio?
La floroj de viaj okuloj kovriĝis per roso de larmoj.
Tiam kun gesto kortuŝa vi donis al mi la maneton,
Kun gesto de l' kredo al mi, kaj mi ne kuraĝis respondi:
„Ankaŭ pro mi, pro silento mia, li perdis la membrojn.“

Kaj ĉu vi al mi pardonos la teron, tiun ĉi teron?
Foje, kiam vi staros ĉe via kripla fianĉo?
Foje, kiam vi vidis, ke la homo nur rajtas: dolori?

Ĉu ne aperos vi tiam ĉe mi kun plend' kaj riproĉoj?
„Kion vi faris, patrino, por neebliĝi suferon?
Tolero via malfermis la pardonon al la mizero!
Malantaŭ ĉi tiu pordo vi melis min en la mondon.
Ne staras mia piedo en floroj kaj fruktodoneco,
Ne ĝojas mi kiel la birdoj en la ĉiel-firmamento;
Mi vivas en nokl' de doloroj, en arbar' el membroj rompita!“

Infano mia, ĉu tiam pardonos vi al mi la teron?
De kie mi prenus kuraĝon kaj rajton vin doni al homoj?
Foje, mi scias, mi scias, vi min malbenos, infano!

Klara Goll.



Diversaj Informoj.

Studentoj, profesoroj atentu! Gravaj problemoj!

Okaze de l' raporto pri la dua ĉefkunveno de la fak-konferenco studenta, necesas paroli pri gravaj aferoj.

La fakkonferenco finis la laboron organizan malsarĝinte son Fenster en Berlin de plua laboro. Ĝi alprenis rezolucion pri instruo, kiu okazis en ĉiuj mez-kaj altlernejoj. Dezir-esprimo estis akceptita, ke ĉiu izola esperantista studento resp grupo studenta sendu sian adreson, se eble kun raportoj al fino Lidia Zamenhof, juristino, Warszawa, Krolewska 41.

La priorganizan diskutadon alternis du referatoj. Kolego Mildwurf parolis pri la internacia studenta movado, la skribanto de ĉi tiuj linioj pri praesperanta lingvoformo kaj konkludo el ĝi.

Fininte la internan laboron, la konferenco okazigis propagandan internacian mitingon, en kiu partoprenis kiel oratoroj profesoro Bujwid el Krakovo, kiu pro ĉeesto de francaj neesperantistaj gastoj parolis en lingvo franca, rektor Krieger el Steitin en germana lingvo kaj nia simpatia nevidanta amiko profesoro Eroŝenko el Peking en esperanto.

Jen mi en mia raporto ĝisvenis al la grava, al la esenca problemo de la esperanta estonteco. Nia samideano Eroŝenko rakontis pri la student-esperantista movado

en la landoj ĉina kaj japana kaj mirigis la aŭskultantaron pro ĝia profundeco, pro ĝia seriozezo. Psikologian kaj ekonomian sciencan ilin studas per esperanto. Bedaŭrinde la necesaj libroj mankas. „Amatora estis ĝis nun nia movado, nia propagando“ — diris Eroŝenko — „kial en esperanto ekzistas preskaŭ nur noveletoj au poemoj? Kial vi ne verkas kaj eldonas librojn sciencajn? Amuzema movado eŭropa pereigos la seriozan en Azio.“ — Ex oriente lux!

Se iu ideo maturiĝis, ĝi trovas sian interpretiston. Ĝiaj apostoloj aperas samtempe, ili estas kvazaŭ sentemaj sismografoj, kiuj registras la fazojn kaj la staton de la afero. Jus la Viena Akademia Societo Esperantista ricevis leteron de S-ro prof. E. Grosjean-Maupin, direktoro de la akademia sekcio por la komuna Vortaro, kiu skribas al la studentoj, ke por propagando en la universitatoj kaj sciencistaj rondoj necesas verkoj seriozaj. Ni citu kelkon el la letero de l' ŝatata profesoro:

„Bonvolu precize (titolo, aŭtoro, eldonisto) montri la precipajn sciencajn kaj fakajn verkojn, kiujn vi bezonas por viaj studoj, sed kiuj ne estas tradukitaj en via nacia lingvo.“

„Demandi la uzontojn estas la plej certa rimedo por scii pri la plej multaj aĉetotaj libroj, t. e. pri la plej profitodonaĵ libroj.“

„La afero koncernas kompreneble ĉiujn sciencajn verkojn, tamen komence precipe la lingvistikajn, filologiajn, filozofiajn, psikologiajn kaj historiajn traktatojn, ĉar oni renkontas en tiuj-ĉi sciencoj malpli da specialaj teknikaj terminoj ol en la ceteraj fakoj.“

„Mi devas ankaŭ rimarkigi al vi, ke tiuj tradukoj estas la plej bona kaj plej praktika maniero por akceli la starigon de la diversaj fakaj terminaroj.“

Studentoj, kiuj vi ĉi-liniojn legas, respondu! Profesoroj, vi verku! Kaj vi eldonistoj, vi iniciatu!

E. Sonnenfeld,
stud. de Komercia Eksport-Akademio en Wien.

Ruĝa Kruco. Kiel estis anoncite en la „Kongresa Bulteno“, okazis sabato matene la Faka Kunveno de la Esperanta Ruĝa Kruco. Kapable estris D-ro Edmundo Sós, el Vieno, kiun la ĉeestantoj unuanime elektis kiel prezidanton. Partoprenis en la kunsido S-ino Zamenhof, kiu montras konstantan intereson al tiu-ĉi tutmonda movado.

S-ro Rudolfo Horner, la delegito de la Internacia Komitato de la Ruĝa Kruco, en Geneve, koncize raportis pri la progresoj de la laboro dum la lasta jaro. Li klarigis la novan konstitucion de la Esperantistaro en la rondoj de la Ruĝo Kruco. Ekzistas nun delegitoj Esperantistaj en 14 landoj, kaj la Hispana Nacia Societo oficiale rekomendas en siaj novaj statutoj la lernadon de Esperanto en la hispanaj grupoj.

La jenaj rezolucioj etis proponitaj, diskutitaj kaj akceptitaj:

La membroj kaj geamikoj de la Ruĝa Kruco, partoprenantaj en la XVI-a Universala Kongreso de Esperanto en Vieno el diversaj landoj, havas la honoron respektplene submeti al la Internacia Komitato de la Ruĝa Kruco, en Geneve, la sekvantaj rezoluciojn:

1. La anoj de la Faka Kunsido de la Ruĝa Kruco deziras esprimi dankon al la Internacia Komitato en Geneve pri la helpo dum la jaro kaj ĝia reprezentado ĉe la Universala Kongreso en Vieno kaj pri la bonvola akceptado de la rezolucioj de la Kongreso en Nürnberg (Vidu: Revue Internationale de la Croix-Rouge, No. 59, Novembro 1923, pp. 1129-1130).

La anoj ankaŭ petas, ke la Internacia Komitato sendu delegiton al la venonta Universala Kongreso.

2. La Esperantistoj bedaŭro konstata, ke multaj el la naciaj centraj komitatoj ne dissentas al la lokaj grupoj la internaciajn sciigojn. Ili urĝe petas ke la Internacia Komitato en Geneve konsideru kaj studu la metodojn, per kiuj oni povos vigligi la naciajn grupojn, por ke ili havu internacian spiriton kaj pli perfektan interŝanĝon de ideoj, klopodoj kaj laboroj de paca tempo, se eble en la internacia helplingvo Esperanto.

3. La Esperantistaj Ruĝkrucaĵoj de la Kongreso en Vieno kore gratulas la hispanajn societojn pri la oficiala rekomendo de la lernado de Esperanto flanke de la Hispana Nacia Komitato kaj esperas, ke tiamaniere iliaj membroj povos pli efike servi la homaron.

4. Estas dezirinde ke ĉe la Universala Kongreso de Esperanto okazu du specialaj kunvenoj de la Ruĝa Kruco: 1. Kunveno de la delegitoj el diversaj landoj por prepari la naciajn raportojn. 2. La ĝenerala kunveno de la membroj kaj amikoj de la movado.

5. Ĉiu ano de la Internacia Esperantista Ligo de la Ruĝa Kruco devas esti membro de loka aŭ nacia Ruĝkruca societo. Kie ne ekzistas loka aŭ nacia grupo, la Internacia Komitato en Geneve devas esti konsultata.

6. La Faka Kunveno tre bedaŭras, ke S-ro D-ro Hamalgyi, kiu laŭdirde laboris dum la tuta jaro, estas malsana, kaj ĝi sendas al li plej korajn bondezirojn por lia resanigo.

7. La partoprenantoj de la Viena Faka Kunveno petas, ke la Loka Kongresa Komitato konsultu la prezidantojn de la fakaj kunvenoj antaŭ la anonco de la kunsidoj en la Kongresa Bulteno.

8. La delegitoj de la diversaj landoj formas kun la delegite de la Internacia Komitato en Geneve la Konstantan Komitaton de la fakaj kunvenoj de la Ruĝa Kruco.

Alison A. Nicol, sekretariino.

Protokolo pri la policaj fakunsidoj. (La 7-an kaj 8-an de Aŭgusto 1924 je la 16-a horo.) Ĉeestis 16 personej policaj.

Distriktspektoro Hirz, kiel lokgrupa prezidanto de la Tutmonda-Police-Ligo salutis la ĉeestantojn kaj parolis pri la policesperantista movado en Vieno kaj menciis, ke la ĝenerala prezidanto Hans Schöber ĉiam volonte subtenis la movadon kaj ke ankaŭ S-ro polica konsilisto D-ro Buchsbaum grave servas al nia faka afero.

La direktoro de la T. P. L. kaj eldonanto de la fakrevuo „La Policisto“ A. de Marich parolis mallonge pri la mondmovado inter la policanoj.

Profesoro T. Morariu, delegito de la direktoro de la rumana polico kaj ŝtata sekureco tre defale kaj interese sciigis la ĉeestantaron pri la esperantomovado en Rumanujo. Li menciis, ke Esperanto en lia lando akiris grandegajn sukcesojn kaj ke Esperanto en la tiea policoficira lernejo estis oficiale enkondukita.

D-ro Toth, polica konceptisto en Budapeŝto parolis pri la polica deĵorado kaj E-movado inter la policanoj tutmonda kaj fuisis la neceson interrilati kun la registaroj de diversaj landoj. Plue li parolis pri policesperantaj kursoj kaj proponis, ke ĉiu ano de iu grupo estu samtempe membro de la T. P. L.

Kunsidestro Hirz atentigis la kolegojn ke la polica revuo „Öffentliche Sicherheit“ („Publika Sekureco“), organo de ĉiulandaj poliestroj aligintaj al la Polica Internacio, tre afable akceptas artikolojn pri Esperanto.

Policespektoro Meisleder raportis pri tre vigla laboro kaj movado inter la policistoj en Linz kaj aliaj provincurboj en la supra Aŭstrujo; li menciis, ke la tiea centrala inspektoro D-ro Wirth devige enkondukis Esperanton ĉe la polica lernejo.

Ĝendarma ĉefserĝento Wavrovsky el Praha sciigis pri la E-movado en tiu ĉi urbo, kie ĝis nun oni tre malvige laboris.

Fine esprimis Hirz la deziron, ke dum la T. P. L. -Kongreso fin-aŭguste multe da policistoj ĉiurangaj ĉeestu, por ke la Kongreso per multnombro povu atingi la deziritan celon, nome, ke Esperanto „ĉie“ inter la policanoj tutmonda estu oficiale enkondukita.

M. Rafelseder, Sekretario.

La unua konferenco de Tutmonda Esperanto-Asocio Junulara. Vendrede kaj sabato okazis la unuaj kunsidoj de T. E. A. J., kiuj ambaŭ, malgraŭ ke la kongresanoj ne aperis en granda nombro, tamen tre bone sukcesis. La decidoj kiujn la kunsido akceptis, estas tre gravaj por la vivo de la Asocio kaj samtempe por la tuta junulara movado, do oni certe povas esperi, ke per tiuj ĝustaj decidoj la asocio povos plue konstante disvolviĝi.

La kunsidojn ĉeestis ĉirkaŭ 30 personoj, kiuj grandparte estis jam delonge membroj de T. E. A. J. Post la malfermaj vortoj de sam. Rudolf Pivl, oni elektis laŭ la propono de sam. Andreo Rácz la komitaton de la asocio konsistanta el Rudolf Pivl, prezidanto; Andreo Rácz vicprezidanto, Alfred Neupert, administranto. Oni akceptis novan regularon. Oni elektis redaktan komitaton por la gazeto: R. Pivl por la oficiala parto, A. Rácz por literaturo kaj Esperanto-movado kaj A. Neupert kiel respondecan redaktoron. La komitato por la Junulara Biblioteko konsistas el la prez. kaj vicprez. La kunsido pritraktis poste la rilatojn kun diversaj Esp. asocioj, kiujn ĝi intencas koncentrigi en T. E. A. J. — La Asocio petas tiujn gesamidanojn, kiuj intencas informojn pri la asocio kaj la junulara movado, voli ĉeesti marde (12-a Aŭg.) posttagmeze de la 3-a ĝis la 5-a antaŭ la „Junulara“ stando, kie la estraro donos detalajn informojn.

Prelego. F. W. Hling, ELA, parolos, ĉar la tempo ne sufiĉis en la studenta faka kunsido, marde je la 8^{1/2} a en la 2^a kunsido de ELA mallonge pri la temo „Problemoj kaj vojoj de Esperanto-scienca estonteco“. Ĉiuj interesuloj pri scienca laboro esperantologia invitataj.

Esperanta ligo de tabakkontraŭuloj. La fondota ligo de Esperantlingvaj tabakkontraŭuloj havas duoblan celon: unuflanke ĝi utilos al la kontraŭtabaka movado per kunigo de samideanoj el la plej diversaj landoj kaj lingvoj kaj per reciproka sciigo de progresoj, konsilioj, sangoj de proponoj ktp., aliflanke ĉi tiu asocio komunikos la tiel humanajn kaj noblajn celojn de kontraŭtabaka movado kaj la diversspecajn malutilojn de fumado al la Esperantistaro jam ideale sentanta kaj privos la necescon de mondbelplingvo Esperanto. — Kora invito al tabakkontraŭula fakkunveno de la XVI-a Universala Kongreso, kiu okazos lunde la 11-an de aŭgusto 1924 je la 5-a posttagmeze en salono Wien I., Kleeblattgasse 7/II (proksime de Tuchlauben). Tagordo:

1. la kontraŭtabaka kaj la Esperanto movadoj,
2. fondo de „Esperantista tabakkontraŭula asocio“ (regularo, estraro ktp.),
3. diskuto pri la laborplano kaj propagando.

Gastoj bonvenantaj!

Jurnalistoj! Raportantoj! Fakestroj!

Zorgu pri preciza kaj rapida inform-servo en la „Bulteno“! Ĉiuj seligoj, raportoj kaj aktual-tamaj artikoloj venu legeble skribite senprokraste en la manojn de la ĉefsekretario!

DOROTHEUM


Wien, I., Dorotheergasse 17

Bankfako


Aĉeto kaj Vendo de valutoj, biloj kaj devizoj
Aŭkcio de uzad-objektoj ĉiutage de la 15^a
De mardo ĝis vendredo ankaŭ juvelaĵoj. Ekspozicio de la 13^a

BILDOJ EL VIENO

el Lechner'a Albumo de Vieno, eldonita de la Universitata Librejo R. Lechner (Vilh. Müller),
Wien, I., Graben 51.




La Monumento de Grillparzer
Grillparzer-Denkmal — Le Monument de Grillparzer — The Monument of Grillparzer



Kortega Muzeo, la ŝtuparo
Hofmuseum, Stiegenhaus — L'Escalier du Musée Impérial
The Staircase of the Imperial Museum



La monument-fontano de Pallas Athene
Pallas Athene-Brunnen — La Fontaine monumentale de
Pallas-Athène — The Monumental fountain of Pallas Athena



La katedralo de S^{to} Stefano
 Stephansdom — La Cathédrale Saini-Etienne — St. Stephen's Cathedral



La monumento de arkidukino Maria Kristina
 Chrislinen-Denkmal — Le Monument de L'Archiduchesse Marie Christine —
 The Monument of Archduchess Mary Christina

Burggarten

(Kastelgardeno) ĉiutage je la 8^a vespere (se pluvas en la festsalono de Hofburg)

Sinfoniokonzertoj — Operoj — Kabaredoj.

Ludas la Viena Sinfonio-orkestro.

Vendado de kartoj en koncert-direkciejo Vindobona, Karlsplatz, vendejhala, aŭ en Burggarten.

Bonega tagmanĝo

en la komunaj manĝejoj de Mittella-A. G.

Malfermaj dum labortagoj:

I. Himmelfortgasse 8. — I. Ballhausplatz 1 (Hofburg). — I. Postgasse 9 (alte Postsparkasse). — I. Liebiggasse 6 (altes Korpskommandogebäude). — I. Nibelungengasse 10. — I. Schillerplatz 4. — III. Landstrasser Hauptstrasse 146. — VI. Mariahilferstrasse 88a (Zitahof, I. Stock). — VII. Kirchengasse 13. — VIII. Josefstädterstrasse 43. — IX. Porzellangasse 33.

Malfermaj ankaŭ dum dimanĉoj kaj festotagoj: I Schillerplatz 4. — VIII. Josefstädterstrasse 43.

Sinanonco ĉe la kuirejestroj!

Neniu trinkmono. Neniu alkoholo.

Manĝtempo 12^a—3^a, dum dimanĉoj kaj festotagoj 12^a—2^a.

Manĝaĵoj povas esti ankaŭ forportataj.

Prezoj en abono:

A-menuo:

K 4000 (Supo, legomo kun aldonajo, farunajo.)

B-menuo:

K 8000 (Supo, viando kun aldonajo, farunajo.)

C-menuo:

K 11.000 (Supo, viando kun aldonajo, farunajo.)

D-menuo:

K 13.500 (Supo, rostaĵo kun aldonajo, farunajo.)

Alpago por unuopaj manĝkarto: por A-menuo K 500, por B-, C- kaj D-menuoj K 1000.

Dimanĉa menuo K 15.000

Krome apartaj manĝaĵoj en granda elekto kaj je malgrandaj prezoj.

Opero-Restoracio kaj -Kafejo

Wien, I., Operngasse 8

kontraŭ la Ŝtata Operejo.

Menuoj laŭ fiksaĵoj prezoj kaj laŭ la manĝaĵoj-listo.

Esperanto-Literaturo

ĉiuspeca el nia eldonejo estas havebla en granda sortimento en la

Kongresa Librejo.

Precipe ni atentigas pri niaj kolektoj

Esperanta Biblioteko Internacia

Nova Esperanto-Biblioteko

kaj pri nia gazeto

Germana Esperantisto

(Specimenaj numeroj en la Kongresa Librejo)

Esperanto-Verlag Ellersiek & Borel G. m. b. H.

Berlin kaj Dresden.

Aŭstruja Akcia Societo por Aeroplanvojaĝoj

Ĉiutagaj Flagoj de

Prezoj de flugo:

| | | | |
|------|--------------|------------|-----------|
| Wien | München'on | Aŭstr. Koj | 900.000 |
| | Nürnberg'on | " " | 1.350.000 |
| | Frankfurt'on | " " | 1.950.000 |
| | Zürich'on | " " | 1.760.000 |
| | Genève'on | " " | 2.350.000 |
| | Budapest'on | " " | 400.000 |

Rondflugoj super Wien kaj la Wien'a Arbaro

(Daŭro proks. 20 minutoj) Prezo Aŭstr. Koj 150.000 por unu persono

En Junkers plenmetalaj Limuzinoj

Flugbiletoj kaj informoj en „Oesterreichisches Verkehrsbureau“, Wien I, Friedrichstrasse 1
Telephon 52-5 90

Fabriko de Fortepianoj Pallik kaj Stiasny

Wien, VII., Neubaugasse 68.

Telefona 32-4-59, 54-5-15.

Pianinoj, koncert-fortepianoj kun angla aŭ Wien'a mekaniko, bonega kvalito.

Fondita 1894.

Honora Diploma

Jubilea Ekspozicio 1898.

(Aŭstria oficejo por trafiko)

Oesterreichisches Verkehrsbureau

Centro Wien, I., Friedrichstrasse Nr. 1

(kontraŭe de Sezession)

Telefona: 52-5-90 Serie. Telegramadreso: Austriaverkehr.

Filioj kaj reprezentadoj en kaj eksterlande

entreprenoj por ŝipaj kaj aeroplanaj veturadoj.

— Sipkomunikoj al ĉiuj gravaj havenoj. — Propri

banko. — Societaj kaj aŭtomobilaj vojaĝoj. —

Informoj pri ĉiuj vojaĝ-aferoj.

De la 7^a Aŭgusto propra servado en Konzerthaus

(Kongresejo).

Anglo-Austrian Bank Limited

London, 24, Lombard Street, E. C. 3

Vienna Representation I, Strauchgasse 1

Capital Authorized. £ 2.000.000

Capital Issued 1.406.370

Reserves 575.156

Telegrams: Anglobank Vienna — Telephone: 63570

21 monsaĝejoj en Vieno

Sidlokoj:

Aŭstrujo: Baden ap Wien, Bregenz, Gmünd, Graz, Graz-Hauptbahnh. (ĉefa stacidomo), Innsbruck, Krams, Laa a. Th., Linz, Mariazell, Semmering, St. Pölten, Villach, Villach-Bahnhof (stacidomo), kaj Velden ĉe Wörthersee, Wels, Wiener Neustadt. — Jugoslavo: Maribor. — Hungarujo: Budapest, monsaĝejoj: Calvinplaco kaj Elisabethring. — Italujo: Trieste. — Rumanujo: Czernowitz, Grosswarden. Ĉiubankaj transakcioj estas efektive gataj

VIAN VOJAĜPAKAĴON

asekuras kun la plej favoraj kondiĉoj

„DER ANKER“

ĝenerala Akcia Societo por Asekuroj

Wien, I., Hoher Markt 10/11 Tel. 66-5 55

Serie.

Vojaĝoficejo „Klea“

Wien, VI., Mariahilferstrasse 85/87

(en la komercejo „Klea“)

Tel. 54-27 kaj 64-72.

Veturbiletoj laŭ ĉiu direkto de en- kaj eksterlando, veturbiletoj por ĉiuj vaporsiplinioj, asekuro de pakajoj ktp.

Seninterrompa servo (ankaŭ sabate) de la 9^a ĝis la 17^a

Restoracio Francisko Falk

„ZUM STADTPARK“

I. Kolowratring 1, apud la Urba Parko,

nur unu minuton de la Kongresejo „Konzerthaus“.

rekomendas al la kongresanoj sian bonegan manĝotablon

tagmezan kaj vesperan. Modernaj prezoj kaj bona

servado, distinga biero kaj bonaj vinoj.



Laŭda Kanto

pri

Farina „Gegenüber“

dem Jülichplatz (kontraŭ Jülichplaco)

La plej Malnova kaj la plej Bona

KOLNA PARFUMAKVO

Grandaj Vendoj
Favorprezoj de Objektoj
Mastrumaj kaj Vestaj

Stata A. G. Zentralpalast

VII., Mariahilferstrasse
Ecke Kaiserstrasse.

Kongresa Bulteno



Oficiala Organo de la XVI^a Universala Kongreso de Esperanto Wien-Vieno 1924

Redakcio: Koncert-Palaco, Wien, III., Lothringerstr. 20.

Redaktoro: D^{ro} Emil Pfeffer.

Nur rekte, kuraĝe kaj ne flankigante!

Legeble skribitaj manuskriptoj por la redakcio estu transdonataj en la kongresejo al la ĉefsekretario.

Numero 6.

Wien-Vieno, mardo, 12. Aŭgusto 1924.

Aperas ĉiutage.

„Gloro la celo, sankta l' afero,
La venko — baldaŭ ĝi venos;
Levos la kapon ni kun fiero,
La mondo ĝoje nin benos.

Tiam atendas nin rekompenco
La plej majesta kaj riĉa:
Nia laboro kaj pacienco
La mondon faros felika!“

D-ro L. L. Zamenhof.

La triumftagoj de Esperanto en Wien.

La dimanĉa Festkunveno de la XVI-a en la granda ĉambrego de Koncert-Palaco, okupita ĝis la lasta loketo, prezentis vere pentrindan fascinantan bildon, ĉar nome slavaj, sed ankaŭ nordaj kongresaninoj kaj kongresanoj aperis — same kiel jam por la salutvespero sabate en Koncert-Palaco — en siaj kolorpompantaj popolaj kostumoj. En la unua vico havis la vidvino de dro Zamenhof kaj unu el ŝiaj filinoj, venintaj el Varsovio al la Kongreso, siajn honorajn lokojn.

Je la 1/211 horo sekvis malantaŭ la bele brodita standardo de Esperantaj mondkongresoj, kiu post longa forperdiĝo feliĉe antaŭ tiu ĉi kongreso estis retrovita en Wiesbaden kaj alportita al Vieno, post orgena preludo la solena enmarŝo de l' Kongresa Prezidantaro kaj de honorgastoj sur la estradon.

Ĉe la tablo de l' Prezidantaro okupis la lokon kun dro Dietterle (Leipzig), la prezidanto de la XV-a en Nürnberg, la prezidanto de l' centra ekzekutivo dro Privat (Ĝenevo), la ministeria konsilisto de l' trafikministerio dro Minibeck

(Vieno), kiel elektita prezidanto de la XVI-a, la vicprezidanto de Esperanto-Akademio Mr. Warden, la prezidanto de l' nacia reprezentaro ĉe la kongresoj kaj de la Brita Esperanto-Asocio Mr. Merchant, plue lokaj komitatanoj redaktoro Schröder, membro de Lingva Komitato, kaj s-o lerneja direktoro Schamanek, lektoro de Esperanto ĉe la Viena Tekniko, por Aŭstrujo, Aktargieff por Bulgarujo, prof. Kamaryt por la Ĉeĥosl. Respubliko, dep. dro Steche (Dresden) por Germanujo, prof. Deligny por Francujo, pastro s-o Lajos por Hungarujo, dro Philipetti

de la trafikministerio, por la lando kaj komunumo Wien la vicurbestro Emmerling, supera magistrata konsilisto Paul kiel reprezentanto de l' urba lerneja konsilantaro, por la polica prezidanto Schober polica direktoro dro Schulz, por la Viena Universitato la dekanato de la filozofia fakultato prof. dro Suess kaj la reprezentantoj de la plej signifaj socialaj kaj komercaj korporacioj en Wien.

El la eksterlandaj registaroj sendis oficialajn reprezentantojn por la Kongreso: Polujo la extraordinaran ambasadoron dron Lasocki en Wien, la germana ministerio de l' internaj aferoj dron Dietterle, la hispana ministerio de milito kaj la Ruĝa Kruco la Komandanton Mangada, Holando la inĝenieron Isbrücker, la komerca ministerio en Rumanujo la grandindustriiston Fisher kaj la samlanda ministerio de l' internaj aferoj kaj de la sekureco la polican oficiiron Morariu. Kiel delegito de Internacia Ruĝa Kruco ĉeestis Mr. Horner, kiel reprezentanto de blindulkongresoj prof. Krtsmayr (Weidlingau).

La naciaj Esperanto-Asocioj estis reprezentataj per s-ino Scammel (Aŭstralio), s-ino Ŝiŝmanov (Bulgarujo), univ. prof. Tsai (Ĥinujo), la s-oj prof. Kamaryt (Ĉsl. Respubliko) kaj Scholze (Germanoj en Ĉsl. Respubliko), Blicher (Danujo), Aeltermann (Liberŝtato Danzig), Tamverk (Estonujo), f-ino Tamminon (Finnlando), Mr. Deligny (Francujo), dro Steche (Germanujo), Mr. Merchant (Britujo), pastro Carolli (Italujo),

pastro Lajos (Hungarujo), s-o Domac (Jugoslavio), s-o Grot (Latvio), s-o bankdirektoro Medem (Litovujo), s-ino Jaquel de Guerra (Meksiklando), la parlamentano f-ino Westermann (Holando), profesoro Odo Bujvid (Polujo), abato Ceh (Rumanujo), s-o Markus (Ruslando), Mr. Kennedy (Skollando), s-o Munoz (Urugvajo), profesoro dro Kenn (Ĥinujo).

La Festsoleno.

Min. kons. dro Minibeck salutis kiel Prezidanto la Kongreson, S-inon Zamenhof kun ŝia filino kiel ankaŭ la honorgastojn, kiuj siaflanke per mallongaj germanaj paroladoj agnoskis la signifon de la Kongreso. Univ. prof. dro Suess aldonis al siaj ger-



Lia Eminenco kardinalo PIFFL (Wien) meze de katolikaj Esperantistoj partoprenantaj la XVI-an.

por Italujo kaj univ. prof. Odo Bujvid por Polujo kiel vicprezidantoj de la XVI-a, plue s-o Smital (Vieno), prezidanto de la Delegitaro de 20 Vienaj esp. societoj, kaj la s-oj Edmonds kaj Kreuz, tiu ĉi kiel reprezentanto de U. E. A., kiel sekretarioj, dum la membroj de Viena L. K. organizintaj kun s-o prokuristo Schade, la ĝenerala sekretario, tiun ĉi kongreson, malantaŭ ili havis siajn lokojn. Kiel helpsekretarioj funkciis dro Blaas (Rattenberg en Tirolo) kaj dro Halbedl (Graz).

Kiel honorgastoj

ĉeestis: sekcia ĉefo Karicky kiel reprezentanto de la registaro kaj sekcia konsilisto dro Lanske


TUTMONDA VOJAĜOFICEJO
THOS. COOK & SON
Wien, I., Stefansplatz 2

vendas veturbiletojn por fervojo kaj vaporŝipo al ĉiuj landoj de la tero, lokojn en litvagonoj, ŝanĝas monon, havigas biletojn por rondveturadoj en la urbo, asekuron de vojaĝpakaĵoj, loĝejon en hotelo, gvidlibrojn por vojaĝoj ktp.

==== Informoj senpage. ====

BILDOJ EL VIENO


el Lechner'a Albumo de Vieno, eldonita de la Universitata Librejo R. Lechner (Vilh. Müller),
Wien, I., Graben 31.




La monumento de Maria Teresa
Maria Theresia-Denkmal — Le Monument de Marie Thérèse — The Monument of Mary Theresa



La monumento de Bruckner
Bruckner-Denkmal — Le Monument de Bruckner
The Monument of Bruckner




La nimfo de Danubo
Donauweibchen — La Nympe du Danube
The Nymph of the Danube



La Kursalono en la Urba Ĝardeno
 Kursalon im Stadtpark — Le Kursalon dans le Jardin de la Ville — The Kursalon in the City Park



La eniro al Prater Prater-Eingang L'Entrée du Prater The Entrance to Prater



La Rotondo Rotunde La Rotonde The Rotunda

Burggarten

(Kastelgardeno) ĉiutage je la 8^a vespere (se pluvas en la festsalono de Hofburg)
Sinfoniokonzertoj — Operoj — Kabaredoj.
 Ludas la Viena Sinfonio-orkestro.
 Vendado de kartoj en koncert-direkciejo Vindobona, Karlsplatz, vendejhala, aŭ en Burggarten.

Bonega tagmanĝo

en la komunaj manĝejoj de Mittella-A. G.

Malfermaj dum labortagoj:

I. Himmelfortgasse 8. — I. Ballhausplatz 1 (Hofburg). — I. Postgasse 9 (alte Postsparkasse). — I. Liebiggasse 6 (altes Korpskommandogebäude). — I. Nibelungengasse 10. — I. Schillerplatz 4. — III. Landstrasser Hauptstrasse 146. — VI. Mariahilferstrasse 88a (Zitahof, I. Stock). — VII. Kirchengasse 13. — VIII. Josefstädterstrasse 43. — IX. Porzellangasse 33.

Malfermaj ankaŭ dum dimanĉoj kaj festotagoj:
 I. Schillerplatz 4. — VIII. Josefstädterstrasse 43.

Sinanonco ĉe la kuirejestroj!

Neniu trinkmono. Neniu alkoholo.
 Manĝtempo 12^a—3^a, dum dimanĉoj kaj festotagoj 12^a—2^a.

Manĝaĵoj povas esti ankaŭ forportataj.

Prezoj en abono:

A-menuo:
 K 4000 (Supo, legomo kun aldonajo, farunajo.)
B-menuo:
 K 8000 (Supo, viando kun aldonajo, farunajo.)
C-menuo:
 K 11.000 (Supo, viando kun aldonajo, farunajo.)
D-menuo:
 K 13.500 (Supo, rostaĵo kun aldonajo, farunajo.)
 Alpago por unuopaj manĝkarto: por A-menuo K 500, por B-, C- kaj D-menuoj K 1000.

Dimanĉa menuo K 15.000.

Krome apartaj manĝaĵoj en granda elekto kaj je malgrandaj prezoj.

Opero-Restoracio kaj -Kafejo

Wien, I., Operngasse 8
 kontraŭ la Ŝtata Operejo.
 Menuoj laŭ fiksa prezo kaj laŭ la manĝaĵoj-listo.

Esperanto-Literaturo

ĉiuspeca el nia eldonejo estas havebla en granda sortimento en la **Kongresa Librejo.**

Precipe ni atentigas pri niaj kolektoj

Esperanta Biblioteko Internacia
Nova Esperanto-Biblioteko

kaj pri nia gazeto

Germana Esperantisto

(Specimenaj numeroj en la Kongresa Librejo)

Esperanto-Verlag Ellersiek & Borel G. m. b. H.

Berlin kaj Dresden.

Aŭstruja Akcia Societo por Aeroplanvojaĝoj

Ĉiutagaj Flugoj de

| | | Prezoj de flugo: | |
|------|--------------|-----------------------|--|
| | | Aŭstr. K ^o | |
| Wien | München'on | 900.000 | |
| | Nürnberg'on | 1,350.000 | |
| | Frankfurt'on | 1,950.000 | |
| | Zürich'on | 1,760.000 | |
| | Genève'on | 2,350.000 | |
| | Budapest'on | 400.000 | |

Rondflugoj super Wien kaj la Wien'a Arbaro

(Daŭro proks. 20 minutoj) Prezo Aŭstr. K^o 150.000 por unu persono

En Junkers plenmetalaj Limuzinoj

Flugbiletoj kaj informoj en „Oesterreichisches Verkehrsbureau“, Wien I, Friedrichstrasse 1
 Telephon 52-5 90

Fabriko de Fortepianoj Pallik kaj Stiasny

Wien, VII., Neubaugasse 68.

Telefono 32-4-59, 54-5-15.

Pianinoj, koncert-fortepianoj kun angla aŭ Wien'a mekaniko, bonega kvalito.

Fondita 1894.

Honora Diploma Jubilea Ekspozicio 1898.

(Aŭstria oficejo por trafiko)

Oesterreichisches Verkehrsbureau

Centro Wien, I., Friedrichstrasse Nr. 1 (kontraŭ de Sezession)

Telefono: 52-5-90 Serie. Telegramadreso: Austriaverkehr. Filioj kaj reprezentantoj en kaj eksterlande entreprenoj por ŝipaj kaj aeroplanaj veturadoj. — Ŝipkomunikoj al ĉiuj gravaj havenoj. — Propra banko. — Societaj kaj aŭtomobilaj vojaĝoj. — Informoj pri ĉiuj vojaĝ-aferoj.

De la 7^a Aŭgusto propra servado en Konzerthaus (Kongresejo).

Anglo-Austrian Bank Limited

London, 24, Lombard Street, E. C. 3
 Vienna Representation I. Strauchgasse 1

Capital Authorized: £ 2,000.000
 Capital Issued 1,406.370
 Reserves 375.156

Telegrams: Anglobank Vienna — Telephone: 63570

21 mensejoj en Vieno

Sidlokoj:

Aŭstrujo: Baden ap. Wien, Bregenz, Gmünd, Graz, Graz-Hauptbahnh. (ĉefa stacidomo), Innsbruck, Krems, Laa a. Th., Linz, Mariazell, Semmering, St. Pölten, Villach, Villach-Bahnhof (stacidomo), kaj Velden ĉe Wörthersee, Wels, Wiener Neustadt. — Jugoslavujo: Maribor. — Hungarujo: Budapeŝto, mensejoj: Calvinplaco kaj Elisabethring. — Italujo: Trieste. — Rumanujo: Czernowitz, Grosswardein. Ĉiubankaj transakcioj estas efektive gataj

VIAN VOJAĜPAKAĴON

asekuras kun la plej favoraj kondiĉoj
„DER ANKER“
 ĝenerala Akcia Societo por Asekuroj
 Wien, I., Hoher Markt 10/11 Tel. 66-5 55 Serie.

Vojaĝoficejo „Klea“

Wien, VI., Mariahilferstrasse 85/87
 (en la komercejo „Klea“)

— Tel. 54-27 kaj 64-72. —

Veturbiletoj laŭ ĉiu direkto de en- kaj eksterlando, veturbiletoj por ĉiuj vaporsiplinioj, asekuro de pakajoj ktp.

Seninterrompa servo (ankaŭ sabate) de la 9^a ĝis la 17^a

Restoracio Francisko Falk

„ZUM STADTPARK“

I. Kolowratring 1, apud la Urba Parko, nur unu minuton de la Kongresejo „Konzerthaus“, rekomendas al la kongresanoj sian bonegan manĝotablon tagmezan kaj vesperan. Moderaj prezoj kaj bona servado, distinga biero kaj bonaj vinoj.



Laŭda Kanto

pri

Farina „Gegenüber“

dem Jülich'splatz (kontraŭ Jülichplaco)

La plej Malnova kaj la plej Bona KOLNA PARFUMAKVO

Eksterlandaj Kapitalhavantoj

povas asociiĝi

por bona procentigo de kapitalo investita al solidaj, prosperon promesantaj

Entreprenejoj Wien'aj por Industrio kaj Komercio

Proponoj kun informo pri la disponebla mono sub la cifro „Paclaboro“ al Julius Szekely, Wien, III., Untere Weissgärberstrasse 49.

La plej nova invento

de l' branĉo elektroteknika por la tuta eksterlando estas fordonebla. Ekstremita profitodona. — Skribaj demandoj al Eduard Hubmayer, Wien., II, Linnegasse 1/7.

Kongresa Bulteno



Oficiala Organo de la XVI^a Universala Kongreso de Esperanto Wien-Vieno 1924

Redakcio: Koncert-Palaco, Wien, III., Lothringerstr. 20.

Redaktoro: D^{ro} Emil Pfeffer.

Nur rekte, kurage kaj ne flankigante!

Legeble skribitaj manuskriptoj por la redakcio estu transdonataj en la kongresejo al la ĉefsekretario.

Numero 7.

Wien-Vieno, ĵaŭdo, 14. Aŭgusto 1924.

Aperas ĉiutage.

*„Tros senhalte via laboro
Honeste kaj esperante?
Brulos la flamo en via koro
Neniam malfortigante?“*

*Forte ni staru, brave laboru,
Kurage, ho nia rondo!
Nia afero kresku kaj floru
Per ni en tuta la mondo!*

*Malfacileco, malrapideco
Al ni la vojon ne baros,
Sen malhonora malkuraĝeco
Ni kion povos, ni faros!“*

D-ro L. L. Zamenhof.

Vortoj de l' adiaŭo.

En flugo de la tempo nehalte forglitis tagoj neforgeseblaj. El la maro ondanta de homaj kaj naciaj pasioj, de disputoj kaj kontraŭbataloj ĉiuspecaj por nur unu semajno estis leviĝinta „insulo de feliĉuloj“ kun loĝantaro staranta kvazaŭ ekster kaj super la cetera homaro: modelo de homaro estonte interligita per reciproka amo, per reciproka kompreno, per reciproka ŝato. Songo efektiviĝis kvazaŭ por unu momentó en la historio de la mondo kaj tiu bela songo nun estas foraperanta.

De la 6-a nunmonata ĝis hodiaŭ ĉiutage ariĝis ĉirkaŭ kaj en la moderna granda domo de muzikarto en Wien, kies nomo estas „Konzerthaus“, viroj kaj virinoj preskaŭ ĉiuagaj, de maljunaj, eĉ maljunegaj ĝis infanoj provantaj la unuajn malfacilajn paŝojn en ĉi-tiu malfacila vivo. Kaj ilin ĉiujn ĉirkaŭvolvis nevideble verda rubando signifanta la esperon, ke ilia ekzemplo tiros la ceterajn homojn al tiu genia ligilo internacia kiun Zamenhof donacis al ĉiuj popoloj per sia „Esperanto“. Tiuj loĝantoj de la mistera insulo de feliĉuloj, de Esperantujo, interbabilis gajanime bonhumore, egale, ĉu ilia lulilo iam staris ie en la sudo aŭ la nordo, oriento aŭ okcidento de la terĝlobo. La vorto „Samideanoj“ estis la „Sesam“ el Mil kaj Unu Noktoj: kiu malŝlosis la eniron al la trezoroj de koro kaj de spirito, la „Selam“ de Orientlandano per kiu li salutas renkontatorn. Tia ĉi unu vorto kvazaŭ forviŝis el iliaj animoj dum tiu tempo de kunesto la mentoron pri diversnacieco, ĝi vekis en ili la konscion, estis antaŭ ĉio cetera homoj kun homoj, fratoj de unu patro, gefiloj de unu familio.

Kaj plenigite de tiu alta sento ili montris sin frato al frato, kore skuis la manojn unuj al aliaj, afable demandis kaj respondis, eĉ ne pensante pri tio, ke post kelke

da tagoj la blovo de la tempo nehalte dispelos ilin al ĉiuj regionoj de la kvin terpartoj.

Nun alvenos tiu ĉi momento. Nun la Esperantujoj devas adiaŭi unuj al aliaj, ironte kvazaŭ en ekzilon el la revita paradizo, kie, „komprenante unu la alian“ ili estis unu granda rondo familia. Sed hejmen ili porias la refreŝigon de la koro kaj de la animo, la ĝojon de spirito, ke kie ajn sur la tero ili loĝas, ili ĉie sur ĝi posedas geamikojn, sentantajn kaj laborantajn kun ili unuanime por tiu sama alta celo.

Certe, la malfavoraj nunaj cirkonstancoj ekonomiaj multajn el la samideanaro ĉiulanda malhelpis ĉeesti — kvankam anoncinte sin por ĝi — la Deksesan en Wien, kaj ankaŭ multaj el la venintaj al ĝi vidis sin devigataj, ludi ĉi tie — tre bedaŭrinde — la rolon de „Avarulo“ anstataŭ tiu de „Malŝparulo“; la ĉiutaga vivo kun la distroj en fremda granda urbo konsumis neatendite rapide la eble kun peno dum tuta jaro ŝparitan monon por tiuj tagoj en Esperantujo. Tamen ankaŭ tiuj, kiuj ne povis travivi la tutan semajnon de la XVI-a, kunportis hejmen memoron, kiu povos ĝojigi ilin pri la nun komenciĝanta tempo de atendo je la XVII-a. Kaj kiuj estis tiom feliĉaj ĝui eĉ la lastan guton el la pokalo prezentita al ili de la Deksesa, sincere diros — ni esperas ĝin — „Belaj estis la tagoj en Wien!“

La efiko eksteren de tiu malgraŭ ĉiuj malhelpaj cirkonstancoj impona kurveno de ĉiulandanoj samlingvaj en la Aŭstruja ĉefurbo estis plenkontentiga. La loĝantoj de Wien miris pri la ekzisto de tiom da Esperantistoj ĉiunaciaj kaj per la buŝo de sia ĵurnalaro ili sen escepte plenaprobis la ĝis nun ofte subtaksaian lingvon internacian. La brila festkunsido de la Kongreso rimarkeble imponis al la reprezentantoj de la Aŭstrujaj ministerioj kaj korporacioj, la honorgastoj kaj la ĵurnalistoj (heroldoj de famo) kaj la bonega prezentado teatra de „La Malŝparulo“ elvokis laŭdon plenmeritan ne nur de la Esperantista popolo, sed ankaŭ de la loka kritiko pri la taŭgeco de la „artefarita“ lingvo ankaŭ por tia alta spirita tasko. „Exempla trahunt“ — ekzemploj alliras — la ĝusteco de tiu malnova proverbo praviĝis ĉi tie kaj, kion ĝis nun en Wien „verba docent“ (diroj instruas) ne povis efiki sufiĉe amplekse, tion nun efikos la memoro pri tiuj brilaj ekzemploj. La plej esenca celo de ĉiuj Esperanto-kongresoj estis atingita ankaŭ en Wien: sukcesa propagando de nia kara lingvo.

Kaj nun adiaŭiri ni devas unuj al aliaj, amikoj delongaj, ĉi tie renkontiĝinte

kaj sincere ĝojinte pri la revido post tiom da — ho, kiom peza, grava — tempo, ne malofte de post la unua el niaj kongresoj, kaj amikoj „freŝbakitaj“, kiuj nur nun, ĉi tie interkoniĝis kaj tuj interfratiĝis. Adiaŭiri nun ni devas ĉiuj, la ĉi tie restantaj en sia hejmo kaj la ofte sur longa vojo hejmen veturontaj samideanoj. Sed ni ĉiuj ankaŭ havas kun la vorto adiaŭ sur la lipoj, tremantaj pro doloro pro la disiĝo, la esperon en la koro, ke efektiviĝos niaj lastaj vortoj, kortuŝite eldiritaj al ĉiuj XVI-anoj: Ĉis revido!

Por la paco de l' mondo.

Lunde okazis en la granda ĉambrego de Koncert-Palaco sub la protekto de la dekano de l' filozofia fakultato ĉe la Viena Universitato, prof. dro Francisko Suess granda pacifista manifestacio. La granda ĉambrego (ampleksanta 3500 homojn) estis same kiel dum la festkunsido dimanche plenigita ĝis la lasta loko. La inviton de l' prezidantaro sekvis arkaŭ multnombraj neesperantistoj. Sur la estrado okupis la seĝojn reprezentantoj de la diversaj nacioj, malantaŭ ili staris unu aŭstra kaj unu slava kampulino, portantaj grandegan tabulon kun la surskribo de l' Pacifista Esperanta Ligo.

La Bach'a preludo per orgena muĝo eksonis tra l' ĉambrego, solene ludita de Karl Mätzl. La ĝenerala sekretario Frey komunikis la decidon, ke Vieno estas estonte la sidejo de l' Esperantista Pacifista Ligo. Poste parolis la protektanto de l' pacifista manifestacio prof. Suess, kiu sian profundan paroladon finis per la vortoj: „El la vero elfluas per si mem la justeco. Ĉi estas la sole ebla fundamento de daŭra paco inter la popoloj kaj ŝtatoj. Faru Esperanton ne nur la teknika helprimedo de l' pensa interŝanĝado inter diverslingvaj popoloj, sed ankaŭ samtempe la portanto de pli alta etika konscio, peranto de vero kaj justeco, tiam vi al la artefarita Zamenhofa kreitaĵo inspiras por ĉiam vige pulsantan vivon.“

La prezidanto de l' Esperanta Instruista Ligo Degen akcentis, ke lia organizaĵo, al kiu apartenas instruistoj el ĉiuj landoj de la tero, sin statute devigis labori ekskluzive en absolute pacifista senco. La ĥina oratoro Kenn diris en spiritoplena parolado: „La vorto paco konsistas en ĥina lingvo el du vortoj: Harmonio kaj Egaleco. En tio ĉi kuŝas profunda senco. Paco povas nur tiam esti daŭra, se en harmonio egaluloj vivas apud egaluloj.“

La germana parolantino, fino Zschepank (Dresden) diris: „Ni kongresas en Vieno, en la urbo de gaj-serena homa speco, kun la varma koro, en la urbo de la muziko, en la urbo de malnovaj artoj, el kiuj speciale la muziko trans ĉiaj limoj kunligas la homaron. Ĉu Esperanto

en tio ĉi ne similas la muzikon? Mi memorigas al mi nun la grandajn majstrojn, kiuj tie ĉi kreis, ankaŭ la grandan popolan poeton Raimund, kies verko hodiaŭ estas enscenigata. Ni estas fieraj, ke unu el niaj plej malnovaj kolegoj, s-o Kolonelo Zwach el Vieno, estas la tradukanto de tiu ĉi verko.

Post tio inaŭguris s-o Mätzl per la Reger'a „Benediktus“ la duan parton de l' kunveno kaj la kortegteatra aktoro Filip Zeska deklamis kun entuziasmiga efekto „La Preĝon sub la Verda Standardo“. Kiel pluaj oratoroj, kontribuintaj por la granda sukceso de tiu ĉi manifestacio parolis Isbrücker (Haag) kaj dro Privat, la granda parol-artisto. Por al la multenombre venintaj gastoj neesperantistaj komprenebligi ĉiujn paroladojn, ili estis poste ĉiam tradukitaj germanen. La „Espero“ kantita de la tuta ĉeestantaro, finis tiun grandiozan manifestacion, kiu postlasis en Vieno la plej profundan impreson kaj estis en flataj artikoloj detale preparolita de ĉiuj Vienaj ĵurnaloj.

Parolado de Lia Eminenco Kardinalo Piffil

al la Katolikaj Esperantistoj, partoprenantaj la XVI-an.

Akceptu mian elkoran esprimon pro la vortoj de afabla saluto. Mi ja ne devas certigi, ke volonte mi venis hodiaŭ al la kunsido de la kongreso, ĉar mi scias alte taksii la valoron de la mondlingvo Esperanto; speciale pro konsidero de la cirkonstancoj de nia nuntempo, kiu tiom bezonegas amon kaj konfidon, tempo, kiu havas la gravan taskon transponti, krei konfidon inter la popoloj. De konfido al amo estas nur unu paŝo. Estigi ĉi tiujn amon kaj konfidon estas tasko de la katolikoj de la tuta tero; de la katolikoj, ĉar ilin interligas plej intime unu kredo, unu ofero (meso) kaj unu ĉefo. En neniu alia eklezio la juvelo de l' unueco eklumas tiel noble kiel en la katolika eklezio. Al tio krome nun venu la komuna ligilo de komuna lingvo interkomunika. Estimon kaj riverencon al la gepatra

lingvo! Sed en la nuna tempo, kiu interligu, ni bezonas mondlingvon kaj tiu ĉi estu Esperanto! (Tondra aplaŭdo!)

Antaŭ nelonge mi revenis el Amsterdam, kie mi partoprenis la eukaristian kongreson. Por ebligi al kiel eble plej multaj personoj la partoprenadon spiritan en tiu imponega kongreso, oni uzis la plej modernan ilon, la laŭtparolilon kiu komprenigu al 40000—50000 kongresanoj eĉ tre mallaŭte ditajn paroladojn, kiu ankaŭ ebligis ke per tiu moderna elpensajo estis komprenataj ĉiuj paroladoj ditaj en la stadiono, kiu fine ebligis, ke la s. rozario, preĝata en la stadiono, estis aŭdebla al la tuta urbo, tiel ke ĝi estis samtempe preĝata ankaŭ en la stratoj de Amsterdamo kaj en vilaĝoj de la ĉirkaŭaĵo. Tiam mi havis la deziron ke kiel ĉi tie, ĉe ĉiuj internaciaj kunvenoj estu parolata Esperanto, ĉar se tiam la internacia karaktero de l' kongreso esprimiĝis per tio, ke oni parolis en plej diversaj lingvoj, tiu internacia karaktero estis pli bone akcentata, se ĉiuj parolis unu saman lingvon, Esperanton.

En tiu ĉi senco mi salutas la konsiladojn de la kongreso kaj deziras al ili la plej bonajn sukcesojn.

Sed, por ke ankaŭ Dio benu viajn laborojn, mi donas al vi mian patrecan benon!

Salutoj por la XVI-a.

(Telegramoj kaj leter-ekstraktoj.)

Korajn bondezirojn por granda sukceso al nia XVI-a.

Accademia Balcanica en Bari (Italujo).

Al la kongresaj laboroj plenplenan sukceson! Al ĉiuj kongresanoj sinceran kaj samideanan saluton! Ĉekoslovaka teritorio de U.E.A. O. Sklenčka, ĉefdelegito.

Ni uzas la okazon, esprimi por la XVI-a Universala Kongreso niajn plej korajn bondezirojn; ĝi fariĝu fruktedona kaj rekompenco por viaj multaj grandaj penoj!

Altestime kaj samideane

L. K. K. por la XIII-a Germana Esperanto-Kongreso Plauen 1924 Hermann Scheider.

Okaze de la malfermo de la XVI-a Universala Kongreso de Esperanto ni salutas Vin tutkore kaj tutanime.

Ni bedaŭras treege, ke ni estas inter Vi nur spirite kaj, ne ankaŭ korpe, kiel ni deziras, sed kaŭzoj nuntempe nevenkeblaj malhelpas nin aperi en Vieno kaj partopreni en la komuna festo de la tutmonda Esperantistaro. Ni estas ĉi tie, kie preskaŭ ĉiu intelekta movado estas kondamnata je morto, pioniroj de la Esperanta movado kaj devas kontraŭbatali la indiferentecon de la loĝantaro kaj la suspekton de la politika estraro, kiuj kvankam ne malhelpas, tamen plimalfaciligas nian laboron. Ni posedas kompreneble nur modestajn pacajn armilojn kaj laboras senĉese kaj senlace, ĉerpintaj moralan forton el la vortoj de nia Majstro kaj el la solidareco de la tutmonda Esperantistaro, kiun la Universalaj Kongresoj atestas plej forte kaj okulvideble.

Ni estas konvinkitaj, ke la XVI-a — same kiel la antaŭaj kongresoj — laboros sukcese por intereso de la grandaj ideoj, kiujn nia movado intencas kaj Vi alproksimigos la homaron multe suferintan al la fincelo de ĉiuj homaj klopodoj: al la ĝenerala paco kaj feliĉo.

Dezirante al Vi plenan sukceson ni salutas Vin en la nomo de la ĉi-tiea „Amika Rondo Esperantista“.

Esperanto klubo en Subotica kiel loka grupo de la Amika rondo Esperantista en Novisad (Jugoslavio).

Okaze de nia 16-a U. E. K. mi en la nomo de Varsoviaj Samideanoj, kiuj bedaŭrinde ne sukcesis ĝustatempe havigi al si pro diversaj kaŭzoj la necesajn dokumentojn, salutas la grandiozan nian Esperantan familion dezirante al ĝi plensukceson. Kvankam mi malestas, sed spirite mi kun Vi festas.

Varsovia Del. de U. E. A.

Adolfo Oberrotmann.

Al la tutmonda samideanaro kunvenanta hodiaŭ en Vieno al nia XVI-a Universala kongreso, la Direkcio kaj la Membroj de Rondo Esperanta de Trieste bondeziras tutkore plej efikan laboron kaj plenan sukceson.

Rondo Esperanta, Trieste (1).

En nomo de nia klubo mi kore salutas nian deksesan kaj deziras, ke ĝi estu sukcesplena.

D-ro Pejčić, Bjelovar.

Felietono

La Raimund'a „Malŝparulo“ en Esperanto.

(Raporto pri la origina prezentado de la Zwach'a traduko, la 11-an de aŭg. 1924.)

Mi simple ne povis alie: konstante mi devis pensi je la simpatia malfeliĉa idealulo malnov-Wien-a, kiu revis estante malriĉa sukerajstlernulo vizitanta ĉiuvespere la teatrojn pro vendado de la produktajoj de sia majstro, poste ludante en antaŭ-urba teatraĉo, fine sukcesante iĝi la plej fama aktoro kaj popola poeto de sia tempo, revis pri la fabela lando de l' feliĉego kaj beleco spite ĉiujn turmentojn de jaluzo pri la posteaj sukcesoj de la kunurbana dramverkisto, la akre satira Johann Nestroy, spite la malfeliĉan edzecon kun koleginio, post kiam li intrige estis disigita por kelka tempo de amegata sia Toni (Antonjo), kies patro estis malpermesinta la edziniĝon kun „komediisto“. Raimund memmortige pereis malesperante. Ĉu li mortante entute esperis pri dumjarcenta postgloro? Mi ne pensas tion.

Ĉu vi sentis, vi silenta dormadantulo en la per Toni-a fideleco belege ornamita tompo enmeze de la montar-bela Alpoj-paradizo, ĉu vi sentis la korar-baton internacian dum la prezentado de via plej senmorta verko? Repoemigintu plej artisman vi trovis, amata nia Raimund, administranton indan rilate al la popoloj de la tutmondo, varbantou de l' amo por vi ĉe la naciaro!

Franz Zwach, ekskolonelo, Wienano, tradukis la Raimundan prozoverkon laŭ-ritme, spondee*) precipe. Per eksigo de memkompreneblaj sufiksoj, kie la ritma principo postulis ĝin, la tradukinto atingis plejan alternon kaj multkolorcon en la parolformo. Tiu ĉi Zwach'a tradukaĵo estas — kiel dramo — tute viva parolverko, ne skribaĵo

*) ekz.: „Nur ägren' min akompanos“ aŭ „La lasta task' de mia vivo estas“.

senviva. La tradukinto pruvis, ne nur por esperantistoj (kiuj ja pri tio estas konvinkitaj) sed precipe por la german-lingva publiko, ke estas eble traduki al Esperanto tute laŭ la spirita atmosfero nacia blovanta tra la verko originala. Ĉi tion mi, estante german-lingvisto tute laŭobjekte, sen iu entuziasmo poresperanta, konstatas.

La sereniva, varmhora karaktero de la sudgermana homo, kiu montriĝas en ĉi-tiu verko, la speciala sudeco en la agordo de la tutajo, eĉ plifortiĝas pro la molaj kaj muzikaj sonoj*) de nia interkomprenilo. Sed eĉ la kiolo de la sonado Wienlingva estis aŭskultebla en la voĉo de s-ro Wawra ludanta Valentin'on. Estis ĝojiga sameco de la originalaj kaj la figuroj tradukitaj, ĉar Raimund paroligas la ĉefpersonojn, ne nur dialekte, sed laŭ ilia vortuzado, speciale. Jam posttagmeze parolante la „Preĝon sub la verda standardo“ pruvis s-ro De Zeska, same kiel s-ro Wawra membro de la mond-fama Burgtheater, ke Esperanto kapablas esti plej arte recitata, plej nuancante kiujn ajn sentojn.

La kunludo de la s-roj Stark (almozulo) kaj De Zeska (Flottwell) estis rimarkinda pruvo de spirita, arta interligo kiu estas ebla eĉ en artefarita lingvo. Tiu sceno estis kortusa.

La joviala humoro de s-ro Wawra en sinteno, gesto, vorto memorigis pri Shakespeare'aj figuroj. Kiel Valentin, ebria, ploreme kolerega, sancelpiede forironta de la servposteno kun Rosl (Vally Brenneis) estis bonega. S-ino Brenneis figuris tipan energian Wien-aninon kun la konata dolĉa ĉefakordo de la koro.

Ĉu mi plue rakontu pri la fervoro kaj la boneco de la ludo de la ceteraj aktoroj? Mi ja devus komuniki la tutan nomaron. Menciante nur estu, ke memkompreneble, tute same kiel en nacilingvaj prezentadoj la infano sur la scenejo ektondrigis la aplaŭdon, ke same kiel dum germanlingvaj prezentadoj la kanto de Valentin „Disputas pri feliĉsen fin“, gajnis specialan aplaŭdon. Ludante la Valentinan rolon siatempe Raimund kaj ankaŭ la fama Girardi kantadis la belan seriozan kansonon neforgeseble elkore.

*) ekz.: „Mi dankas vin pro via dolĉa fido“.

La filozofado de l' almuzulo konstateble kortuis la aŭskultantaron, kelkfoje gaja ekrido eksonis. La malnova, sed malfalsa artverko neniam perdis da sia teatra efikeco pruvita per naŭdekjara vivo de la „Malŝparulo“ sur la scenejoj. Kiel bela ĉarmaĵo, kiu en nova vesto pro la ĉarmo de l' novaĵo ŝajnas esti eĉ pli bela, same la kara verko ŝajnis al la germanaj samideanoj aperi en novaj multkoloraj radioj brilantaj.

La malnov-Wien-a spirito amis la fabelĉarmon naivan. Nu, kaj la bela mirindaĵo de nia interkomprenilo, ĉu ankaŭ ĝi ne estas fabelo, fabelo de la efektiveco? Eĉ la moderna nuntempo konas fabelojn, kiel la radiadon aŭ la kinetofonon kaj aliajn akiritajojn, miraĵojn teknikajn, al kiuj apartenas ankaŭ Esperanto.

Oni povas imagi, kiel interesa estis la ĉi-lunda publiko en nia Wienera operejo „Bürgertheater“. En loĝio mi ekvidis sron Kenn el Ĉinujo, kiu tiel klare kaj vigle babiladas, vid-al-vido en loĝio preĝis dum la paŭzo nia kara provincaĵo Mĉstan sian breviertaskon, ne malproksime de mi sidis du samideaninoj ĉeĥaj en siaj pentrindegi rugblankaj polvestoj, en pargetejoj mi ree renkontis la koleginon anglan, kun kiu mi estis konatiginta dum la studenta konferenco, poste mi babilis kun bulgara akademiano, ankaŭ sron direktoron Schamanek, kiu ofte ŝajnas esti simila al nia majstro en sia simpatia maljunuleco. Eĉ la honoron mi havis esti konatigita al gesroj. Isbrücker el la Hago, ĵus kiam bedaŭrinde eksonoris.

La ĉeestantaro internacia kun ĉiuj eminentuloj kongresaj bonege amuziĝis. La sukceso estis grandega kaj laŭ mia sento ne nur pro Esperanto-entuziasmo mem. S-ro samideano kolonelo Zwach, kiu sidis en familia rondo en la unua loĝio maldekstre, korege kaj laŭte estis ovaciita. Manaplaŭdo, vivu-salutoj, tukflirtigo! Estis nepriskribebila ĝojego.

Ĉu ankaŭ auskultis ĉi-tion la silenta dormanto en la tero, kiu foje skribis:

„Profundul' destinas mem sin por malĝoj“.

Friedrich Wilhelm Illing, E. L. A.

Al la kongreso mi deziras, ke ĝi fariĝu nova ora folio en la granda kongres-libro, en kiu jam 15 antaŭaj kongresoj kaj kongresarangintoj enskribis siajn nomojn! Nia movado fortiĝu en Aŭstrio ne nur dum sed ankaŭ post la kongreso!

Kun la brila XV-a en freŝa memoro mi bedaŭras, ke mi ne povas partopreni la XVI-an kaj premi la manojn de karaj geamikoj.

Al ĉiuj koran saluton de via samideano el Danlando Margrethe Noll, Prez. de Societo de Danaj Esperantistoj, Kopenhago.

Grupeto de neŭtralaj Esperantistoj el urbo Livni plej varme salutas niajn Eminentulojn, Rezentantojn de Registaroj kaj de diversaj Institucioj kaj Asocioj kaj ĉiujn gesamideanojn, kunvenintajn en gastama belurbo Wien.

Ni deziras, ke kongresano ĝuu plej solenan feston kaj okazigu neforgeseblan propagandan ondegon. Bonan sukceson en ĉiuj laboroj kaj entreprenoj.

Nia deziro estas: ke ĝis kongreso de sekvonta jaro niaj institucioj sukcese efektive starigotajn celojn, ke dum la jaro aperu multe da utilaj esperantajj, precipe en regiono de grava praktika uzado de l' kara lingvo, ke ege plimultiĝu la kvanto de Esperantistoj, ke kresku la abonantaro de niaj gazetoj kaj ĵurnaloj kaj membraro de UEA.

Vivu, floru Esperanto!

Bonan sanon al Eminentaj Fosistoj de nia sulko! Eterna paco al cindro de nia Glora Majstro! En nomo de 11 samideanoj Teodor Dajber, grupgvidanto.

Ni estus tre dankaj, se iu el kongresanoj per du linioj certigus la ricevon de ĉi tiuj linioj.

Al la ĝenerala kaj al la Katolika fakongreso koran saluton.

Eklezia konsilisto Becker, Breslau.

Estu beno internacia Kongreso dekseka! Cristian Kamper, del. UEA, nuntempe en Usono, Pateron.

Koregan saluton ni deziras al la nuna Kongreso, ĝi estu gloro fruktodona por la esperantista venko.

„Paco kaj Amo“, Barcelona.

Saluton kaj sukceson.

Loka grupo Breslau.

Deziras plej korajn bondezirojn al la kongresano.

J. v. Schmidt auf Altenstadt, nederlanda garantiinto de UEA el Linz apud Danubo.

Grupo en Birmingham (Anglujo) salutas!

Ĉar mi ne povas ĉeesti la grandan feston de esperantistoj, mi salutas ĉiujn kaj deziras plenan sukceson al la XVI-a en Wien.

V. Cimr, redaktoro de Esp. Teos., Praha.

La tono faras la muzikon,
Ĝi tre influas la efikon.
Do, ludu pure — post agordo —
Kaj harmonie ĉe la bordo
De via bela Blu-Danubo;
Ke vi sukcesos, — eĉ ne dubo,
Ĉar Wien en ĉiu monda parto
Famiĝis ja pro — muzikarto.
Zanoni.

Mi sendas al la Kongreso plej koran saluton, fervore dezirante, ke ĝi plene sukcesu kaj ke ĉiuj samideanoj konvinkigu pri la nepra neceseco ne nur de memvola disciplino en la lingvaj demandoj, sed ankaŭ de unuiĝo kaj koncentriĝo en la organizado. Ni ne disigu niajn fortojn, ĉar disigo de fortoj naskas malfortecon kaj jam multe malutilis al nia afero. Vivu Esperanto, sukcesu la Kongreso, prosperu via bela ĉefurbo kaj ĉiuj niaj aŭstraj samideanoj!

Prof. E. Grosjean-Maupin, Direktoro de la Akademia Sekcio por la Komuna Vortaro, Saint-Maurice (Seine).

Resaniĝinta post grava malsano, sed ne ankoraŭ sufiĉe forta por alveturi Vienon, mi sendas al la karaj gekongresanoj plej koran saluton.

Sur plej diversaj kampoj, en plej diversajn direktojn ni laboru laŭ plena lingva unueco, kaj ni venkos ĉiajn malfacilaĵojn. Sed mi insistas, ke severa lingva unueco estas ĉefa, nepra kondiĉo de sukceso.

Vivu la Viena Kongreso! Vivu nia Zamenhofa Esperanto!

Th. Cart, Prezidanto de la Lingva Komitato kaj de ĝia Akademio, Parizo.

La salutvespero ĉe la socialistaj Esperantistoj.

Ne por festa kunsido, sed por salutvespero invitis la Wienaj socialistaj samideanoj la eksterlandajn proletariajn partoprenantojn je la XVI-a, ĉirkaŭ cent kamaradojn, en la Laboristan Hejmon en Floridsdorf (antaŭurbo de Wien), kie la Esperanta movado estas speciale forta. El tiu modesta aranĝo eliris tamen vera festvespero: Tuta Floridsdorf eliris sur la stratojn, kiam la specialaj tramvagonoj alportis la gastojn, la laboristaj familioj staris amase sur la stratoj kaj akklamis per ĝojaj salutvokoj kaj gestoj la marŝon de fremdaj kamaradoj, kiuj ĉe la sonoj de orkestro de la respublikana defendligo, atingis la Hejmon. Ĉe belguste, per floroj kaj bukedis la ornamitaj beloj okupis la proletariaj samideanoj siajn lokojn kaj montriĝis, kiel bonege scias la laboristoj kun tuta trankvileco aranĝi tian internacian salutvesperon.

La laborista kantistaro „Jedlese“ sub la gvido de sam. Anton Prohaska prezentis unue la „Socialistan Marŝon“ en Esperanto, plue „Ĉe Danubo bela blua“ kaj fine belajn aldonojn en germana lingvo. La kantista ĥoro kiel ankaŭ la teatra kapelo de „Infanamikoj“, ludinta tre bele „La ciganinon“ de Balfé, gajnis per siaj freŝaj prezentadoj ne nur la dankemecon de l' kunvenintaro, sed ankaŭ laŭkronon, transdonitan kun koraj vortoj al la laboristaj kantistoj kaj muzikistoj de juna Budapeŝta samideano.

Samideano Rasztoczy klarigis al la fremdaj Esperantistoj en klara tre objektiva parolado la organizon de l' aŭstra socialdemokratio kaj eksplikis la laŭplanan kunlaboradon de l' apartaj grupoj, rakontis pri la „Infan-amikoj“ preparataj per moderna edukado pli bonan estontecon kaj pri la respublikana gardligo, protektanta la politikajn liberecajn fundamentojn de l' ŝtata konstitucio.

La poste de sam. Jonas flue kaj precize esperantigitan festparoladon eldiris la urba konsilanto Anton Weber. Li montris al la eksterlandaj laboristoj per ciferoj la potencon de la aŭstra socialdemokratio, kiu sole en Wien en la liberaj sindikatoj unuigas kvaronon da tuta loĝantaro kaj posedas la plej grandan konsumorganizaĵon de l' mondo. Por la granda tasko de la socialdemokratio devas esti uzata ankaŭ Esperanto ne kiel celo en si mem, sed

La mekanizita mondo.

Vi povas ĝin kredi: dum pli aŭ malpli longa tempo formanĝos nin la mekaniko. Jes, estas tiel!

Ĉi-suba historio okazis post forpaso de estontaj dudek kvin jaroj. Mi havas la honoron ĝin al vi rakonti.

Unu el la eminentaj reprezentantoj de la mekanika mondo, nome Fratoj Monbank, vojaĝis per sia aviadilo por negoca intertraktado al iu loko sur alia kontinento. Li subskribis antaŭ la forvojaĝo, tagmeze, sepcent korespondadojn, tagmanĝis, trinkis kafon, adiaŭis sian familion, surpasis sian aviadilon kaj forflugis. Ĉio ĉi okazis en la tempo de duonhoro.

Je la tria posttagmeze li esperis atingi sian celon en la alia terparto.

Kiel oni ne povis alie atendi, dum la vojaĝo ĉio iris bone. Li elsendis dum la transflugado de la maro cent kvindek radiotelegramojn, skribis por sia gazeto — por pleni la paŭzojn — sesdekpaĝan disertacion pri la valoro de plirapidigita dormado, kaj alteriĝis, kiel antaŭvidite, precize je la tria posttagmeze sur la dezirita kontinento.

Sed li alteriĝis en falsa loko.

Pro motivoj, kiuj kiel kaŭzo en la senco de l' mekanika mondo tute ne povis esti klarigitaj, li implikiĝis en la kronojn de altkreskaj arboj de praarbaro kaj atingis kun difektita aparato la teron.

La unua afero de Fratoj Monbank estis, ke li telegrafis pri anstataŭanta maŝino kaj sin sur la sama vojo por la plej proksimaj horoj senkulpigis ĉe siaj negocamikoj pro la fatala okazintaĵo.

Post tio li alpaŝis, por pleni la tempon, al pli detala esploro de sia ĉirkaŭaĵo. Post mallonga ekzameno li konstatis, ke la praarbaro kaj ĝiaj aranĝoj estis ekspluatataj en ekstraordinare fusa maniero. La arboj staris kelkloke multe tro dense, nenie estis desegnitaj la formortintaj branĉoj, kaj falinta ligno putris sur la tero. Ĝenerale estis rimarkeble, ke la tero tute ne estis tenata en ordo. Multaj ekskremento de sovaĝaj bestoj kuŝis ĉirkaŭe, vane atendante la forveturigon kaj mastruman aplikon. Vojmontriloj kaj tabuloj kun la surskribo

„estas severe malpermesite kolekti la hejtbranĉojn“ mankis kaj la tuto faris la impreson de malmulte profitodona, mallerte administrata entrepreno.

Fratoj Monbank eniris pli profunde en la arbaron. Post kelka migrado li alvenis al vilaĝo kies aspekto lin treege mirigis. La domoj staris ĥaose intermiksite. Pri ia konstrua linio oni ne povis eĉ paroli.

La vilaĝo havis nek kanalizacion, nek lumigon. Ĝi havis nenian telefonicejon, nenian bankon (!) kaj nek unu komercan magazenon. Kaj nenio montris la ekziston de kinematografita teatro.

Kiam Fratoj Monbank surpasis la straton de l' vilaĝo, elkuroj la loĝantoj kaj rigardis la fremdulon per grandaj okuloj kaj kun larĝe malfermitaj buŝoj. La homoj estis, ekster mallonga antaŭtuko el plektita arboŝelo, tute nudaj kaj faris la impreson demalkleraj nekulturuloj.

Unu viro en stranga kapornamo ŝajnis esti la vilaĝestro. Fratoj Monbank alparolis lin en la mondolingvo Esperanto.

„Montan-akcioj, 7800 mono! diris li.“

„Muh!“ diris la indiĝeno.

„Bonaj negocoj tie ĉi?“ demandis Fratoj Monbank.

La indiĝeno grincis la dentojn.

„Mian respekton!“ diris Fratoj Monbank kun admiro. „Vi havas bonegan dentiston! Kiom postulas tiu homo por tuta dentgarnituro?“

„Bruh!“ faris la indiĝeno.

„Hm! Kiel estas cetere? Kian anstataŭaĵon oni havas tie ĉi por lakto kaj ovo? Kaj por viando kaj pano? Kaj kion vi diras pri la ĵus inventita artefarata digestado?“

Fratoj Monbank parolis ankoraŭ tiamaniere en Esperanto plu, poste li ĉesigis la konversacion, provinte ankoraŭ decidi la loĝantojn al akcepto de procentumitaj hipotekoj sur iliaj kabanjoj.

La plua trapaso de la tago, la sekvanta nokto kaj la plej proksima mateno formiĝis por Fratoj Monbank terure. Li devis malsati! La manĝoj de l' indiĝenoj, kiel freŝan bovinan lakton, rostitan viandon kaj maturajn fruktojn li ne povis konsumi, ĉar lia stomako digestis nur kondensitajn, sterilizitajn kaj aliajn -itajn kaj -izitajn kuirajojn. Nokte

mankis la patentita risortlito, la elektra ventrovarmigilo kaj la higiena korpokompreso. Kaj matene mankis, komencante de la dentbroso, ĉio kio apartenas al vere civilizita homo.

Nur tiu iometo da karno kaj ostoj, el kio konsistis la homo Fratoj Monbank, estis ankoraŭ tie ĉi kaj atendis je la anstataŭanta flugaparato, kiu fine venis kaj lin, dum dudek kvar horoj eksterkursmetiton, forportis en la brakojn de liaj negocamikoj.

La raporto de Fratoj Monbank pri la antaŭdiluva rilatoj en la praarbaro vekis grandegan sensacion en la tuta civilizita mondo. Senprokraste sin konstituis komitato el viroj kaj virinoj, kiu energie alpaŝis al la kulturigo de l' praarbaro kaj de ĝiaj loĝantoj.

Estas vero, ke la unua ekspedicio, kiu vojaĝis en la praarbaron, fartis ne pli bone ol Fratoj Monbank: la naturaj rilatoj en tiu malprograsa regiono estis tro nenaturaj kaj pregaris al ĝi grandan turmenton. Sed per la unuigitaj fortoj oni sukcesis baldaŭ forigi la malbonaĵojn. Skatoloj da konservoj, barakoj el ondlado, fumantaj fabrikoj, reloj fervojaj kaj hemiaj rest-akvoĵoj, kiuj sin enverŝis en la riverojn, kreis baldaŭ la kutiman kulturatmosferon.

La praarbaro estis transformita en naturparkon. Vojoj estis faritaj, kaj ĉio kreskanta sen gvidanta linio estis forigita, la sovaĝbestoj estis domigitaj aŭ ekstermitaj, la kronoj de l' arboj — pritrancitaj. En la distanco de ĉiuj 380 metroj oni en la naturparkon enkonstruis fabrikajn kamentubojn.

La entrepreno prosperis bonege.

En la kvietan vivadon de l' indiĝenoj estis enportita febra temp-eluzo; la ideo de la tempo, ĝis nun al ili preskaŭ tute nekonata, estis dissolvita en siajn plej malgrandajn konsistajn partojn kaj, garnita per multaj edifaj rakontoj kaj predikoj, ĝi komencis sian nervdetruan influon ĉe la sovaĝuloj.

La esenco de l' mekaniko estis al ili detale klarigita. Ili estis senditaj en la fabrikojn kaj dresitaj labori kiel maŝinoj. Akurate je certa horo ili dromis en la faŭko de la fabrikoj, dum certa tempo ili tie plenumis sian labordevon, kaj akurate je certa horo elkraĉadis la fabrikaj ventroj la maŝinestulojn denove eksteren.

kiel rimedo por diskonigi, dispropagandi la socialistajn ideojn. Tio ĉi estas des pli urĝa afero, ĉar la plej potenca kontraŭulo de la socialdemokrata partio, la klerikala, kiel pruvas la kongresparolado de l' duka arkiepiskopo Piffel, volas aplikadi Esperanton por siaj partiaj celoj.

La tasko de la proletariaj Esperantistoj estas, esti proklamantoj de socialismo; nur tiam ili estas sur la ĝusta vojo.

La fortajn, kun nedesignifa klareco esprimatajn vortojn de kam. Weber, sekvis Esperanta respondo de kam. Sneif el Antverpeno, kiu montris, kiel la koroj de l' belgaj proletarioj „malamikaj“ por Aŭstrujo, batas konkorde kun la koro de nia laboristaro. Rimedo por akceli la proletarian solidarecon, estas Esperanto!

Per la „Internacionalo“, kantita Esperante de la laborista horo „Jedlesee“ finiĝis tiu ĉi bone sukcesinta festa salutvespero.

Pri la problemoj kaj vojoj de la Esperanto-scienca estonta.

Ekstrakto el la parolado farita dum la kunsido de E.L.A.

Esperanto kiel objekto de sciencaj esploroj estas la temo de tiu-ĉi parolado tial, ke ĝis nun ĉiam, kiam oni pritraktis la temon „Esperanto kaj scienco“, Esperanto ludis nur la rolon de ilo por la diversaj sciencoj. De ekstere ni rigardu nun la objekton, la iaman ilon, ĉar Esperanto ja vere ekzistas kaj post ioma tempo estos rimarkita ankaŭ de la scienco ne-esperantista. Estas do nur hazardo, se la parolado estas aŭskultata precipe de Esperantistoj, ĉar nuntempe nature tiuj sin interesas pri tiu ĉi temo scienca.

La Esperantisto kiel esploranto ja ekiros la unua la vojon, kiun surpaŝos pli malpli frue ankaŭ la cetera sciencistaro, jam pro la nura ekzisto de la afero.

La demando de la sciencistaro ne-esperantista, ĉu Esperanto estas vera lingvo, ne estas grava por la pritrakto scienca de Esperanto, ĉar la scienco havas la rajton pritrakti ĉion estantan, sciatan, Esperanto estas sociologia fenomeno, eĉ se ĝi ne estus lingvo, tial ĝi meritas scienca pritrakto. Ĝi estas esprimebla el diversaj vidpunktoj, el la sociologia, el la spirithistoria, en certa rilato ankaŭ el la lingva, literaturhistoria kaj literaturestetika vidpunktoj.

Ankaŭ la origina pensado de l' indigenoj estis enpremita en mekanikan vojon kaj ilia ĝisnuna senĝeneco estis al ili radikale dekutimigita.

En iliaj loglokoj oni ĉe ĉiu stratangulo aranĝis bankoficejon kaj la indigenoj ricevis de Fratoj Morgan la jam pli frue menciitajn kabanhipotekojn je modera procento.

Ĉiuj ekzistantaj valorobjektoj ricevis sian kontraŭvaloron en papero, kiu sin trovis unue en la manoj de kelkaj bankieroj. Poste oni komencis la intersanĝon en tia maniero, ke la bankieroj ricevis la valorobjektojn kaj la indigenoj la paperojn.

Ankaŭ tiu ĉi entrepreno prosperis bonege.

Tiel do la indigenoj estis provizitaj per ĉiuj bonoj kaj benoj de la civilizacio. En stranga maniero tamen ili pro tio ne nur ne fartis pli bone, sed kontraŭe ĉiuj iom post iom ĝis la lasta elmortis.

Tiu ĉi negrava cirkonstanco ne povis tamen memkompreneble bari la vojon de l' mekanika kulturo; ĝi paŝis sur sia vojo triumfe antaŭen.

La kultura homaro ennestiĝis plene en tiu por la kulturo nove konkirita lando kaj Fratoj Monbank ricevis en danko por la unuaj informoj, kiujn li donis pri la praarbara regiono, la nomination kiel honora civitano. Jozefo Viera.

Jean Forge:

Saltego trans jarmiloj.

Horloĝo super mia skribotablo ekparolas per kvinobla bato:

„Kvina horo! Ĉu vi ne ĉesos skribi? ...“

Tiam mi forĵetas la plumon kaj eksaltas. Enpense mi foliumas la skribitajn paĝojn, kiuj kuŝas sur la skribotablo...

Kio? Ĉu estas eble? Ke mi sidis la tutan nokton super mia manuskripto? Tion mi tute ne rimarkis kaj — por konfesi la veron — mi estus verkinta ankoraŭ ĝis tagmezo aŭ pli longe. Efektive, forte ekkaptis min mia nova romano „La ombro“, kiun mi ĵus havas „subplume“...

Kvina horo matene!...

Tre interesa temo estas ankaŭ, kian karakteron havas la Esperanto-literaturo. Kiaj estas la diferencoj inter naturlingva kaj artingva literaturoj, kiaj estas la kondiĉoj de la evoluo de ambaŭ specoj? Kio kondiĉas arte noblan produktadon de artverkoj originale eksentitaj? Tiu-ĉi demandoj estas gravaj respondotaj. La Esperantan arton kondiĉas tute aliaj travivaĵoj ol la temoj de la naciaj literaturoj. Ne amo ktp., sed la travivaĵo de l' interna ideo sen tendencema pseŭdoarto. Pro la spiritaĵoj de l' nuntempo, versajne evoluos, kiel la stiloj de l' impresionismo, de l' ekspresionismo, de la simbolismo ktp. evoluis, ankaŭ propra esperantisma stilo, sed ties travivaĵa bazo devos esti nepre vera kaj la fonto de l' verkistoj devos esti profunda. La spirito de l' esperanta esperantisma stilo estos eble metafizika, ĉar la nuntempa literatura penado ĉe la nacioj celadas tien.

Por la historia scienco la homaranismo estas ne malpli interesa ol la malkonsento pri ĝi.

La juro kaj Esperanto, ĉi-ties permesateco en la jura vivo; Esperanto kaj la fonetiko ĉe diversaj popoloj, tiuj-ĉi temoj estu nur menciitaj kiel kelkaj el multaj.

Sed kiuj kaj kiaj estas la vojoj irotaj de ni, la unuaj Esperantologoj? Ĉar post ni kaj kun ni ilin iros ankaŭ esplorantoj neesperantistaj, niaj metodoj nur povas esti la penseble plej sciencaj, t. e. ekz. filologiaj, historiaj ktp. Antaŭ ĉio ni devas kolekti la jam ekzistantan materialon (aperaĵojn, kritikojn, biografiojn ktp.), sed la kolektitan materialon ni devas esplori je ĝia seriozeco kaj interna vero, kaj sisteme ordigi ĝin, ĉar alie multo da tia materialo estus perdita. Ni devas inventari precipe la rememoraĵojn kaj la sciencajn faktojn. Multo ankoraŭ ne estas fiksita, jam multaj pioniroj mortis kaj ni neniam plu ekscios, kiom da historiaj faktoj ili sciis, sed ne fiksas.

Antaŭ ĉiu alia, la biografia scienco esperantista estu flegata. Eĉ nun la vivo de Zamenhof ne estas senreste esplorita, eĉ nun mankas al ni la „standard-work“ pri la esperanta movado. Eĉ nun ankoraŭ la vortarlaboroj ne estas finitaj kaj multo, multo ne estas jam komencita.

En teknika rilato mankas al ni ĉie kaj ĉiam la internacia centra organo de l' Esperantologio mem (sen propagandaj celoj), la fortoj estas tre dispartigitaj; devas ekzisti ne por ĉiu fako speciala revuo, sed kion ni bezonas, estas unu organo universala, kiu registradas la diversloke aperantajn

Mi flankenŝovas la kurtenojn. Mi rigardas en la ruĝan matenon. Kion fari nun? Dormi? Tio estus peko; ĉar belega somera tago staras antaŭ la fenestro. Per rozaj fingroj karesas min la suno. Kaj la naturo brilas en multkolora vestaĵaro. Birdoj trilas en la arboj. Kaj blovas juna freŝa vento...

Kio do? Ĉu promeneti tra la juna tago? Per plenaj pulmoj spirante la matenon, ektrinki novan energion kaj inspiron por la glora verko?..

Ha, ideo! Kompreneble.

Mallaŭte mi paŝas tra la dormeganta domo. Kun kuraĝaj paŝoj. Kun gaja entreprenemo en la koro. Malsupren. Trans la korton. En remizon...

Mi eltiras mian aŭtomobilon. Mi plenigas la rezervujojn per benzino. Palpe glitas miaj fingroj super la motoron: en ordo ĉio!

Ekzumas la maŝino. La veturilo tremas kvazaŭ hundo ekkurema.

„Vi kuros, kara mia besto“, mi diras kun dorlota voĉo. „Vi kuros en la junan freŝan tagon vete kun la vento!...“

Antaŭen!

Ekbruas la motoro. Ekbruliĝas pneŭmatikoj trans la korton. En eleganta kurbo mi traveturas la pordegon de la korto. Transsaltas la pavimon de senhomaj longaj stratoj. Veturas inter grandaj dormegantaj domŝtonaĵoj, kiuj formas sufokan malvaston. Kaj liberiĝas fine: aperas rekta ŝoseo! Ekkrakas la motoro. Ekkuregas veturilaj radoj. Ekblovas forta freŝa vento. Ĝi levas min...

Mi ŝajnas ŝvebi meze en la suna lumo...

Vespero venas.

Tutan tagon mi veturis. Senĉese sidis ĉe la direktila rado. Trarapidegis sennombrajn kilometrojn. Trapasis vilaĝon post vilaĝo, urbon post urbo...

Kie mi estas nun? Ĉu mi scias? Ie, ĉe voja kurbo la vento forportis malice mian stratan planon. Ĉu mi bezonas scii, kien mi veturas? Kiun straton mi devas elekti, kiun direkton?.. eh, afero enuiga! Por mi estas ĉefaĵo, senti subrade novan rektegan ŝoseon...

esplorrezultatojn. (La protokolado de l' sukcesoj de Esperanto estu la tasko de l' precipe propagandaj gazetoj.)

Ni bezonas plue ĉie Esperanto-bibliotekojn kun organizita, bone funkcia reciproka libro-pruntado laŭbezona.

Grava punkto estas kompreneble la monrimedoj. La esplorantoj bezonas subvenciojn por ilia scienca laborado kaj vojaĝstipendiojn. Tre ofte tie, kie troviĝas la materialo, mankas la intereso aŭ kapableco, aŭ manko da tempo kaj helpantoj efikas, ke intereseĝaj, precipe biografiaj esploroj restas longatempaj — deziroj.

Ni Wienaj Esperantistoj havus ekzemple interesan esploran taskon: esplori kaj aperigi por la Esperanta mondo kaj por la Wien-anaro science dokumentitan studaĵon pri la restadoj de Zamenhof tie-ĉi. Ankoraŭ ja vivas multaj personoj, kiuj konatigis kun li kaj tiu fakto estu eluzita.

Mi ne estas tiom optimista, ke mi esperu la plenumon de ĉiuj poresperantologiaj deziroj jam morgaŭ. ĉar nia movado, kompare al aliaj spiritaĵaj movadoj ankoraŭ estas ekonomie tro malforta, por ke ĝi povu subteni mone la esploradon, al kio apartenas ja ankaŭ la ebligado de oferoj da laborotempo, kiun ja preskaŭ ĉiu bezonas por pan akiro. Sed tamen mi esperas, ke eble post jardeko dum la kongreso okazos jam esperantologia fakkonferenco. Pro tio mi kiel studento kaj fariĝanta esploristo profesia sonigas mian voĉon trans la tempoj kaj vokas al la posteuloj: Savadu, pruvadu kaj tradiciu, estimu la Esperantologion!

phil. et jur. Friedrich Wilhelm Illing, E. L. A.

Eŭropanoj! — Eŭropaninoj!

Unu el la plej interesaj kultursociaj movadoj elirantaj el Vieno estas tiu por „Paneŭropo“, la unuigitaj ŝtatoj de Eŭropo laŭ la modelo de Ameriko. La unua, kiu en sia verko la problemon tutamplekse prezentis, estas Condemhove-Kalergi, juna sociologo kaj historiozofa de altaj kvalitoj. El lia „Paneŭropa Manifesto“ ĵus aperinta en Esperanto en la traduko de sam. D-ro Sos, ni elprenas ĉi-suban enkondukon, resendante la interesulojn al la nomita publikaĵo. La saman temon pritraktos ankaŭ nia radioparolado okazonta en Septembro. La Red.

La fatal-horo de Eŭropo sonoras.

En eŭropaj fabrikoj estas ĉiutage forĝataj armiloj, por disŝiri eŭropajn virojn — en eŭropaj laboratorioj estas ĉiutage preparataj venenoj, por pereigi eŭropajn virinojn.

Ha! Eksaltegas la montrilo de l' takimetro! Eklondras la motoro. Antaŭen kun triobla rapideco...

La vojo kuregas kontraŭ min.

La pinte-akra antaŭaĵo de la veturilo tranĉas kvazaŭ glavo la aeron. Furioze muĝegas la vento. Ĉi forŝiregus sendube mian kapon, se mi ne kaŝus ĝin malantaŭ la duonronda ŝirmanta vitro. La bruego de la maŝino kvazaŭ droniĝas en la venta fajfado. Mi estas surda jam. Mi sentas nur la delikatan tremon, kiu vibras tra la veturila torso, regule, kvazaŭ batas koro. Ŝajnas efektive al mi, ke mia veturilo estas vivanta estaĵo...

Vilaĝo aperas... infanoj ludantaj... hundoj bojantaj... fluganta kokaro... averte kriegas mia sireno... for... antaŭen!... pli rapide!...

Mi rapidegas plu. Ju pli longe mi veturas, des pli kreskas mia forto kaj libersenta cerleco. Vojajn kurbojn mi veturas lude... nur sur du pneŭmatikoj... apud mi disflugas ĉio flanken... homoj... bestoj... arboj... herbejoj... kampoj... arbaroj... pli rapide ol filmo ruliĝas preter mi la multkoloraj bildoj...

Vespero venas... mi maltrankviliĝas... de tempo al tempo laco pendiĝas salte je miaj palpebroj... dum momento mi fermas la okulojn... sed tuj denove ekflamas en mia interno la deziro: veturi!... veturegi!...

Meze sur ŝoseo staras ruĝa globo. Kvazaŭ grandega purpura disko troviĝas antaŭ mi la suno... mi veturegas kontraŭ ĝin... freneze saltas la takimetro... la vento fariĝas uragano...

La arboj ĉe la flankoj formas jam barilon, tra kiu brilas la verdo de herbejoj... mi vidas nur rubandojn multkolorajn, kiuj ŝoviĝas al mi renkonte... la ŝoseo fariĝas rubandego de griza tolo, kiu tiriĝas sub mi... ĉu mi veturas?... ĉu mi staras?... senmove sur unu loko meze en ĉi tiu haosego da koloroj?...

Mi flugas! Mi transiĝas en feliĉegan stafon, en ebrian ŝanceliĝon... mi balanciĝas... kviete lulmoviĝas mia veturilo... mi sentas, ke la radoj forlasas la teron, ke ili pli liberiĝas for de la grundo...

Dume ludas Eŭropo en ne komprenebla facilanimeco kun sia sorto; pro ne komprenebla blindeco ĝi ne vidas, kio ĝin atendas; en ne komprenebla senageco ĝi lasas sin senenergie peli al la plej terura katastrofo, kiu iam estis trafinta terparton.

La politiko de Eŭropo direktas sin al nova milito. Du dekduoj da Elŝaco-Lotringioj ekestiĝis. Unu krizo alternas kun la alia. Ĉiutage povas per hazardo — ĉu per ia atenco, ĉu per revolto — eksplodi eŭropa pereiga milito, faronta el nia terparto tombejon.

Ĉiu pereiga milito, kiun preparas la eŭropa politiko, superos la terurecon de la mondmilito same, kiel ĉi tiu superas la german-francon. Ĝia elemento estos la aero — ĝia armilo la veneno — ĝia celo la ekstermo de la malamika nacio. La ĉefa batalado direktos sin kontraŭ la urboj de la malantaŭfrontejoj, kontraŭ virinoj kaj infanoj. La venkitaj nacioj estos neniigitaj — la venkiciaj ĝismorte vunditaj per ĉi tiu amasmortigo.

Ĉi tiu minacanta milito signifas la elfundan pereon de Eŭropo, de ĝiaj kulturo kaj ekonomio. Aliaj terpartoj fariĝos la anstataŭantoj.

La dua danĝero por dispartigita Eŭropo estas: la konkero per Ruslando.

Ruslando rilatas al Eŭropo same, kiel iam Macedonio rilitis al Grekujo.

Okaze de ekrego de Filipino neniu greko kredis, ke povas ekzisti macedona danĝero; ĉar Macedonio troviĝis tiutempe en malordo kaj anarkio.

Sed la genio de Filipino faris ordon en tiu haoso kaj post 20 jaroj estis la unuiginta kampara popolo de Macedonio sufiĉe forta, por subigi la dispartigitajn kulturpopolojn de Grekujo.

Sub gvidado de ruĝa aŭ blanka diktatoro povus Ruslando, per bona rikolto, per amerika kapitalo kaj per germana organizo restarigi pli rapide ol tion Eŭropo supozas. Tiam staros la dispartigitaj kaj malunuigitaj malgrandŝtatoj de Eŭropo kontraŭ unuiginta rusa mondpotenco, kies teritorio estas kvinoble pli granda ol la tuta eŭropa.

Nek la malgrandŝtatoj de Orienteŭropo, de Skandinavio kaj de Balkano, nek la senarmigita Germanujo estos tiam kapablaj, deteni la rusan atakon. Rejno, Alpoj, Adriatika maro fariĝos la limoj de Eŭropo: ĝis kiam ankaŭ ĉi tiuj limoj foriĝos kaj Eŭropo estos okcidenta provinco de Ruslando.

Mi flugas... for de l' tero... renkonte al la fajra globo! Ha, mi sentas, ke mi rule grimpas sur ĝiaj longaj radioj pli kaj pli alten... ke mi veturas sur ĝiaj radioj kvazaŭ sur senfinaj brilegantaj reloj... ke la pneŭmatikoj ruliĝas sur ĉi tiu rela vojo pli kaj pli supren... en sferojn de eterna lumo!

Mi estas libera kaj malpeza.

Miaj okuloj rigardas en la fajroglobon, el kiu fluas stranga varmego. Kaj ĉi tiu varmego flame penetras en mian animon...

Mi volas kanti pro ĝojego kaj feliĉo...

Jam mi ne aŭdas la ĝemojn de l' motoro... jam mi ne aŭdas la furiozantan orkanon, kiu muĝegas ĉirkaŭ mi kvazaŭ bolanta maro...

Mi vidas nur la lumon, al kiu mi rapidas... la ruĝebrilan arkafregon, de flamoj konstruitan, sub kiun mi enveturegas...

Kaj meze en haoso da koloroj, kiuj min ĉirkaŭas kvazaŭ gigantegaj muroj, en ondo de purpura lumo, mi levigas... stariĝas... etendas vaste ambaŭ brakojn... renkonte al la fajra disko...

Ĉirkaŭ mi kantegas la orkano potencon melodion...

Elleriĝas danĝeraĵo. Subite. Proksimiĝas rapidege.

Sed mi ne vidas la vojan kurbon, kiu nun minace kuregas kontraŭ min!...

(Fragmento el la ĵus aperinta originale verkita romano, eldonita de E. Hirš & Sohn, Leipzig.)

Kontraŭ ĉi tiu danĝero ekzistas nur unu savo: la eŭropa unuigo. Por unuiginta Eŭropo ne ekzistas rusa danĝero. Ĉar ĝi nombras duoble pli da homoj ol Ruslando, kaj havas nekompareble pli evoluitan industrion. Tial estas la decido pri la rusa danĝero ne ĉe Ruslando — sed ĉe Eŭropo.

La du sekvantaj jardekoj prezentos al la historio la vetkuradon inter la unuigo de Eŭropo kaj la restarigo de Ruslando: se Ruslando resaniĝos el sia ekonomia katastrofo, antaŭ ol Eŭropo estas unuiginta tiam devos Eŭropo sensave submeti sin al rusa hegemonio; se Eŭropo unuigos, antaŭ ol Ruslando estos restarigita — tiam Eŭropo estos savita el la rusa danĝero.

Pro tio kuŝas la libereco de Eŭropo en la manoj de eŭropanoj.

La tria vivdanĝero por Eŭropo estas: la ekonomia ruino.

Neniam povas la dispecigita ekonomio de ne unuigitaj ŝtatoj de Eŭropo resti konkurcapbla kontraŭ la unuigita ekonomio de l' Unuigitaj ŝtatoj de Ameriko. Ĉar la eŭropaj interŝtataj limdepagoj malhelpas kaj multekostigas la produktadon. La eŭropaj ekonomiaj parceloj do estas kondamnitaj, esti estonte same subpremataj de la ekster-eŭropaj ekonomiaj imperioj de Ameriko, Granda-Britujo, Ruslando kaj Orientazio — kiel butikistoj de trustoj.

Kronikaj krizoj subfosos la eŭropan ekonomion, altigos la malriĉecon, mizeron kaj vivkostojn — ĝis kiam fine la bankrotinta Eŭropo fariĝos amerika ekonomia kolonio. Ĉi tiu stato gvidos al sklavigo de l' eŭropa laboristaro per la amerika kapitalo, kiu malpermesos ĉiun kontrolon flanke de siaj eŭropaj laborprenantoj.

Kontraŭ ĉi tiu danĝero ekzistas nur unu savo: Unuigo de la eŭropa kontinento al unu doganligo, restrigo de l' eŭropaj interŝtataj limdepagoj kaj kreo de pan-eŭropa ekonomia teritorio.

Ĉiu alia vojo gvidas al ruino.

La dispartigitan Eŭropon minacas do triobla katastrofo:

la pereiga milito;
la subigo flanke de Ruslando
la ekonomia ruino.

La sola savo el ĉi tiu minacanta katastrofo estas: Pan-Eŭropo; la unuigo de ĉiuj demokratiaj ŝtatoj de kontinenta Eŭropo al internacia grupo, al unu politika kaj ekonomia interesligo.

La danĝero de eŭropa pereiga milito estas nur forigebla per pan-eŭropa arbitracia kontrakto;

la danĝero de rusa hegemonio estas nur forigebla per pan-eŭropa defendalianco;
la danĝero de ekonomia ruino estas nur forigebla per pan-eŭropa doganunuigo.

La arbitracia kontrakto garantias la pacon la alianco garantias la liberecon — la doganunuigo garantias la ekonomion.

Ĉi tiuj tri punktoj entenas laŭesence la pan-eŭropan programon.

Pan-Eŭropo ampleksas la duoninsulon inter Ruslando, Atlantika oceano kaj Mediteraneo; krom tiu Islandon kaj la koloniojn de l' eŭropaj ŝtatoj. La granda eŭropa kolonio, ampleksanta inter Tripolis kaj Kongo, Marokko kaj Angola la duonon de Afriko, povus ĉe racia mastrumado provizi Eŭropon per krudmaterialoj.

Ruslando kaj Anglujo estas la najbaroj de Eŭropo. Ĉi tiuj du imperioj estas ankaŭ sen Eŭropo vivkapablaj — dum la ceteraj ŝtatoj de ĉi tiu terparto estas pro sia geografia situo ligitaj al sortokomuneco; destinitaj, kune pereii — aŭ kune restarigi.

De multaj flankoj estas postulata la enigo de Anglujo en la estontan Pan-Eŭropon. Ĉi tiu postulo estas ne plenumbla pro la organizo de la brita federacia regno. La „Dominion“-oj neniam tolerus, ke Anglujo serĉu pli intimajn rilatojn al iliaj statsistemoj ol al ili mem; per tio la aliĝo de l' angla regno al Pan-Eŭropo estas iluzia. La aliĝo de l' brita federacia regno al Pan-Eŭropo estas iluzia pro la malebleca, sanĝi Kanadon en eŭropan ŝtaton. La sekvo de ĉi tiu pretendo al Ameriko estos la aliĝo de Kanado al la Pan-amerika Unuigo kaj la disfalo de l' brita imperio.

Pro tio estas nuntempe malebla la unuigo inter la pan-eŭropa kaj la pan-brita ŝtatgrupoj. Tamen estas ebla kaj necesa la mondpolitika kun-

laboro inter ĉi tiuj du kompleksoj por celoj de paco kaj progreso. Neniuokaze Pan-Eŭropo povas esti direktata kontraŭ Anglujo. —

Ankaŭ la enigo de Ruslando en Pan-Eŭropon estas nuntempe malebla. Alianco inter demokratiaj ŝtatoj unuflanke kaj sovetaj aliflanke estas praktike ne realigebla. Per sia rezigno al la demokratio, Ruslando libervole ekzigis sin el la sistemo de eŭropaj ŝtatoj.

Ankaŭ kontraŭ Ruslando havas Pan-Eŭropo nenian malamikan intencon. Ĝia celo estas la konservado de rusa-eŭropa paco, komuna malarmiligo, ekonomia kunlaboro kaj respekto al la reciproka interna evoluo.

Kiam Pan-Eŭropo estos kreita, ĝi povos kiel egalrajta imperio kun Ameriko, Britujo, Ruslando kaj Orientazio fondi novan Ligon de Nacioj, en kiu neniu terparto devas timi pro fremda enmiksiĝo. Nur al tia mondligo povos aliĝi la Unuigitaj ŝtatoj de Ameriko kaj Sovet-Ruslando.

Kiel memstara grupo interne de la Ligo de Nacioj havas Pan-Eŭropo la eblecon, direkti mem sian sorton, anstataŭ, kio nun okazas en Genevo, lasi al sudamerikanoj kaj azianoj la plej gravajn decidojn pri Eŭropo. Al la amerika „Monroe“-doktrino estu fine, post cent jaroj, kontraŭstarigita la eŭropa: „Eŭropo al la eŭropanoj.“

La pan-eŭropa programo formas nedisigeblan tuton. La vojo estas diferenca — la celo estas unusola. Sen certigo de la eŭropa daŭra paco ne estas ebla la eŭropa doganunuigo. Ĝis kiam ĉiu ŝtato vivos en konstanta timo pro siaj najbaroj, ĝis tiam ĝi devos sin prepari, por mem produkti ĉiujn varojn necesajn okaze de milito, kvazaŭ en sieĝata fortikaĵo. Por tio ĝi bezonas naciajn industrion kaj protektantan limdepagon. Nur la malapero de milit-danĝero per deviga arbitracio povus malfermi al eŭropaj ŝtatoj la vojon al iom-post ioma forigo de protektantaj limdepagoj kaj al eŭropa libera merkato. Male, la naciaj industrioj kaj ilia protekto per la ŝtato kreas la centron de eŭropa nacionalismo kaj la minacadon de l' eŭropa paco. Kontraŭe, la intereskomuneco estas la plej certa vojo al politika komuneco. Tiel apogas la politika parto de l' pan-eŭropa programo la ekonomian kaj reciproke.

La vojo al realigo de Pan-Eŭropo estas jena:

Unue: grupigo de eŭropaj ŝtatoj laŭ modelo de Pan-Ameriko; ĉi tio estus ebla en la Ligo de Nacioj (post aliĝo de Germanujo) aŭ per invito de paneŭropa konferenco laŭ modelo de la panamerika;

Due: Defendligo por sirmo de la komuna orienta limo;

Trie: efektivigo de devigaj arbitraciaj kontraktoj kaj de reciproka limgarantio inter la ŝtatoj de Eŭropo;

Kvare: aranĝo de doganunuigo per periodaj ekonomiaj konferencoj de l' eŭropaj ŝtatoj. —

Ĉi tiu programo, entenanta nenian maleblajn, devas esti senprokraste entreprenata de ĉiuj, kiuj komprenas la staton de Eŭropo kaj volas savi sian terparton.

Diversaj Informoj.

Protokolo de l' kunsido de Institutoj de Esperanto kaj Ekzamenaĵ Komisionoj dum la XVI-a U. K. de Esp-o.

La kunsido okazis la 9. VIII. 1924. Ĉeestis 40 personoj. Prezidis: Prof. D-ro Dieterle (Leipzig). Sekretariis: S-ro Edvardo Wiesenfeld (Varsovio).

La Prezidanto malfermante la kunsidon, salutas la alvenintojn kaj ekstarigas la demandojn, ĉu denove funkciigi la Internacian Instituton de Esperanto kaj sur kia bazo.

D-ro Privat (Genevo) klarigas ke la demando ne povas esti nun starigita, ĉar la Instituto jam ekzistas. Ĝi estis fondita dum la Dresena kongreso, kaj nunjare oficialigita de K. R. kaj C. K. en Genevo. Oni povis nur diskuti pri ŝanĝoj en la statuto.

Post vigla diskutado, la prezidanto konstatas ke la tasko de Instituto estas 1) aranĝi ekzamenojn. Kiaj estas la pluaj taskoj?

S-ro Wiesenfeld: 2) La Internacia Instituto okupiĝos pri egalvalorigo de l' diplomoj de diversaj landoj. Diplomato eldonita de la nacia instituto, apartenanta aŭ rekonata de l' Internacia Instituto de Esp-o, povos havi tiamaniere signifon ankaŭ en ĉiuj aliaj landoj.

Ĉar D-ro Dieterle kaj S-ro Pitlik (Ĉeĥoslovakujo) ne bone komprenis la intencon de tiu ĉi propono s-ro D-ro Privat klarigis kaj subtenis la projekton de s-ro Wiesenfeld.

Estis ankaŭ klarigite post vigla diskutado (Kamaryt, D-ro Träumer k. al.) ke al la Internacia Instituto rajtos aparteni naciaj institutoj kaj ke eĉ la ŝtataj institutoj (ekz. germana, ĉeĥoslovaka ktp.) rajtos havi en ĝi sian reprezentanton.

D-ro Privat tralegas la statuton de l' Internacia Instituto de Esp-o kaj proponas aldoni la sekvantan 3) projekton:

La tasko de Internacia Inst. estos kunveni ĉiujare la gvidantojn de ĉiuj naciaj institutoj por egalvalorigi la diplomojn kaj interŝanĝi la spertojn.

Ĉiuj 3 projektoj — akceptitaj.

Burggarten

(Kastelĝardeno) ĉiutage je la 8^a vespere (se pluvus en la festsalono de Hofburg)

Sinfoniokonzertoj — Operoj — Kabaredoj.

Ludas la Viena Sinfonio-orkestro.

Vendado de kartoj en koncert-direkciejo Vindobona, Karlsplatz, vendejhalo, aŭ en Burggarten.

D-ro Dieterle ektuas la financon flankon de l' afero. D-ro Privat certigas ke tiu demando estas plej facile solvebla. Unue: oni aranĝas somerkursojn (antaŭ ĉiu kongreso), kiuj estos enspezigaj; due: la ekzamenoj liveros kotizon; trie: ĉiu nacia Instituto pagos minimume po 1 funto da sterlingoj jare kaj la ŝtate subvenciataj pagas 1% de la subvencioj.

D-ro Dieterle promesas pritrakti la aferon en C. K. kaj poste interkomunikigos kun la naciaj institutoj. Ankaŭ li zorgos pri korekto de l' statuto.

Resume: La Internacia Instituto de Esp-o havas la taskojn:

- 1) aranĝadi ekzamenojn;
- 2) egalvalorigi diplomojn naciajn;
- 3) kunvenigi la naciajn inst-ojn;
- 4) helpi la fundan studadon de l' lingvo (Kamarit). La enspezoj konsistas el:
 - 1) ĉiu nacia inst-o pagos kotizon;
 - 2) ekzamenoj (kotizoj).

Dankante la ĉeestantaron D-ro Dieterle fermis la kunsidon je 11 horo matene.

Sekretariis: Wiesenfeld. Prezidis: D-ro Dieterle.

Kunsido de Esperantista Literatura Asocio.

Unua kunsido 11. VIII. 1924 en Vieno.

40 ĉeestantoj. Malfermo je 8 1/2 a.

La prezidantino F.ino Zschepank, salutas la ĉeestantojn, pensante ankaŭ pri la forestantaj membroj. Ŝi memorigas la lastan E. L. A. kunsidon en Bern antaŭ dekunu jaroj, gviditan de la antaŭa prezidantino s-ino Hankel, kiu sendas al la kunvenintoj korajn salutojn.

La P. akcentas, ke Vieno kiel urbo de muziko, transiganta trans ĉiuj limoj kaj parolanta de animo al animo ne konsiderante la naciecojn, estas tre konvena por Esperantistoj. Krome kiel urbo de literaturo speciale taŭga por E. Literatura Asocio. Majstroj verkis ĉi tie ankaŭ la popola verkisto Raimund, kies „Malsparulond“ la kongreso prezentas. La tradukinto, la altŝatata s-ro kolonelo Zwach, estas membro de E. L. A., kiu fieras pro tio kaj sendas al li dankajn pensojn, ĉar pro nebona sanstato li bedaŭrinde ne ĉeestas.

La laboro de la kunsido estu gvidata de la spirito de nobla toleremo kaj aspiro al interkonsento ankaŭ en la okazo de malsameco de la opinioj.

La tagordo estas legata. La P. legas la jaran raporton, el kiu montiĝas, ke E. L. A. malgraŭ la nefacilaj cirkonstancoj dum la pasintaj jaroj laŭeble laboris. Kelkaj novaperintaj verkoj estas cititaj.

Laŭ propono de s-ro Wiesenfeld la aŭtoro de „La Reĝo Judea“ trad. de Devjatin povas esti malkaŝita, ĉar en Ruslando li estas konata, nome princo Konstantin Romanov, parenco de la caro.

La kasraporto evidencigas, ke la enspezoj ne kovros daŭre la elspezojn.

Je punkto 1-a de la tagordo: „Nova fikso de aliĝo kaj kotizo“ oni decidis pri 2 gm markoj da aliĝo kaj 2 gm ni da kotizo.

F.ino Zschepank raportas, ke s-ino Hankel transdonis al ŝi la prezidantecon, sed ke nun ĝi estu disponigata al la kunsidantoj. Oni laŭdezire elektu prezidanton.

Laŭ propono de s-ro Wiesenfeld la ĉeestantoj konsentas la elekton de F.ino Zschepank kiel prezidantino, kaj de s-ino Hankel kiel honorara prezidantino.

S-ro von Medem parolas pri la temo: Kiajn librojn ni aperigu por vere ridigi nian literaturon? Li akcentas, ke multekostaj verkoj ne estas aĉetataj, ke tial preferu ni traduku malmultamplajn verkojn kaj laŭeble interkonsentu antaŭe kun eldonistoj.

Dua kunsido la 12. VIII. 1924 en Vieno.

Oni interkonsentas traduki gravajn, ĝenerale interesajn verkojn kaj — laŭ propono de s-ro Eroŝenko — verkojn premiitajn en la diversaj landoj.

S-ro Jean Fethke raportas pri la temo: Tradukado de Esperanto verkoj nacilingven. Lia traktado en bonega Esperanta elparolado estas sincere aplaudata.

S-ro Wiesenfeld proponas rezolucion: ELA nepre obeu al la Lingva Komitato. La rezolucio estas unuvoĉe akceptita.

Propono de s-ro Balkanji, ke ELA raportu pri „Literatura Mondo“ kaj akceptu oficialajn rilatojn kun ĝi kiel sola esperantista literatura kaj arta gazeto, alvokante la ELA-verkistojn al kunlaboro kaj la E.-legantojn al abono kaj disvastigo de la gazeto, estas akceptita.

Fino de la kunsido je la 10 1/4 a.

Tria kunsido okazos la 13-an matene je la 8 1/2 a.

Kunveno de kuracistoj T.E.K.A.-anoj.

La kuracistoj kunvenis vendrede la 8-an kaj la 12-an de Aŭgusto en du bone sukcesintaj kunvenoj. D-ro Sós estis elektita prezidanto. Ĉeestis 22 kuracistoj el 9 diversaj landoj kaj la honora membrino drino Klara Zamenhof. La prezidanto laŭlegis leterojn de l' ministro por instruado S-ro D-ro Schneider kaj de l' estro de la popolsanitaro sekeio en la ministerio por socialaj aferoj S-ro Karl Helly, kiuj ambaŭ pro foresto el Wien esprimis la bedaŭron, ke ili ne povas persone partopreni la kunvenon kaj salutis skribe la kunvenon de kuracistoj, dezirante al ĝiaj laboroj bonegan sukceson. Post laŭlego de aliaj korespondajoj sekvis kvar tre interesaj prelegoj de doktoroj Austerlitz (Ĉeĥoslovakio), Blassberg (Polujo), Brimmer (Anglujo) kaj Sós (Aŭstrio). La duan kunsidon vizitis persone la prezidanto de la Viena Kuracista Ĉambro S-ro D-ro Thennert, kiu salutite de la prezidanto D-ro Sós en la nomo de la TEKA anoj esprimis sian grandan intereson por nia movado kaj promesis dum la venonta kunveno paroli jam per Esperanto. La kunsido pridiskutis gravajn organizaĵajn demandojn kaj elektis Centran Komitaton por reorganizi la asocio kaj por propagando. En la komitaton estas elektitaj la doktoroj Blassberg, Crlejak kaj Sós.

Lunde antaŭtagmeze veturadis la kuracistoj kaj kelkaj aliĝintaj gastoj en aparta tramvagono por viziti la famajn saŭitarajn instituciojn de la urbo nome la komunuma hospitalo en Lainz, la grandan urban zorgatejon kaj la frenezulejon en Steinhof. En ĉiuj institutoj ili estis oficiale akceptitaj kaj boneven salutitaj de tiaj ĉefkuracistoj.

Protokolo pri la Prepara kaj la ĝenerala Kunvenoj 1924 de la Internacia Ligo de Esperantistoj Post kaj Telegraf-ge-Oficistoj dum la XVI-a Internacia Kongreso de Esperanto en Wien, la 7-a kaj 8-a de Aŭgusto 1924. 3-a pt. Tagordo.

- 1e Elekte de la kunsida prezidanto kaj sekretario;
- 2e Mallonga salutparolado de la prezidanto;
- 3e Proponoj pri la tagordo de la 2-a aŭ Ĝenerala Kunveno de I.L.E.P.T.O., la 8-a VIII.

Ĉeestis tiun ĉi Preparan kunsidon nur 15 gemembroj el 8 landoj.

Ĉar la prezidanto de I.L.E.P.T.O., S-ro Otto Reber, Sup. Reg. Konsilisto, en Bamberg ne povis ĉeesti la kongreson, estas proponita kaj elektata kiel kunsida prezidanto D-ro Ed. Spielmann, vicprezidanto de I.L.E.P.T.O. el Bern (Svislando) kaj kiel kunsida sekretario S-ro L. Courinat, poŝtoficisto el Clermont-Ferrand (Francujo).

Post saluta kaj bonvena parolado de la kunvena prezidanto, D-ro Spielmann estis proponitaj kaj akceptitaj la jenaj traktotajtoj por la Ĝenerala kunveno:

Tagordo aŭ traktotajtoj de la 7-a Ĝenerala Kunveno de I.L.E.P.T.O.:

1e Lego de la protokolo pri la 6-a Ĝenerala Kunveno de I.L.E.P.T.O. en Nürnberg 1924.

2e Lego de la Jarraporto pri 1923/24 de la Liga prezidanto.

3e Lego de la Kasraporto pri 1923/24 de la Centra kasisto samtempe Liga prezidanto.

4e Lego de la dumjare alvenintaj novaj proponoj pri organizo, fakgazeto kaj kotizo.

5e Diskutoj kaj decidoj.

6e Reelekto aŭ elekto de Liga prezidanto, Centra kasisto, vicprezidantoj kaj Delegitoj.

7e Eksekutoj de la lastjaraj decidoj; Peticioj al la Poŝt- kaj Telegraf-Unioj; speciala raporto de la vicprezidanto de I.L.E.P.T.O. D-ro Spielmann.

8e Lego de la alvenintaj salutleteroj kaj telegramoj de neĉeestantaj lleptanoj.

9e Proponoj pri ŝanĝoj kaj presado de la Statutoj de I.L.E.P.T.O.

10e Postulado aŭ peticio pri akcepto de Esperanto al la Internaciano de P. T. T.

11e Proponoj kaj rekomendoj pri pli bona organizado de propagando por I.L.E.P.T.O.

12e Diversaĵoj kaj kunsidferma parolado de la Taga prezidanto.

Ĉeestis pliaj, precipe ankaŭ altrangaj oficistoj el entute 12 landoj kiujn, kiel ĉiujn aliajn ĉeestantojn, la Kunvena prezidanto kolege bonvenigis kaj salutis.

Diskutoj, Voĉdonoj kaj Decidoj.

1e La Kunvena prezidanto, D-ro Spielmann legis la protokolon de la 6-a Ĝenerala Kunveno en Nürnberg (3-a Aŭgusto 1923). Ĝi sen diskuto estas unuanime akceptita.

2e Ĉar, pro ia malbona aranĝaĵo, aŭ eraro, la jarraporto de la Liga prezidanto kaj ankaŭ la kasraporto ne alvenis kaj la kunvena prezidanto povis doni nur iom malmalpleksajn tiurilatatajn sciigojn, la diskutado kaj akcepto de tiuj ĉi raportoj estas prokrastitaj ĝis la proksima jarkunveno de I.L.E.P.T.O. La jarraporto kaj la kasraporto fine alvenis Vienon aŭ en niajn manojn nur post nia Ĝenerala Kunveno t. e. Sabate la 9-a de Aŭgusto matene, ni volas elnoti la jenon:

a) La malbonaj politikaj kaj ekonomiaj cirkonstancoj denove malfavorigis nian tre idealan movadon, sed tamen estis nova kresko de membroj de 121. Je la fino de la societjaro 1923/24, 30-a de Junio 1924, I.L.E.P.T.O. havas membrojn en 37 ŝtatoj, sed estas ankoraŭ tre granda nombro de Esperantistaj Poŝt- kaj Telegraf-ge-Oficistoj kiuj ne ankoraŭ rekte aliĝis al I.L.E.P.T.O. Do ĉiu varbu.

3e El la ankaŭ tro malfrue alveninta kasraporto ni notas nur la jenon:

| | |
|--|---------------------------|
| a) Enspezoj: kiel jarkotizoj entute | G. M. 336,715.745 kaj |
| b) Elspezoj: por presadoj, cirkuleroj kaj poŝtelspezoj | „ „ 28,776.400 |
| c) Restus je la 30-a Junio 1924 kiel saldo entute | G. M. 307,939.345, sed de |
| d) ĉi tiu mono en Germanujo senvalorigis | „ „ 275,459.345, restas |
| e) do kiel Saldo por la kasraporto 1924/25 nur | G. M. 32,480.000 aŭ 32.48 |

Ormarkoj. Tio tute ne invitas lasi pli longe la Centran kazon en malbonvaluta lando. Pro la terura senvalorigo de la mono, multaj kostoj de la necesaj peticiaj aferoj al la Poŝta kaj Telegrafo Unioj kaj la prokrasto de la pago de la jarkotizo de multaj lleptanoj ni je la fino de la Liga jaro 1923/24 ŝuldas por presadoj kaj aliaj elspezoj por la peticioj al S-ro D-ro Spielmann ankoraŭ Ormk. 100.— aŭ svfrk 133.—

Tial ni permesis protokoli la jarraporton kaj la kasraporton, sed pro ilia malfrua alveno en niajn manojn ni malfeliĉe ne povis legi ilin en la Ĝenerala Kunveno, la 8-an de Aŭgusto en Wien; ili pro tio devos esti aprobataj aŭ akceptitaj en la ĝenerala kunsido de la XVII-a Kongreso de Esperanto kaj la subskribintoj rekomendas tiun aprobon, ĉar escepte la malfeliĉan perdon por senvalorigo, estas tute en ordo kaj prezentas klaran kaj sinceran bildon de nia nuna movado kaj de la sindonemego de nia ŝatata prezidanto kaj ĝisnuna Centra kasisto S-ro Otto Reber en Bamberg (Bavarujo).

4e Dumjare alvenintaj novaj proponoj: a) propono de S-ro de Marich en Budapeŝto rekomendante la abondon de la „Poŝtisto“ entenata en la „Policisto“ kaj post sufiĉe multnombra abonantaro kiel apartan eldonon po svfr 3.— kun la membreco de la „Ligo de Ordo“ kaj kun poŝtara kalendara; b) de S-ro Petro Filiâtre, redaktoro kaj Poŝtoficisto en Parizo rekomendante la abondon de la „Interligilo de P. T. T.“ gazeto monata, ne nur 6 semajna kiel la „Poŝtisto“, sed riĉenhava faksociala kaj ekonomia po nur 3 svfr. frk poŝtore kaj c) de S-ro Kind, Del. de U.E.A. Telegrafo Inspektoro en Euskirchen, Germanujo rekomendante la nebran U.E.A.-anecon de la lleptanoj kaj deviga abono de „Esperanto“ po Ormarkoj 10.— poŝtore entute, komprenante tial ankaŭ la kotizon por I.L.E.P.T.O. La propono a) estas firme subtenata nur de nia prezidanto S-ro Otto Reber, la propono b) de S-roj Thoma Sup. poŝtinspektoro, Otto Neumärker, sup. telegrafo sekretario kaj de la plejmulto de la ĉeestan-

toj en la ĝenerala kunveno de I.L.E.P.T.O. de 1924 en Wien, la propono c) estas subtenata de S-roj Kind, Creter, poŝtinspektoro, Wising, sup. poŝtinspektoro, Schäfer, poŝtpraktikanto, S-ro Georg Hap kaj S-roj Hurler kaj Emma Knur plejparte neĉeestantaj la ĝenerala kunvenon en Wien. La prezidanto D-ro Spielmann legis nur la proponojn, sed ne povis preni iun partion por la unu aŭ la alia propono.

5e La Propono a) ricevis nur 3 voĉojn, la propono b) ricevis la grandan plimulton de voĉdonoj kaj la propono c) ricevis entute 8 voĉojn.

Estas do akceptita: kiel jara kotizo de I.L.E.P.T.O. 3 svfrak frankoj, de kiuj por la Centra kaso almenaŭ 1 1/2 (Unu kaj duno) (1 kaj 1/2 ĝis 2 svfrak frankoj) laŭ la stato de la valuto, aŭ samvaloro. Kiel fakgazeto, sed ne deviga estas kun plejmulto decidita aboni la „Interligilon de P. P. T.“ en Parizo sed ŝanĝante iom la politikan kaj sindikatan akrecon. La prezidanto rekomendis tiun abonon, sed treege ankaŭ la membrecon de U. E. A.

6e La reelekto kaj elekto de la Liga prezidanto, de la Vicprezidantoj kaj Delegitoj de I.L.E.P.T.O. estas rezervata nunjare provizore al la estraro de I.L.E.P.T.O.

7e Pri la agadoj rilate al la Peticioj al la Poŝta kaj al la Telegrafo Unioj referis S-ro vicprezidanto aŭ taga prezidanto D-ro Ed. Spielmann. La peticio al la Poŝt-Unio kuŝas nun antaŭ la Internacia Kongreso de la Poŝta Unio en Stockholm kun la aldonitaj 13.339 subskriboj el 36 landoj. Respondo ĝis nun ne ankoraŭ alvenis. La Internacia Kongreso de la Telegrafo Unio okazos en printempo 1925 kaj la tiurilatataj peticioj kaj subskriboj kun alia rekomena materialo estas sendota tien en franca kaj germana lingvoj kiel al Stockholm farita. Subskriboj ĉiam ankoraŭ estas akceptataj.

8e La ŝanĝado kaj presado de la Societaj statutoj estas voĉdonataj, kaj fidataj al la estraro de I.L.E.P.T.O. por esti submetataj al la 8-a ĝenerala I.L.E.P.T.O. kunsido de 1925.

9e La alvenintaj salutoj estas sciigataj al la ĉeestantoj de la kunveno.

10e Estas je propono de D-ro Spielmann decidita Postulo aŭ peticio al la Kongreso de la Internaciano de P. T. T. okazonta en Wien deponit la 14-a de Septembro 1924. D-ro Spielmann persone rekomendis la akcepton de Esperanto al S-ro D-ro L. Meyer, ĝenerala sekretario de I.P.T.T. en Wien.

11e estas decidita sendi telegramon al la Mond-poŝtkongreso en Stockholm favore al nia Peticio kaj se eble subskribita de la Kongresprezidanto.

12e aliaj proponoj ne alvenis, kiuj rilatas rekte al llepto ol ĉie plejmulte varbi por llepto, pagi la kotizojn kaj niajn ŝuldojn.

La prezidanto fermas la Kunsidon je la 6a vespere kaj kore dankas al la ĝeĉeestantoj.

La Taga prezidanto de la Kunveno.

D-ro Ed. Spielmann, Vicprezidanto de I.L.E.P.T.O. kaj Del. de U. E. A., P. K. 174, Transit en Bern (Svislando).

La Sekretario:

Sig. L. Courtenat, Del. Poŝtoficisto, Clermont-Ferrand (Francujo).

Komercesta kunveno dum la XVI-a.

La 9-an de Aŭgusto en la salono de la Wien-a komerca gildo je la 6a vespere s-ro Schade bonvenigis la gegastojn. Ĉeestis 53 personoj plejparte Esperantistoj. Kiel prezidanto funkciis s-ro direktoro Glück, Berlin, sekretario R. Horn, Jägerndorf. Unue s-ro d-ro Steche, iama deputito de la saksa parlamento kaj prezidanto de la germana Esp. Asocio, germanlingve paroladis pri „Esp. kaj komercistaro“.

Dum pli ol unu horo la oratoro klarigis la gravan valoron de Esp. por la moderna kaj progresema komercisto, citante multajn faktojn pri grava helpo de Esp. en komercaj interrilatoj. Post tiu interesa parolado s-ro Delanoue, Paris raportis pri la franca komercista societo „Esp. kaj Komercio“. Li citis interalie, ke en la anaro de tiu societo troviĝas 8 membroj de la Paris'a Kom. Ĉambro, prezidantoj de komercaj sindikatoj ktp. Li ankaŭ raportas pri la grava subteno, kiun donis la Paris'a komerca ĉambro al nia movado akceptinte la honoran prezidantecon de la Kom. konferenco en Venecia kaj rekomendinte la enkondukon de Esp. en la kom. lernejojn.

Vere ĝojigan raporton donis s-ro Delanoue, klarigante, ke la nuligo de la konata dekreto Berard, per kiu la instruo de Esp. en la lernejoj estis malpermesita, jam est plej proksima tempo okazos kaj ke Esp. poste devos sukcesos en la francaj lernejoj.

Plue s-ro Delanoue deklaras ke la Kom. ĉambro de Paris intencas aranĝi dum printempo teĥnikan komercan konferencon en Paris.

La ĉeestantoj unuanime konsentis, ke ĝi nepre okazu dum la „foire de Paris“ en Majo 1925.

Post tiu decido s-ro prezidanto finis la kunvenon.

Protokolanto R. Horn, Jägerndorf.

Rezolucio de la Prepara Internacia Konferenco de Bankoficistoj.

La 14 en la salono de la Sindikato de Aŭstria bank- & sparkasoficistoj la 8-an de Aŭg. 1924 kunvenintaj gesamdeanoj el Aŭstrujo, Ĉeĥoslovakujo, Francujo, Germanujo, Hungarujo k. Polujo post saluta parolo de s-ro Dro Satter, reprezentanto de la sindikato de la Aŭstria bank- & sparkasoficistoj kaj post duhora diskuto decidis sendi al ĉiuj bankoficistaj asocioj kaj sindikatoj sekvan rezolucion:

„La prepara internacia Konferenco de Esperantistaj bankistoj & bankoficistoj kunvenintaj en Wien la 8-an de Aŭg. okaze la XVI-a Univ. Esp. Kongreso konvinkiginte pri tre taŭga uzebleco de la lingvo Esperanto ĉe ĉiuj bankaferoj alvokas la bankentreprenojn, bankistojn kaj bankoficistajn asociojn laŭgrade enkonduki Esperanton en siaj negocaj kaj asociaj interrilatoj; sciigis kun kontenteco, ke s-o Georges Delanoue el Paris (XIV, 4^{me} rue Charles Divry) komisiite de la L.K. prilaboras la bankfak-terminaron kun kunlaborantoj el landoj Anglujo, Aŭstrujo, Ĉeĥoslovakujo, Francujo, Germanujo, Hungarujo kaj Polujo kaj alvokas bankfakulojn el aliaj landoj interrilati kun li,

fondis provizoran bankfakan centron, kies provizora estro estas s-o. Delanoue kun delegitoj en supre menciitaj landoj. Gekolegoj el aliaj landoj anoncu vin ĉe s-o Delanoue kiel delegitoj; publikigos la komunikojn de la provizora centro en la gazetoj „Esperanto“ kaj „Internacia komerco“ kaj petas ilin represigi en nacilingvaj fakaj asociaj gazetoj. Rajm. A. Ĉech, protokolanto.

Protokolo de l' kunsido de l' Esperantistoj el Polujo, okazinta vendrede la S. VIII. 24.

La kunvenon, kiun ĉeestis 25 personoj, malfermis la reprezentanto de ĉiuj Esperantistoj en Polujo s-o Prof. D-ro. Odo Bujwid el Krakovo, kiu laŭ la peto de l' ĉeestintaro prezidis la kunvenon. Por sekretarij estis unuvoĉe akklamita s-o Edvardo Wiesenfeld el Varsovio.

La tagordo konsistis el:

1. Vicprezidanto de l' XVI por Polujo.
2. Plendo kontraŭ la aŭstra konsulo en Varsovio.
3. Plendo kontraŭ la ĉeĥoslovaka fervojo.
4. Propono de Pola Esperanto Asocio al la XVI Kongreso.

S-o Wiesenfeld (Varsovio) klarigante al la ĉeestintaro ke laŭ la antaŭkomunikoj de l' L.K.K. Polujo ne havos vicprezidanton dum la solena malferma kunsido de l' Kongreso. Tamen ĉar ni estas sufiĉe multnombraj E-oj en la listo de l' aliĝintoj ni plenrajte povis atenti ke ankaŭ ni havos vicprezidanton. Tio des pli nin mirigis (la evito de Polujo) ke inter la vicprezidantaro troviĝas tiaj, kies lando provizis malpli da aliĝintoj al la XVI ol Polujo.

Konklude oni decidis prezenti al nia reprezentanto rezolucion en kiu ni petas la Estraron de l' XVI ke ankaŭ el Polujo estu invitita vicprezidanto. Se la nombro de l' vicprezidantaro estas fiksita nur je 5, tiam la Estraro ne kalkulu la aŭstran, kiu en sia propra lando havas rajton je vicprezidanteco eksternombre.

La rezolucio estis transdonita al la Prezidanto kun rajtigo fari kun ĝi laŭbezone eĉ oficialan paŝon.

S-o H. Kostecki (Varsovio) legas proponon de interpelacio, sendota al la L.K.K. kun plendo ke la aŭstria konsulejo en Polujo estis treege malgentila al la kongresanoj kaj ĉikanis ilin en plej malbona maniero. Post diskutado en kiu partoprenis s-anoj el Krakovo, Vilno k. al. estis decidite sendi la interpelacion al la L.K.K. kaj kopion de ĝi en pola lingvo transsendi al la Pola konsulejo en Vieno.

S-ro Wiesenfeld plendas kontraŭ la ĉeĥoslovakaj konsulejoj, kiuj informis en la esp. gazetaraj, ke ilia fervojo donos al la Kongresanoj 50% rabaton, kion tamen la oficisto en kasejo de l' ĉeĥoslovaka landlimo ne volis fari. Pro tio okazis tro granda elspezo al multaj, kiuj havis limigitan monon.

Post elĉerpita diskutado estis decidite ke la Prezidanto persone diru pri tio nur informace al s-o Hromada, kiu estis la kaŭzo de tiu malagrablaĵo, ĉar li anoncis en la gazetaro pri ĉi rabato.

S-o H. Kostecki komunikas ke lia societo faris proponon al la XVI Univ. Kongreso koncerne la obeemon al la L.K. kaj Akademio.

Post diversaj dezireprimoj, el kiuj la ĉefa estas tiu de s-o Grenkamp, ke ĉiuj kongresanoj el Polujo fotografiĝu kun la pola Konsulo en Vieno, estis decidite ke la Prezidanto kune kun la proponinto pledu pri ĉi afero kaj la Prezidanto fermis la kunsidon ĉirkaŭ 13 horo.

La kunsidon honoris per sia ĉeesto s-ino Klara Zamenhof. Sekretariis: Wiesenfeld. Prezidis: Prof. O. Bujwid

Protokolo de la faka kunsido de „Konkordo“ dum la XVI-a Univers. Kongreso de Esperanto en Vieno.

La kunsido okazis la 7-an de aŭgusto je 17 horo en kunvenejo N 26. Partoprenis ĝin 20 personoj el kvar nacioj pola, germana, serba kaj ĉeĥa.

La kunsidon malfermis la fakestro s-ro Wiesenfeld el Varsovio per salutoj kaj invitis por prezidi la kunsidon s-ro Arthur Pankratz el Bydgoszcz, deputiton al la pola parlamento.

La ĉeestantoj aprobas tion.

La prezidanto, dankante por la honoro invitas por sekretarij s-ro Bronstein el Varsovio.

La vorton ricevas s-ro Wiesenfeld kiu raportas pri la agado de „Konkordo“ de la ekestado de tiu ĉi movado ĝis la nuna tempo. „Konkordo“ estas la nomo de movado naskiĝinta en Polujo en la jaro 1920, resone je alvoko, publikigita de d-ro Leono Zamenhof en la gazetaro (N 14, Esp. Triumf). Sub la devizo: „Per Esperanto al repaciĝo kaj konkordo“, la adeptoj de tiu ĉi ideo celis kunigi ĉiujn samideanojn, kiuj interesiĝis pri la interna ideo de Esperanto. La movado de tiu ĉi ideo ne sukcesis ĝis nun akiri multnombrian samideanaron, sed tio tamen ne fortimigas kaj malkuraĝigas la lojalajn adeptojn de tiu ĉi humana ideo kiuj esperas, ke tamen venos iam la tempo, kiam la homaro nin komprenos kaj sekve aprobas nian agadon.

Post klarigo de la kaŭzoj, pro kiuj ĝis nun la „Konkordo“-movado ne sukcesis kolekti sub sia standardo pli multnombrian anaron, nome, manko de propagando, teknike nesufiĉa organizo dum la Kongreso, s-ro Wiesenfeld tralegos la konatan alvokon de D-ro Leono Zamenhof, kiu farigis kvazaŭ manifesto de la „Konkordo“-movado. La raportanto esprimas la esperon, ke same kiel la „Alvoko“ entuziasmigis la nemultnombrian anaron en Varsovio, ĝi same efikos nun inter la ĉeestintaro. En Polujo la ideo disvolvigis sufiĉe forte kaj la Varsovia centro havas filiojn en 8 diversaj urboj. El aliaj landoj aliĝis al tiu ĉi movado Francujo, Anglujo, Belgujo, Germanujo kaj Turkujo.

Finante sian paroladon, s-ro Wiesenfeld eldiris la konkludon, ke se nia lingvo estas la korpo de Esperanto, do la interna ideo estas ĝia animo.

S-ro Bronstejn el Varsovio kritikis la ĝisnunan malfortan agadon de la „Konkordo“-gvidantoj. Estis nenio farita por prepari la publikan opinion de la esperantistaro por la hodiaŭa kunveno, kio tuj estas la ĉefa kaŭzo, ke nur malmultaj venis. Estas necese alpreni pli aktivan taktikon kaj tiam ekfloros oazoj de Konkordo en la dezerto de malamo kaj malpaco.

S-ro Novjon el Zagreb diras, ke multaj estas la esperantistoj, kiuj konsentas kun la celado de „Konkordo“. Estas necesa organizado kaj konstanta informado.

S-ro Pankratz el Polujo (Bydgoszcz) diras, ke li mem ĝis nun ne apartenas al „Konkordo“, sed al alia societo en Bydgoszcz, li tamen esperas, ke la Konkordo-movado penetros en lian societon, same kiel en aliajn societojn en Polujo.

S-ro Wiesenfeld donas informojn kaj klarigas la deklaraciajn punktojn de „Konkordo“.

Unuanime estis akceptita, proponita de s-o Bronstejn jena rezolucio:

„Faka kunsido de „Konkordo“, okazinta dum la XVI Univ. Esp. Kongreso en Vieno esprimas la deziron, ke la gvidantoj de la „Konkordo“-movado komencas pli aktivan agadon kaj propagadon de „Konkordo“, ideo en internacia skalo.“

S-ro Pankratz fermas la kunsidon, dezirante sukceson al la laboro de „Konkordo“.

La kunvenon honoris per sia ĉeesto; nia plej alta protektantino kaj honora membrino, s-ino Klara Zamenhof, vidvino de la Majstro.

Sekretario: Bronstejn. Prezidanto: Artur Pankratz.

Burggarten ĉiutage je la 8-a vespere

(dum pluva vetero en la festa salonego de Hofburg).

Programo de la 13-a ĝis la 15-a de Aŭgusto:

Merkrede, 13-a. Sinfonia Koncerto. Dirigento Martin Spörr. Prezentataj estas: Tŝaikowsky Sinfonio No. 2, f-mol. Post ĝi debuto en Vieno de la fama Pola baletistaro kondukata de la baletmajstro Jan Cieplinski. Naciaj kaj Karakterizaj Dancoj.

Ĵaŭde, 14-a. Vespere de Wien'aj Komponistoj. Preziantoj: la Wiena Sinfonia Orkestro, dirigento Martin Spörr, kaj la operkantistino Clara Musil. Programo: J. Strauss: Uverturo al „Fledermaus“, Schubert: Baletmuziko el „Rosamunde“, Strauss: „An der schönen blauen Donau“, Brahms: Hungaraj Dancoj N-oj 5 kaj 6, F-no Musil kantas la valson „Frühlingsstimmen“ de Strauss kaj la arion „Il vi pastore“ de Mozart. En la dua parto de la programo bonhumoraj deklamoj de unuarangaj Wienaj artistoj.

Vendrede, 15-a. Sinfonia Koncerto, dirigento Martin Spörr kaj dua gastludo de la „Pola Baletistaro“. Programo de la Koncerto: Mendelssohn: Sinfonio No 3, a-mol. (La „Skota“.)

Esperanto-Literaturo

ĉiuspeca el nia eldonejo estas havebla en granda sortimento en la

Kongresa Librejo.

Precipe ni atentigas pri niaj kolektoj

Esperanta Biblioteko Internacia

Nova Esperanto-Biblioteko

kaj pri nia gazeto

Germana Esperantisto

(Specimenaj numeroj en la Kongresa Librejo)

Esperanto-Verlag Ellersiek & Borel G. m. b. H.

Berlin kaj Dresden.

(Aŭstria oficejo por trafiko)
Oesterreichisches
Verkehrsbureau

Centro Wien, I., Friedrichstrasse Nr. 1

(kontraŭe de Sezession)

Telefono: 52-5-90 Serie. Telegramadreso: Austriaverkehr.

Filioj kaj reprezentejoj en- kaj eksterlande entreprenoj por ŝipaj kaj aeroplanaj veturadoj. — Ŝipkomunikoj al ĉiuj gravaj havenoj. — Propra banko. — Societaj kaj aŭtomobilaj vojaĝoj. — Informoj pri ĉiuj vojaĝ-aferoj.

De la 7^a Aŭgusto propra servado en Konzerthaus (Kongresejo).

Anglo-Austrian Bank Limited

London, 24, Lombard Street, E. C. 3
Vienna Representation I. Strauchgasse 1

Capital Authorized . £ 2,000,000
Capital Issued 1,406,370
Reserves 575,156

Telegrams: Anglobank Vienna — Telephone: 63570

21 mensejoj en Vieno

Sidlokoj:

Aŭstrujo: Baden ap. Wien, Bregenz, Gmünd, Graz, Graz-Hauptbahnh. (ĉefa stacidomo), Innsbruck, Krems, Laa a. Th., Linz, Mariazell, Semmering, St. Pölten, Villach, Villach-Bahnhof (stacidomo), kaj Velden ĉe Wörthersee, Wels, Wiener Neustadt. — Jugoslavo: Maribor. — Hungarujo: Budapeŝt, monŝanĝejoj: Calvinplaco kaj Elisabethring. — Italujo: Trieste. — Rumanujo: Czernowitz, Grosswardein.

Ĉiubankaj transakcioj estas efektividataj

Aŭstruja Akcia Societo por
Aeroplanvojaĝoj

Ĉiutagaj Flugoj de

Prezoj de flugo:

| | | | |
|------|--------------|-----------------------|-----------|
| Wien | München'on | Aŭstr. K ^o | 900.000 |
| | Nürnberg'on | " " | 1,350.000 |
| | Frankfurt'on | " " | 1,950.000 |
| | Zürich'on | " " | 1,760.000 |
| | Genève'on | " " | 2,350.000 |
| | Budapest'on | " " | 400.000 |

Rondflugoj super Wien
kaj la Wien'a Arbaro

(Daŭro proks. 20 minutoj) Prezo Aŭstr. K^o 150.000 por unu persono

En Junkers plenmetalaj Limuzinoj

Flugbiletoj kaj Informoj en „Oesterreichisches Verkehrsbureau“, Wien I, Friedrichstrasse 1

Telephon 52-5-90

Restoracio Francisko Falk

„ZUM STADTPARK“

I. Kolowratring 1, apud la Urba Parko,

nur unu minuton de la Kongresejo „Konzerthaus“, rekomendas al la kongresanoj sian bonegan manĝotablon tagmezan kaj vesperan. Moderaj prezoj kaj bona servado, distinga biero kaj bonaj vinoj.

Eksterlandaj Kapitalhavantoj

povas asociiĝi

por bona procentigo de kapitalo investita al solidaj, prosperon promesantaj

Entreprenejoj Wien'aj por Industrio kaj Komerco

Proponoj kun informo pri la disponebla mono sub la cifro „Paclaboro“ al Julius Szekely, Wien, III., Untere Weissgärberstrasse 49.

La plej nova invento

de l' branĉo elektroteknika por la tuta eksterlando estas fardonebla. Ekstrema profitodona. — Skribaj demandoj al Eduard Hubmayer, Wien., II, Linnegasse 1/7.